

MDXXVI-MDXXVI



La FLORETOJ
de
S. FRANCISKO

esperantigitaj
de

E. PIZZI

M. d

LA FLORETOJ
DE
S. FRANCISKO

KLASIKA ITALA VERKO DE LA XIII JARCENTO

ESPERANTIGITA
DE
F. PIZZI

ANTAŬPAROLO
DE
P. P-ro MODESTO CAROLFI O. M.

ESPERANTA ELDONEJO
A. PAOLET
S. VITO AL TAGLIAMENTO (ITALIO)
1926

CIUJ RAJTOJ REZERVITAJ

AL LA
TUTMONDA FRANCISKANA FAMILIO
OKAZE DE LA SEPA JARCENTA DATREVENO
POST LA GLORA MORTO
DE LA SERAFA PATRO
SANKTA FRANCISKO EL ASIZO
LA ESPERANTAN TRADUKON
DE TIU ĈI ORA KLASIKA VERKO
KIU ALPROKSIMIGAS LA ANIMOJN AL ĈIELO
HUMILE DEDIĈAS LA TRADUKINTO
FILO DE LA TRIA ORDENO
POR KE ĈIE SEN LA LINGVAJ BAROJ
KIUJN LA DEMONO KONSERVAS SUR LA TERO
POR MALHELPI
LA ANTAŬENMARŜON DE LA SANKTA EVANGELIO
PLIFACILE ĜI ESTU KONATIGATA

VENEZIA, LA JUBILEAN' JARON MCMXXVI

ANTAŬPAROLO

En la VII jarcenta datreveno de la morto de S. Francisko el Asizo jen tiu ĉi bela traduko de la *Floretoj* en la helplingvo internacia Esperanto, oferdone al Sanktulo tutmonda kiel la amo kaj belega kiel la gloro; kaj krom la oferdone estas ankaŭ taŭga la deziro konigi al la tuta mondo la mirindajn kaj belegajn scenojn, en ili kolektitaj, plenaj je tiu delikata sento, kiu enpenetras en la animojn per saniga influo.

La belega traduko de la lerta tradukanto tute ne perdigas al la *Floretoj* iliajn literaturajn meriton kaj valoron.

La mondo vivas nun en iu atmosfero de Franciskanismo; la pensoj sin turnas al Asizo kun tre urĝa deziro al la paco; la koroj, konstatante ke la mondaj aferoj kaj la mondanaj korinklinoj ĉiutage falas kiel la flaviĝintaj folioj de la aŭtuno, lasante vastan kaj funebran dezertigon, kiun nur Sanktulo povas reverdigi per dolĉaj esperoj, postulas per insistaj alvokoj la «Serafon de la amo»; al la pensoj kaj al la koroj jen renkonte venas tiu ĉi ĝojiga kolekto de rakontoj kune kunplektitaj kiel granda bukedo; ili havas la bonodoron, ili havas la printempon eternan, ĉar ili estas inter si kunligitaj de iu ora fadeno, kiu neniam mortas: la amo.

La *Floretoj* enhavas, mi diras kune kun Lia Eksministra Moŝto Luizo Luzzatti, ĉiun socialan postulon, eĉ la plej progresintan, la veran homaman fratecon nesimila al tiu de la anarkiaj revolucioj; ĝi nek tondas la flugilojn de la spirito, nek sekigas la animon, nek malvarmigas la koron; ĝi kondukas la homajn societojn al la stato kiel eble plej perfekta sur la tero. Se tia estas la influo sociala de la *Floretoj*, kiu ne benos tiun, kiu kun intelekto de amo volis ke per la plej disvastigata lingvo ĝi alvenu al ĉiuj?

La ĝentilaj legantoj sentos kiamaniere la virto kaj la pieco franciskanaj trovas vastajn eĥojn en iliaj konsciencoj; en tiuj ili ekvidos la infanecon de la animo, kiu estas la naiva rideto de la anĝeloj; kaj el la epizodoj la lumo de la karito al ili petos pli grandan abnegacion en la sociala kunvivado, pli malgrandan emon al la mondaj aferoj, sopiron al la altaĵoj de la virto, kiu nobliĝante restas pli ame homa inter la doloro kaj la amo.

Oni legu la epizodojn, kiuj elvidigas al niaj okuloj la tutan pedagogion franciskan por la edukado de la popolo. La blasfemanta leprulo estas netrankvila, kaj kolerplena, kaj lia buŝo malpurege blekas per vortoj kriantaj kontraŭ Dio; S. Francisko lavas lin tulpacience; lin flegas, «kie lia manoj tuŝas, tie la karno resaniĝinta reaperas» kaj kun la ekstera miraklo alia ja pligranda miraklo ekfloras: la konverto de la koro, kiu, de kolerema, fariĝis sankta. Jen, kiel oni devas eduki la popolon al la ĝentileco: flegi la eksterajn suferojn por disĵeti sur la plie vastajn suferojn internajn la semon de la amo, de la eduko, de la ĝentileco.

Sed kiom da epizodoj (la leganto tion konstatos kun kreskanta admiro) el kiuj de la simpla rakonta formo de iu okazintaĵo forsaltas la esenco de la franciskanismo: naiveco en la sankteco: la naturo, elemento por la sinleviĝo; la doloro, fonto de perfekta ĝojo; kaj tiu ĉi ĝojo, tiu ĉi naiveco kaj tiu ĉi sankteco sin fondas sur la konformeco kun Jesuo Kristo. «Antaŭ ĉio estas konsiderinde — tiel komencas la unua *Floreto* — ke la tre glora sinjoro sankta Francisko en ĉiuj agoj de sia vivo konformiĝis al Kristo benata ». Kaj, kvankam la *Floretoj* ne donas al ni la tutan historion de S. Francisko, kvankam ili estas nur floroj de lia vivo kaj de lia sankteco, floroj elektitaj inter multaj sen iu antaŭstarigita ordo, aŭ sen iu speciala tezo

por elmontri aŭ triumfigi, tamen ankaŭ en la *Floretoj* ni sentas ke la imitado de Kristo estas por S. Francisko konstanta priokupo kaj formas lian specialan grandecon.

Kaj kiu volas trovi en la utilo la belon, ho la *Floretoj* estas ankaŭ floroj de literaturo! Estas devigo de ĉiu vera italo konigi la italajn valoraĵojn kaj belecojn al tiuj, kiuj ne konas ilin, al tiuj, kiuj ne volus ilin koni, konigi, ilin pere de la ilo je dispono de ĉiuj, la helplingvo internacia; kaj estas bele, estas logike komenci de la unua verko de nia mirinda literaturo, komenci de la unua gemo, la *Floretoj*. En la laboro de formado de nia lingvo itala, jam antaŭ ol Dante per profundega penso kaj per granda povo de genio ĵetu inter la inferaj flamoj la italan lingvon «por ke pli dia en ĉiel' ĝi sonu» la *Floretoj* sin prezentas kun la naiva ĝentileco de kiu rompas ĉiun atendon kaj nekonscie preparas la vojon al la Titano.

Eble traduko el la latina lingvo, tiu ĉi verko montras la karakteron de la tempo, kiu preparis la lingvon per tradukoj por la popolo, kaj se de la aŭtoro de la originala latino kaj de la tradukinto, aŭ de la tradukintoj ni ne konas la nomon, al ni sufiĉu scii ke la itala teksto datumas de la unuaj jaroj de la dek-tria jarcento. Kaj de la dek-tria jarcento estas la stilo plena, je beleco kaj simpleco, spiranta naskiĝan bonodoron kaj klasikan harmonion, kaj stilon facilan, liberan, fluantan sen la artifiko de arto longe prilaborita.

La personoj forsaltas klaraj kaj precizaj; homoj kaj aĵoj mirinde sin prezentas; pro tio ŝajnas al ni esti transportitaj per magia ensorĉo al tiuj tempoj, en tiuj lokoj, inter tiuj personoj. Se la alproksimigo estas arto, tie ĉi estas arto, kaj kiom granda arto!

Mi ekvidas ke mi jam tro prokrastis, dum la leganto emas legi la tekston, kiu en la klara kaj efika traduko de Prof. Pizzi konservas, kiel mi jam diris, la ravan simplecon de la itala vulgarlingvo; pro tio oni seninterrompe legas ĝin ĝis la fino kaj leginte oni sentos ankoraŭ la bezonon ĝin relegi.

Ke la spirito de S. Francisko, ĉerpita el la Evangelio, fondita sur la leĝoj de la amo kaj sur la harmonio de la tuta kreitaĵaro, portu al la ĝentilaj legontoj bonon kaj pacon.

Cortemaggiore (Italujo), la 13-an de Majo 1926.

P. MODESTO CAROLFI

KLARIGO PRI LA FLORETOJ

La dek-tria jarcento signas la luman tagiĝon de la itala literaturo. Tiu ĉi nova literaturo aperis en Italujo iom post iom dum la aliformiĝo de la lingvo latina, kaj daŭrigadis en la postaj jarcentoj.

Pro novaj tendencoj la popolo preskaŭ plu ne parolis latine kaj preskaŭ plu ne komprenis ĝin. La politiko, la ekonomio, la religio maturigadis la tempon; la glora pasinto plu ne ekzistis precipe en la popolo; tiu ĉi nekonscie jam preparadis sian gloran estonton.

La esprimo de la poeziaj sentoj elfluis el la koroj per prozodiaj metroj redaktitaj laŭ la popola lingvo, kaj la kantoj de la rapsodoj donis sian sonoratan eĥon sur la placoj, sur la stratoj en la dialektoj de la diversaj provincoj.

La unuaj manifestacioj de la nova literaturo konsistis nature el la popolaj kantoj kaj rakontoj per naiva kaj simpla stilo, taŭga kaj necesa por la nekultura popolo.

Do, tiujn unuajn verkojn, kiuj alvenis ĝis ni, garditaj tra la jarcentoj en la bretoj de la bibliotekoj kaj de la arkivoj inter granda amaso da skribaĵoj, ni rigardas kaj konservas kiel verajn trezorojn, ĉar ili signas la finon de iu pensmaniero kaj la komencon de alia nova mondo, de alia progreso kun nova vidpunkto, la vidpunkto de la italaj vivo kaj penso kaj unueco, per kiuj, poste, tra Dante, Bokaĉo, Petrarka kaj aliaj eminentaj verkistoj de la nova tempo, la itala literaturo atingis la gloran gravecon de nacia literaturo.

Unu el tiuj unuaj juveloj sendube estas *La Floretoj de sankta Francisko*. Tiu ĉi verko enhavas kelkajn epizodojn pri la vivo de s. Francisko el Asizo, de liaj kunfratoj disĉiploj en Umbrio kaj en Markizlando Ankono. Ĝi konsistas el kvindek-tri ĉapitroj, pri kiuj la diskutoj ne decidis ankoraŭ definitive ĉu ili estas originala verko, ĉu traduko el latina teksto, ĉu simpla eltiraĵo de iu verko latina, kvankam iuj kritikaj ekzamenoj inklinas konsiderigi ĝin originalaĵo. Ekzemple la natura kaj efika simpleco de la rakonto, la stilo facila kaj klara, kiuj silentigas la dubojn pri la necerta kronologio, forigus la certecon pri la aljuĝo al kiu ajn latina fonto, jam farita en la XVIII jarcento de Wadding, la klera angla historiisto de la franciskana Ordeno, en la *Annales Ordinis Minorum*. Sed la diskuto denove restariĝis kiam en la kvina eldono, komencita en 1845, de la itala *Vocabolario della Crusca*, bazite sur nekorektaj sciigoj, oni priparolas pri ia latina fonto; kaj lastatempe Barbieri unue, Alvisi poste opiniis kredi la sciigon donitan de Wadding, ke la *Floretoj* devnu de iu *Floretium*, aljuĝata al Patro Ugo-lino el Monto s. Mario, kaj ili priparolas pri iuj kodeksoj de la Irlanda Kolegio s. Izidoro.

Mi ne celas tie ĉi fari detalan studon pri la afero, ankaŭ por ke eble ĝi restus kritike nesolvita, ĉar estus necese antaŭ ĉio klopodi por serĉi aliajn seriozajn antikvajn dokumentojn ĝis nun nekonataj; al mi sufiĉas esti zorginta por la diskonigo per traduko esperantlingven de la plej antikva verko de la itala literaturo, kiu havas la meriton esti malfermita la vojon al la itala nacia lingvo, kaj esti montrinta la mirindegan figuron de unu el la plej gravaj uloj, kiu aliformigis la homan societeton sen armiloj, predikante nur la amon kaj la pacon per parolo kaj per ekzemplo, amo kaj paco bazitaj sur la Evangelio kaj la imitado de Kristo.

Mi klopodis por nenion ŝanĝi nek pri la stilo, nek pri la formo por ne forpreni la originalan belecon de la verko, kiu tiel en la traduko sin prezentas en tuta sia simpleco kaj naiveco, grava dokumento de antikva literatura verko kaj de franciskana religieco, plena je fido. karitho kaj persisto en la bonfaro por la alta celo de la savo de la animoj.

Tial la traduko konservas kune kun la franciskana spirito, kiu sola povus savi la homaron, la sincere naivan, fluantan stilon, tiam intence tiel verkita por la popolo.

Se la penado, kiun mi havis por doni al la mondo la esperantan tradukon de tiu ĉi grava verko, grava laŭ vidpunktoj ĉu literatura, ĉu historia, ĉu pensmaniera, estas dononta al la homaro eĉ la plej malgrandan signon de simpatio al la antikva dokumento de la itala civilizo, forsaltinta el la dornoj de la mezepoko, kiel stelo inter la uraganaj nuboj, kaj la plej malgrandan signon de simpatio al la spirito kiu burĝonas el la rakontoj, spirito kiu estis la ĉefa, se ne la sola, gvidilo de la dirita civilizo, tio estos por mi la plej granda premio.

Kaj mia dankemeco sin turnas al la jam bone konata esperanta Eldonejo A. Paolet, kiu prenis sur sin la pezon de la eldono kaj al Lia Pastra Moŝto P.ro M. Carolfi O. M., kiu ludas altan rolon en la esperanto-movado, ĉar li bonvolis prezenti la libron al la mondo.

Mi elesperas ke mia laboro estu ankaŭ unu el la gutoj malgrandaj, kiuj, ĉu por la bono de la homaro, ĉu por la esperanta afero.

«Konstante frapante traboras la monton granitan».

F. PIZZI

ĈAPITRO I.

Je l' nomo de nia Sinjoro Jesuo Kristo Krucumita, kaj de lia patrino Virgino Mario. En tiu ĉi libro estas iuj floretoj, mirakloj kaj piaj ekzemploj de la tre glora malriĉulo de Kristo, sinjoro sankta Francisko, kaj de kelkaj liaj kunuloj, por laŭdo de Jesuo Kristo. Amen.

Antaŭ ĉio estas konsiderinde, ke la tre glora sinjoro sankta Francisko en ĉiuj agoj de sia vivo konformiĝis al Kristo benata; pro tio ke, kiel Kristo en la unua tempo de sia predikado elektis dek-du apostolojn por malestimi ĉion mondan kaj sekvi lin en malriĉeco kaj en la aliaj virtoj, tiel sankta Francisko elektis en la komenco de la starigo de sia Ordeno dek-du kunulojn, posedantaj tre altan malriĉecon; kaj kiel unu el la dek-du apostoloj de Kristo, riproĉita de Dio, fine pendiĝis je la gorĝo, tiel unu el la dek-du kunuloj de sankta Francisko, kiu estis nomita frato Johano de la Capella [Kapela], apostatiĝis, kaj fine pendigis sin mem je la gorĝo. Kaj tiu ĉi estas por la elektitoj granda ekzemplo kaj materio de humileco kaj de timo, konsiderante ke neniu estas certa povi daŭrigi ĝis la fino en la favoro de Dio. Kaj kiel tiuj dek-du apostoloj estis ĉe la tuta mondo mirindaj pri sankteco kaj plenaj el Spirito Sankta, tiel tiuj tre sanktaj kunuloj de sankta Francisko estis viroj je tiom da sankteco, ke de tempo de la apostoloj ĝis nun la mondo ne havis tiel mirindajn kaj sanktajn virojn; ĉar iu el ili estaze iris ĝis la tria ĉielo, kiel sankta Paŭlo, kaj tiu estis frato Egidjo; iu el ili, tio estas frato Filipo Lungo, havis la lipojn tuŝitaj de la anĝelo per karbo de fajro, kiel Izaio profeto; iu el ili, tio estas frato Silvestro, parolis kune kun Dio, kiel amiko faras kune kun alia, kiel faris Moiso; iu flugis pro subtila intelekto ĝis la lumo de la dia scienco, kiel la aglo, tio estas Johano Evangeliisto, kaj tiu estis la tre humila frato Bernardo, kiu tre klare komprenigis la sanktan Skribon; iu el ili estis sanktigita de Dio kaj kanonigita en ĉielo, vivante li ankoraŭ en la mondo, kaj tiu estis frato Ruflno nobelo el Asizo. Kaj tiel ĉiuj estis signitaj per speciala signo de sankteco, kiel sekve oni klarigos.

ĈAPITRO II.

Pri frato Bernardo el Quintavale [Kuintavale], unua kunulo de Sankta Francisko.

La unua kunulo de sankta Francisko estis frato Bernardo el Asizo, kiu tiel sin konvertis. Estante sankta Francisko ankoraŭ en monda vesto, kvankam li estis malestimeganta la mondon, kaj humile irante turmentata pro la pento, dume li estis de multaj konsiderata stultulo kaj kiel frenezulo mokata, kaj forpelata per ŝtonoj kaj koto de la parencoj kaj de la aliaj, kaj li pacience suferante ĉiun ofendon kaj mokon, kiel surda kaj muta, sinjoro Bernardo el Asizo, kiu estis unu el la nobeluloj, riĉuloj kaj kleruloj de la urbo, saĝe ekkonsideris en sankta Francisko la tiel eksterordinaran malestimon de la mondo, la grandan paciencon en la ofendoj, kaj kiu jam de post du jaroj tiel abomenata kaj malŝatata de ĉiu persono, ŝajnis ĉiam pli konstanta kaj paciencema; li ekpensis kaj ekdiris en si mem: «Neniel povas esti ke tiu Francisko ne havu grandan favoron de Dio»; kaj tiel li invitis lin la vesperon por la vespermanĝo kaj ripozo; kaj sankta Francisko akceptis, vespermanĝis kune kun li kaj loĝis ĉe li. Kaj tiam sinjoro Bernardo havis la deziron konstati lian sanktecon; pro tio li preparigis por li liton en sia ĉambro mem, en kiu nokte ĉiam brulas lampo. Kaj sankta Francisko por kaŝi sian sanktecon, tuj kiam eniris en la ĉambron, enlitigis kaj ŝajnigis dormi; kaj same sinjoro Bernardo post iom da tempo enlitiĝis, kaj brue ronkis ŝajnigante tre profunde dormi. Tiam sankta Francisko, kredante sinjoron Bernardon vere dormantan, dum la unua dormo ellitiĝis, kaj ekpreĝis levante la okulojn kaj la manojn al ĉielo; kaj tre devote kaj fervore li diradis: «Dio mia, Dio mia»; kaj tiel dirante kaj plorante restis ĝis la matutino, ĉiam sole ripetante: «Dio mia, Dio mia»; kaj tion diradis sankta Francisko, rigardante kaj admirante la bonegecon de la dia majesteco, kiu bonvolis konservi la mondon, kiu pereis; kaj pro sia malriĉulo Francisko li disponis por provizi la rimedon por la sano de lia animo kaj de la aliaj. Kaj pro tio, lumigita de la spirito de profeteco, antaŭvidante la grandajn aferojn, kiujn Dio devos fari per li kaj lia Ordeno, kaj konsiderante sian nesufiĉecon kaj malmultan virton, vokis kaj preĝis Dion, kiu per sia boneco kaj ĉiopovo, sen kiu nenion povas la homa malforteco, anstatuu, helpu kaj kompletigu kion per si mem li ne povas. Vidante sinjoro Bernardo, dank' al lumo de la lampo, la piegajn agojn de sankta Francisko, kaj piege konsiderante la vortojn, kiujn li diris, li estis tuŝita kaj inspirita de la sankta Spirito por ŝanĝi sian vivon; tial, kiam tagiĝis li alvokis sanktan Franciskon kaj tiel diris: «Frato Francisko, mi ĉiel disponis en mia koro por forlasi la mondon kaj vin sekvi en ĉio, kion vi ordonos al mi». Aŭdinte tion, sankta Francisko ĝojis en spirito kaj tiel diris: «Sinjoro Bernardo, tio, kion vi diras, estas afero tiel granda kaj mirinda, ke pri tio oni devas peti konsilon al nia sinjoro Jesuo Kristo, kaj lin preĝi ke li bonvolu montri al ni sian volon pri tio, kaj montri al ni kiel tion ni povas plenumi; kaj tial ni iru al episkopejo, kie estas bona pastro, kaj ni dirigos la meson; poste ni restos preĝante ĝis la tria preĝhoru, preĝante Dion li per la tri malfermoj de la misalo. montru al ni la vojon, kiu plaĉas al li, kiun ni devos elekti». Respondis sinjoro Bernardo ke tio tre plezurigas lin. Tiam ili sin movis kaj iris episkopejon; kaj ili ĉeestinte la meson kaj restante en preĝo ĝis la tria preĝhoru, la patro je la petoj de sankta Francisko prenis la misalon, faris la krucosignon kaj trifoje ĝin malfermis je nomo de nia Dio Jesuo; kaj en la unua malfermo aperis tiu frazo, kiun Dio diris en la evangelio al junulo, kiu demandis lin pri la vojo de la perfektigo: «Se vi volas fariĝi perfekta, iru kaj vendu ĉion, kion vi posedas, kaj donacu al la malriĉuloj, kaj

venu kaj sekvu min»; en la dua malfermo aperis tiu frazo, kiun Kristo diris al la apostoloj, kiam li sendis ilin por prediki: «Ne portu ion dum la vojirado, nek bastonon, nek poŝegon, nek ŝuojn, nek monon», volinte per tio instrui ilin, ke ilian tutan esperon por la vivo ili devu meti en Dio, kaj plene ili intencu prediki la sanktan evangelion; en la tria malfermo de la misalo aperis tiu vorto, kiun Kristo diris: «Kiu volas sekvi min, forlasu sin mem kaj prenu sian krucon kaj sekvu min». Tiam sankta Francisko diris al sinjoro Bernardo: «Jen la konsilo kiun Kristo donas al ni; iru do kaj tute faru, kion vi aŭdis; kaj estu benata nia sinjoro Jesuo Kristo, kiu bonvolis montri al ni sian evangelian vojon». Sinjoro Bernardo, aŭdinte tion, foriris kaj ĉion, kion li posedis (li estis tre riĉa), li vendis kaj tre kontente disdonis ĉion al la malriĉuloj, al la vidvinoj, al la orfoj, al la malliberuloj, al la monaĥejoj, ala malsanulejoj kaj al la pilgrimantoj; kaj en ĉio sankta Francisko fidele kaj providence lin helpis. Tion vidante iu, nomata sinjoro Silvestro, ke sankta Francisko donis kaj onigis tiom da monoj al la malferiĉuloj, avareme diris al sankta Francisko: «Vi tute ne pagis al mi tiujn ŝtonojn, kiujn ĉe mi vi aĉetis por ripari la preĝejojn, kaj pro tio, nun ke vi havas monojn, pagu al mi». Tiam sankta Francisko mirigis pri lia avareco kaj ne volante kontraŭdiri lin, kiel vera observanto de la evangelio, metis la manojn en la poŝon de sinjoro Bernardo, kaj pleniginte ilin per monoj, remetis ilin en la poŝon de sinjoro Silvestro dirante ke se li plie da mono volas, plie li donus. Kontentiĝis sinjoro Silvestro, kaj foriris kaj revenis hejmen; kaj vespere repensante pri tio, kion li faris dum la tago, kaj sin riproĉante pri sia avareco, kaj, konsiderante la fervoron de sinjoro Bernardo kaj la sanktecon de sankta Francisko, la sekvantan nokton kaj du aliajn noktojn li de Dio ricevis tiun vizion: ke el la buŝo de sankta Francisko eliris ora kruco, kies supraĵo tuŝis la ĉielon, kaj kies brakoj sin etendis el oriento ĝis okcidento. Pro tia vizio li donacis je nomo de Dio ĉion, kion li posedis, kaj fariĝis frato minorito: kaj en la Ordeno li estis plena el tiom da sankteco kaj favoro, ke li parolis kune kun Dio, kiel la amiko kune kun alia, same kiel ofte okazis al sankta Francisko kaj kion pli poste oni klarigos. Sinjoro Bernardo same havis tiom da favoro de Dio, ke ofte li estis estaza pripensante pri Dio; kaj sankta Francisko diris pri li, ke li estas digna je ĉiu respekto kaj ke li starigis la Ordenon; ĉar li estis la unua, kiu estis forlasinta la mondon, nenion rezervinte por si, sed doninte ĉion al la malriĉuloj de Kristo kaj ke li komencis la evangelian malriĉecon, oferdoninte sin mem senvestita inter la brakojn de la Krucumito; kiu estu de ni benata *in saecula saeculorum*. Amen.

ĈAPITRO III.

Kiel pro malbona penso, kiun sankta Francisko havis kontraŭ frato Bernardo, li ordonis al sama frato Bernardo, ke trifoje li supreniru per la piedoj sur sian gorĝon kaj sian buŝon.

La piega servanto de la Krucumito, sinjoro sankta Francisko, pro la maldolĉeco de la pentoj kaj senhalta ploro fariĝis preskaŭ blinda, kaj malmultan lumon li vidadis. Fojon, inter la aliaj, li foriris el la monaĥejo en kiu li estis, kaj iris al monaĥejo, kie estas frato Bernardo, por preparoli kune kun li pri diaj aferoj; kaj tien alveninte, li trovis ke li estas preĝanta en la arbaro. tute leviĝinta kaj kuniĝinta kun Dio. Tiam sankta Francisko iris en la arbaron, kaj lin alvokis: «Venu, li diris, kaj parolu kune kun tiu ĉi blindulo»; kaj frato Bernardo nenion respondis al li, ĉar la viro estante en granda estazo, tia havis la atenton interrompita kaj leviĝinta al Dio, kaj ĉar li havis specialan favoron paroli pri Dio kiel sankta Francisko ofte konstatis, kaj pro tio li deziris paroli kun li. Post kelka tempo li same vokis lin la duan kaj la trian fojon; kaj neniam frato Bernardo lin aŭdis; kaj tial li ne respondis al li, kaj al li ne iris. Pro tio sankta Francisko foriris iom senkonsola: kaj en si mem li mirigis kaj plendis ke frato Bernardo, trifoje vokita, ne aliris al li. Foririnte kun tiu ĉi penso, sankta Francisko, kiam li estis iom malproksimiĝinta, diris al sia kunulo: «Atendu min ĉi tie » kaj li iris en senhoman lokon, kaj sin teren ĵetis preĝante, kaj preĝis Dion ke li malkaŝu al li la kialon ke frato Bernardo ne estis respondinta al li: kaj tiamaniere restante venis al li voĉo el Dio, kiu tiel diris: «Ho malfeliĉa viro, pro kio vi maltrankviliĝis? ĉu devas la homo lasi Dion por la kreitaĵon? Frato Bernardo, kiam vi lin vokis, estis kun mi kuniĝinta; kaj pro tio li nek povis veni al vi, nek respondi; ne miru do se li ne povis respondi al vi; ĉar li estis tiel for de si mem, ke neniun vian vorton li aŭdis». Sankta Francisko ricevinte tiun ĉi respondon de Dio, tuj tre rapide revenis al frato Bernardo por humile deklari al li la penson, kiun li estis farinta pri li. Kaj frato Bernardo, vidante lin alvenanta, iris al li kaj sin ĵetis al liaj piedoj. Tiam sankta Francisko petis ke li stariĝu, kaj tre humile rakontis al li la penson kaj timon, kiujn li havis pri li kaj pri kiu Dio al li respondis; pro tio li tiel konkludis: «Mi ordonas al vi por sankta oboe, ke vi faru kion mi ordonos al vi». Timante frato Bernardo, ke sankta Francisko ordonu al li, kiel kutime, tro grandan aferon, honeste li volis esti liberata el tia oboe; pro tio li tiel respondis: «Mi estas preta fari vian obeon, se vi promesas al mi fari kion mi ordonos al vi»; kaj promesinte tion sankta Francisko, frato Bernardo diris: «Nun diru, patro, kion vi volas ke mi faru». Tiam sankta Francisko diris: «Mi ordonas al vi por sankta oboe ke, por puni mian malhumilecon kaj la maltimon de mia koro, nun kiam mi surdorse kuŝos min teren, vi surmetu unu piedon sur la gorĝon kaj la alian sur la buŝon, kaj tiel ke vi pasu trifoje el unu flanko al la alia dirante al mi honton kaj insulton; kaj precipe diru al mi: «Kuŝu, malĝentila filo de Petro Bernardoni; el kie venas al vi tiom da fiereco, dum vi estas hontinda kreitaĵo?» Tion aŭdinte frato Bernardo, kvankam estus por li tre penige tion fari, tamen por la sankta oboe, kiel eble plej ĝentile, plenumis tion, kion sankta Francisko estis al li ordoninta. Kaj tion farinte, sankta Francisko diris: «Nun ordonu vi al mi ĉion, kion vi volas ke mi faru; ĉar mi promesis al vi obeon». Diris frato Bernardo: « Mi ordonas al vi por sankta oboe, ke ĉiufoje, kiam ni estos kune, vi riproĉu min kaj korektu maldelikate miajn difektojn». Pri kio sankta Francisko tre mirigis; ĉar frato Bernardo havis tiom da sankteco, ke li havis por li grandan respekton, kaj konsideris lin riproĉinda pri nenio; kaj de tiam sankta Francisko zor-

gis ne resti kune kun li multfoje, pro la dirita obo, por ke nenian korektigan vorton oni diru al li, kiun li konis plena je tioma sankteco; sed kiam li deziregis vidi lin aŭ aŭdi lin paroli pri Dio, kiel eble plej rapide petis forpermeson kaj foriris, kaj vokis tre grandan piecon vidi kiom da karito kaj respekto kaj humileco sankta Francisko kiel patro uzis kaj per ili parolis kun frato Bernardo, sia unua filo. Por laŭdo kaj gloro de Jesuo Kristo kaj de la malriĉulo Francisko. Amen.

ĈAPITRO IV.

Kiel la anĝelo de Dio proponis problemon al frato Helio, gardanto de iu monaĥejo en Valo de Spoleto, kaj ĉar frato Helio arogante respondis al li, tiu foriris kaj iris al sankta Jakobo, kie trovis fraton Bernardon kaj al li rakontis tiun ĉi historion.

Dum la unua tempo kaj starigo de la Ordeno, kiam estis malmultaj fratoj, kaj ankoraŭ ili ne estis loĝantaj en monaĥejoj, sankta Francisko por sia pieco iris al sankta Jakobo de Galicio, kaj kondukis kun si kelkajn fratojn, unu el kiuj estis frato Bernardo; kaj irante kune, dum irado ili trovis ĉe iu lando malfeliĉan malsanulon, pri kiu havante kompaton li diris al frato Bernardo: «Filo, mi volas ke vi restu tie ĉi por servi tiun ĉi malsanulon»; kaj frato Bernardo humile genufleksiĝante kaj klinigante la kapon, ricevis la ordonon de la patro sankta kaj restis tie; kaj sankta Francisko kun la aliaj kunuloj iris al sankta Jakobo. Ili alvenis tien, kaj preĝante nokte en la preĝejo de sankta Jakobo, Dio inspiris al sankta Francisko ke li okupu multajn lokojn en la tuta mondo; ĉar la Ordeno devas pligrandiĝi kaj kreski en granda kvanto da fratoj, kaj post tiu inspiro sankta Francisko ekstarigis monaĥejojn en tiuj landoj. Kaj reveninte sankta Francisko laŭlonge la antaŭa vojo, li retrovis fraton Bernardon kaj la malsanulon, kun kiu li lin estis lasinta, kiu perfekte estis resaniĝinta; pro tio sankta Francisko permesis ke la venontan jaron frato Bernardo iru al sankta Jakobo, kaj tiel sankta Francisko revenis al la Valo de Spoleto; kaj li restis en senhoma loko kune kun frato Maseo kaj frato Helio kaj kun aliaj; kiuj ĉiuj multe zorgis por ne enui aŭ ĝeni sanktan Franciskon preĝanta, kaj tion ili faris pro la granda respekto, kiun ili havis al li, kaj ankaŭ ĉar ili sciis ke Dio inspiras grandajn aferojn dum la preĝado. Okazis foje ke, dum sankta Francisko preĝadis en la arbaro, bela junulo, preparita por marŝado, venis al la pordo de la monaĥejo; kaj tiel rapide kaj forte li longtempe frapadis, ke la fratoj tre mirigis pri tia nekutima maniero de frapado. Iris frato Maseo, kaj malfermis la pordon, kaj diris al tiu junulo: «El kie vi venas, filo, ĉar ŝajnas ke vi neniam venis antaŭe, tiel nekutime vi frapis?». Respondis la junulo: «Sed kiel oni devas frapi?». Diris frato Maseo: «Frapu trifoje, unu fojon post la alia malrapide; poste atendu tiom da tempo sufiĉa por ke la frato diru la *pater* nian kaj li venu al vi; kaj se dum tiu intertempo li ne venas, frapu denove». Respondis la junulo: «Mi devas rapidi, kaj tial mi forte frapas; ĉar mi devas fari longan vojaĝon, kaj mi venis tien ĉi por paroli al frato Francisko; sed nune li estaze estas en la arbaro kaj mi ne volas lin ĝeni. Sed iru kaj sendu al mi fraton Helion, ĉar mi volas proponi al li problemon, ĉar mi aŭdis ke li estas saĝa». Iras frato Maseo, kaj diras al frato Helio ke li iru al tiu junulo; kaj li sin skandalas kaj ne volas iri: pro tio frato Maseo nek scias kion fari, nek kion respondi al tiu, ĉar se li diras: frato Helio ne povas veni, li mensogas: se li diras, ke li maltrankviliĝis kaj ne volas veni, li timas doni al li malbonan ekzemplan. Kaj ĉar dume frato Maseo ne revenis, la junulo alian fojon frapis kiel antaŭe; kaj post malmulte da tempo frato Maseo revenis al la pordo kaj diris al la junulo: «Vi ne sekvis mian instruon pri la frapado». Respondis la junulo: «Frato Helio ne volas veni al mi; sed iru kaj diru al frato Francisko, ke mi venis por paroli kune kun li; sed pro tio ke mi ne volas ĝeni lin dum la preĝado, diru al li ke li sendu al mi fraton Helion». Tiam frato Maseo iris al sankta Francisko, kiu preĝis en la arbaro tenante la vizaĝon turniĝinta al ĉielo, kaj li diris la tutan deziresprimon de la junulo kaj la respondon de frato Helio; kaj tiu junulo estis la anĝelo de Dio en homa formo. Tiam sankta Francisko, nek ŝanĝante la

lokon, nek mallevigante la vizaĝon, diris al frato Maseo: «Iru kaj diru al frato Helio ke por obeo li iru tuj al tiu junulo». Aŭdinte frato Helio la ordonon de sankta Francisko, li, tute maltrankviliĝinta iris al la pordo, kaj per granda antaŭenpuŝo kaj bruo ĝin malfermis, kaj diris al la junulo: «Kion volas vi?». Respondis la junulo: «Ne estu, frato, maltrankvila, kiel vi ŝajnigas, ĉar la kolero konfuzigas la animon kaj ne permesas elkoni la veron». Diris frato Helio: «Diru kion vi volas de mi». Respondis la junulo: «Mi demandas al vi ĉu al tiuj, kiuj observas la sanktan evangelion estas permesate manĝi tion, kion oni metas antaŭ ilin, laŭ la diro de Kristo al siaj disĉiploj; kaj mi demandas al vi ankoraŭ ĉu al iu estas permesate meti antaŭ ilin kelkan aĵon kontraŭan al la evangelia libereco». Arogante respondis frato Helio: «Mi scias bone tion ĉi, sed mi ne volas respondi al vi: iru por viaj negocoj». Diris la junulo: «Mi scius pli bone ol vi respondi al tiu ĉi problemo». Tiam frato Helio, konfuzita, furioze fermis la pordon, kaj foriris. Poste li ekpensis pri la dirita problemo kaj dubis en si mem, kaj ne sciis ĝin solvi; ĉar li estis vikario de la Ordeno, kaj li estis ordoninta kaj farinta leĝon, post la Evangelio kaj post la Regulo de sankta Francisko, ke neniu frato de la Ordeno manĝu viandon, pro tio la dirita problemo estis precize kontraŭ li. Pro tio, ne sciante li mem, kaj ĉu konsiderante la humilecon de la junulo, ĉu ke tiu estis dirinta ke li estus solvonta la problemon pli bone ol li, li revenas al la pordo, ĝin malfermas por demandi al junulo pri la dirita problemo; sed tiu estis jam foririnta: ĉar la malhumileco de frato Helio igis lin ne inda paroli kun la anĝelo. Post tio, sankta Francisko, al kiu ĉio estis de Dio konatigita, revenis el la arbaro kaj laŭte riproĉis fraton Helion dirante: «Malbone vi faras, malhumila frato Helio, forpeli el ni la sanktajn anĝelojn, kiuj venas por nin instrui. Mi diras ke mi multe timas ke via malhumileco eksigos vin el tiu ĉi Ordeno». Kaj tiel poste okazis, kiel sankta Francisko antaŭdiris; ĉar li mortis for de la Ordeno. La saman tagon, la saman horon kiam tiu anĝelo foriris, li ekaperis en sama aspekto al frato Bernardo, kiu revenis el sankta Jakobo kaj estis ĉe la bordo de granda rivero kaj lin salutis dirante. «Dio donu al vi pacon, ho bona frato ». Tre mirigis frato Bernardo, kaj konsiderante la belecon de la junulo kaj la lingvon de sia patrolando, per la paca saluto kaj kun gaja vizaĝo li demandis lin: «El kie vi venas, bona junulo?». Respondis la anĝelo: «Mi venas el la loko kie loĝas sankta Francisko, kaj mi iris por paroli kun li; kaj mi ne povis, ĉar li estis en la arbaro por mediti la diajn aferojn, kaj mi ne volis ĝeni lin. Kaj ĉe tiu loko loĝas frato Maseo kaj frato Egidjo kaj frato Helio; kaj frato Maseo instruis min frapi la pordon same kiel la fratinoj, sed frato Helio, ĉar li ne volis respondi al problemo, kiun mi al li proponis, pentis kaj volis min aŭdi kaj min vidi kaj li ne povis». Post tiuj vortoj diris la anĝelo al frato Bernardo: «Kial vi ne transe pasas?». Respondis frato Bernardo: «Ĉar mi timas danĝeron pro la profundeco de la akvo, kiun mi vidas». Diris la anĝelo: «Transpasu ni kune, ne dubu»; kaj li prenis lian manon, kaj tre rapide translokigis lin sur la alia bordo de la rivero. Tiam frato Bernardo ekkonis ke li estas la anĝelo de Dio, kaj tute pie kaj ĝoje laŭte diris: «Ho benata anĝelo de Dio, diru al mi vian nomon». Respondis la anĝelo: «Kial vi demandas pri mia nomo, kiu estas mirindega?». Tuj post la anĝelo malaperis, kaj lasis fraton Bernardon tiom konsolita, ke li tutkontente daŭrigis la vojaĝon: kaj li rimarkis la tagon kaj la horon kiam la anĝelo estis al li aperinta. Kaj je la alveno ĉe la monaĥejo, kie estas sankta Francisko kun siaj kunuloj, li akurate ĉion rakontis; kaj ĉiuj konstatis ke tiu sama anĝelo tiun tagon kaj tiun horon aperis al ili kaj al li, kaj ĉiuj kune dankis Dion. Amen.

ĈAPITRO V

Kiel la sankta frato Bernardo el Asizo estis sendita de sankta Francisko al Bolonjo kaj tie li starigis monaĥejon.

Ĉar sankta Francisko kaj liaj kunuloj estis alvokitaj de Dio kaj elektitaj por porti per la koro kaj per la agoj kaj por prediki per la buŝo la krucon de Dio, ili ŝajnis kaj estis viroj kru-cumitaj laŭ la agoj kaj ankaŭ laŭ la vivo severa, kaj pro tio ili deziregis pli suferi honton kaj malestimon por la amo al Kristo, ol honorojn de la mondo aŭ respekton aŭ vanajn laŭdojn; anstataŭ ili ĝojis pri la insultoj kaj pri la honoroj malfeliĉiĝis; kaj tiel ili iris tra la mondo, kiel pilgrimantoj kaj fremduloj, portante kun si nur Kriston kru-cumita. Kaj ĉar ili estis veraj branĉoj de la vera vinberarbo, tio estas Kristo, ili produktis grandajn kaj bonajn fruktojn de la animoj, kiujn ili gajnis al Dio. Okazis dum la unua tempo de la Ordeno, ke sankta Fran-cisko sendis sanktan Bernardon al Bolonjo, por ke laŭ la favoro, kiun Dio donis al li, tie li faru fruktojn por Dio. Kaj frato Bernardo, kru-cosignante sin, por sankta obeo foriris kaj al-venis al Bolonjo. Kaj la knaboj vidante lin en nekutima kaj humilega vesto tre mokis lin kaj tre ofendis, kiel oni faras al frenezulo. Kaj frato Bernardo pacience kaj ĝoje ĉion suferis por la amo al Kristo; eĉ, por esti plie mokata, li intence restadis sur la placo de la urbo; kaj ĉar li tie sidiĝis, multaj knaboj kaj homoj ĉirkaŭe de li kuniĝis; kaj iuj tiris al li la kapuĉon malantaŭe, iuj antaŭe, aliaj ĵetadis al li polvon, kaj aliaj ŝtonojn, kelkaj premis lin de unu flanko kaj kelkaj de la alia; kaj frato Bernardo ĉiam la sama, kun la vizaĝo kontenta, neniam koleriĝis kaj neniam ŝanĝiĝis: kaj dum pliaj tagoj li al sama loko revenis por suferi samajn afe-rojn. Kaj, ĉar la pacienco estas perfektigo kaj elmonro de virto, klera leĝoscienculo, vidinte kaj konstatinte ke tiomaj firmeco kaj virto de frato Bernardo dum tiom da tagoj ne maltran-kviliĝis pro ĝeno kaj honto diris inter si: «Estas neeble ke tiu ĉi ne estu sankta viro». Kaj al-proksimiĝante al li, li tiel demandis: «Kiu vi estas? kaj kial vi venis tien ĉi?». Kaj frato Ber-nardo kiel respondo forprenis el la brustpoŝo la Regulon de sankta Francisko, kaj ĝin donis al li por ke li ĝin legu, kaj post kiam li ĝin legis, konsiderante lian perfektan staton de per-fekteco, kun granda timo kaj admiro sin turnis al la kunuloj kaj diris: «Vere tiu ĉi estas la plej granda stato de religieco, kiun mi neniam aŭdis; kaj pro tio tiu ĉi, kune kun siaj kunuloj, estas la plej sankta homo en la mondo, kaj tre grandan pekon faras tiu, kiu hontigas lin; kiun anstataŭ oni devus multe honori, ĉar li estas granda amiko de Dio». Kaj li diris al frato Ber-nardo: «Se vi volus ricevi loĝejon, en kiu vi povu pli bone servi Dion, mi por la sano de mia animo volonte donus al vi». Respondis frato Bernardo: «Sinjoro, mi opinias ke tion ĉi inspi-ris al vi nia sinjoro Jesuo Kristo; kaj pro tio vian oferdonon mi akceptas volonte por honoro al Kristo». Tiam tiu juĝisto kun granda ĝojo kaj karito kondukis fraton Bernardon ĉe sin; kaj poste li donis al li la lokon promesitan, kaj ĉion li aranĝis kaj plenumis je siaj elspezoj, kaj de nun li fariĝis patro kaj speciala defendanto de frato Bernardo kaj de liaj kunuloj. Kaj fra-to Bernardo, pro sia sankta konversacio, komencis esti tre honorata de la personoj, kaj ankaŭ feliĉa estis, kiu povis lin vidi kaj tuŝi. Sed li, kiel vera disĉiplo de Kristo kaj de la humila sankta Francisko, timante ke la honoro de la mondo malhelpu la pacon kaj la sanon de sia animo, foriris el tie kaj revenis al sankta Francisko, kaj diris al li: «Patro, la loko estas oku-pita en la urbo Bolonjo; sendu fratojn kiuj konservu ĝin kaj tie restu, ĉar ne pluan gajnon mi faris, male, pro la troa honoro, kiun oni faris al mi, mi timas ke mi estus perdonta pli ol gaj-

nonta ». Tial sankta Francisko, aŭdinte ĉion, kion Dio estis farinta per frato Bernardo, dankis Dion, kiu tiel komencis dissendi la malriĉajn disĉiplojn de la kruco; kaj poste li sendis kelkajn siajn kunulojn al Bolonjo kaj en Lombardion, kiuj okupis multajn lokojn en kelkaj landoj. Je laŭdo kaj respekto de la bona Jesuo.

ĈAPITRO VI.

Kiel sankta Francisko benis la sanktan fraton Bernardon kaj elektis lin sia vikario, kiam li alproksimiĝis al transpaso el tiu ĉi vivo.

Frato Bernardo estis plena de tiom da sankteco, ke sankta Francisko havis por li grandan respekton, kaj ofte li laŭdis lin. Foje al sankta Francisko pie preĝanta estis konatigite de Dio, ke frato Bernardo estus devigonta subteni pro dia volo multajn kaj dolorigajn batalojn kontraŭ la demonoj. Pro tio sankta Francisko, havante grandan kompaton al dirita frato Bernardo, kiun li amis kiel filon, multajn tagojn preĝis kun larmoj Dion por li, rekomdante lin al Jesuo Kristo, por ke li donu la venkon kontraŭ la demono. Kaj tiel preĝante sankta Francisko, Dio foje respondis al li: «Francisko, ne timu, ĉar ĉiujn tentojn, kiujn frato Bernardo suferos, Dio permesas por lia ekzerco kaj por krono de merito; kaj fine ĉiujn malamikojn li venkos, ĉar li estas unu el la gastoj de la regno de Dio». Post tiu respondo sankta Francisko havis grandan ĝojon, kaj dankis Dion; kaj de nun li havis por tiu ĉiam pligrandan amon kaj respekton. Kaj li bone montris ilin ne sole dum sia vivo, sed ankaŭ dum sia morto. Kiel patriarko Jakobo, alproksimiĝante al la morto, kaj ĉeestantaj plendoloraj ĉirkaŭ li liaj filoj plorantaj la foriron de tiel aminda patro, demandis: «Kie estas mia unua filo? Venu al mi, filo, por ke benu vin mia animo, antaŭ ol mi mortu», tial frato Bernardo kaŝe diris al frato Helio, kiu estis vikario de la Ordeno: «Patro, iru dekstren de la sanktulo, pro tio, ke li vin benu». Kaj sin metinte frato Helio dekstren, sankta Francisko, kiu estis fariĝinta blinda pro tro da larmoj, metis la dekstran manon sur la kapon de frato Helio, kaj diris: «Tiu ĉi ne estas la kapo de mia unua filo frato Bernardo». Tiam frato Bernardo alproksimiĝis al li je maldekstra flanko; kaj sankta Francisko krucigis la brakojn kaj metis la dekstran manon sur la kapon de frato Bernardo kaj la maldekstran sur la kapon de frato Helio, kaj diris al frato Bernardo: «Vin benu la Patro de nia sinjoro Jesuo Kristo per ĉiu spirita kaj ĉiela beno; ĉar vi estas la unua elektita en tiu ĉi sankta Ordeno por doni evangelian ekzemplon sekvi Kriston en la evangelia malriĉeco; ĉar ne sole vi donis viajn bienojn, kaj ilin tute disdonis kaj libere al la malriĉuloj por amo al Kristo; sed ankaŭ vi oferis vin mem al Dio en tiu ĉi Ordeno kiel ĉarma oferdono. Benata do estu vi de nia sinjoro Jesuo Kristo kaj de mi, malriĉa lia servisto, per eternaj benoj, irante, restante, maldormante, dormante, vivante, mortante. Kiu vin benas, estu plena de benoj, kaj kiu malbenos vin, ne restu sen puno. Estu la estro de ĉiuj viaj fratoj, al via ordono ĉiuj fratoj obeu; estu al vi permesate ricevi en tiu ĉi Ordeno kaj forpeli kiujn vi volos; kaj neniu frato estu superulo via, kaj estu al vi permesate iri kaj resti laŭ via volo». Post la morto de sankta Francisko la fratoj amis kaj respektis fraton Bernardon kiel respektindan patron; kaj kiam li alproksimiĝis al la morto, venis al li multaj fratoj el diversaj partoj de la mondo, inter kiuj venis tiu ĉiela kaj dia frato Egidjo, kiu kun granda ĝojo diris: «*Sursum corda*, frato Bernardo, *sursum corda*»; kaj frato Bernardo kaŝe diris al iu frato, ke li preparu por frato Egidjo lokon taŭgan por la medito, kaj tiel estis farite. Estante frato Bernardo en la lasta horo de la vivo, li igis levi sin kaj parolis al fratoj, kiuj estis antaŭ li, dirante: «Tre karaj fratoj, mi ne volas diri al vi multajn vortojn; sed vi devas konsideri, ke vi ankaŭ havas la religian staton, kiun mi havis, kaj mi trovas en mia animo, ke por miloj da mondoj al tiu ĉi egalaj mi ne volus ne esti servinta nian sinjoron Jesuon Kriston; kaj pri ĉiu ofendo, kiun mi faris, mi kulpigas min, kaj mi kulpigas min antaŭ mia savinto Jesuo kaj an-

taŭ vi. Mi petas vin, fratoj miaj tre karaj, ke vi amu vin unu la alian». Kaj post tiuj vortoj kaj aliaj admonoj, li rekuŝiĝis sur la liton, kaj lia vizaĝo fariĝis belega kaj eksterordinare ĝoja, pri kio ĉiuj fratoj tre mirigis; kaj dum tiu gajeco lia tre sankta animo, kronata je gloro, pasis el la nuna vivo al la feliĉa vivo de la anĝeloj. Je laŭdo kaj gloro de Kristo. Amen.

ĈAPITRO VII.

Kiel sankta Francisko faris grandan faston sur insulo de la lago de Peruĝa, kie fastis dum 40 tagoj kaj 40 noktoj, kaj li ne manĝis pli ol duono da bulko.

La veran serviston de Kristo, sinjoro sankta Francisko, ĉar en kelkaj aferoj li estis preskaŭ alia Kristo, donita al la mondo por la savo de la homoj, Dio patro volis en multaj agoj konforma kaj simila al sia filo Jesuo Kristo; kiel oni pruvas en la respektinda kolegio de la dekdu kunuloj kaj en la mirinda mistero de la sanktaj cikatroj kaj en la daŭriga fasto de la sankta granda fasto, kiun li jene faris. Estante foje sankta Francisko kiel gasto, iun tagon de la karnavalo, apud la lago de Peruĝa ĉe iu sia pia admiranto, li havis inspiron de Dio pasigi la grandan faston sur insulo de sama lago. Pro tio sankta Francisko petis tiun ĉi pian admiranton ke li, por la amo al Kristo, konduku lin per barketo sur

la insulon de la lago, kie neniu loĝas, kaj ke li faru ĉi tion la nokton de la tago de la cindroj, tiel ke neniu povu ekvidi. Kaj tiu, pro la granda admiro

al sankta Francisko, tuje plenumis lian deziron kaj lin transportis sur la diritan insulon: kaj sankta Francisko portis kun si ne pli ol du pecetoj da pano. Kiam ili alvenis en la insulon kaj la amiko sin preparis por reveni hejmen, sankta Francisko esprimis la deziron ke li ne malkaŝu al iu ke li estas tie kaj ke li venu ne pli frue ol la ĵaŭdon sanktan: kaj tion dirite tiu foriris. Kaj sankta Francisko restis sola; kaj ne estante iu loĝejo en kiun li povas sin direkti, li eniris en densan plektobarilon, kiun multaj dornoj kaj arboj aranĝis kiel kabaneton aŭ kuŝejon; kaj tie ĉi li komencis preĝadi kaj mediti pri la ĉielaj aferoj. Kaj tie li restis la tutan grandan faston ne trinkante kaj manĝante nur la duonon de unu el tiuj pecetoj da pano, laŭ trovis tiu admiranto la ĵaŭdon sanktan, kiam li revenis al li; kiu trovis el la du pecetoj da pano unu tuta kaj la alian duona. Kaj oni kredas ke la alian duonon sankta Francisko manĝis nur por respekto al fasto de Kristo benata, kiu fastis kvardek tagojn kaj kvardek noktojn ne manĝante ian materialan manĝaĵon. Kaj tiel per tiu duono da bulko li forpelis de si la vantcon, kaj laŭ l' ekzemplo de Kristo li fastis dum kvardek tagoj kaj kvardek noktoj. Poste en tiu loko, kie sankta Francisko tiel mirinde sin kondukis, Dio faris multajn miraklojn pro liaj meritoj; pro tio la homoj komencis konstrui domojn kaj ilin loĝi; kaj post ne multe da tempo oni konstruis belan kaj grandan kastelon, kaj estis monaĥejo, nomata la monaĥejo de la insulo; kaj ankaŭ la viroj kaj la virinoj havas grandan admiron por tiu loko, kie sankta Francisko plenumis tian grandan faston. Por laŭdo de Kristo. Amen.

ĈAPITRO VIII.

Kiel marŝante sankta Francisko, al frato Leono elmontris tiujn aferojn, kiuj estas perfekta ĝojo.

Foje dum la vintro, venante sankta Francisko el Peruĝa al Sankta Mario de la Anĝeloj kune kun frato Leono, la tre granda frosto terure lin dolorigis, li alvokis fraton Leonon, kiu marŝis iom antaŭe kaj tiel diris: «Frato Leono, kvankam la fratoj minoritoj en ĉiu lando donus grandan ekzemplon de sankteco kaj de bona edifo, tamen skribu kaj notu diligente ke ne estas tie perfekta ĝojo». Kaj daŭrigante la iradon sankta Francisko alvokas lin la duan fojon: «Ho frato Leono, kvankam la frato minorito donus la lumon al la blinduloj, sanigus la kriplulojn, forpelus la demonojn, donus la aŭdadon al la surduloj kaj la iradon al la lamuloj, la parolon al la mutuloj, kaj, kio estas mirindaĵo, revivigus la mortintojn post kvar tagoj, skribu, ke en tio ne estas perfekta ĝojo». Kaj post ne multe sankta Francisko laŭte krias: «Ho frato Leono, se frato minorito scius ĉiujn lingvojn kaj ĉiujn sciencojn kaj ĉiujn skribojn, tiel ke li povus profeti kaj malkovri ne nur la estontajn aĵojn, sed ankaŭ la sekretojn de la konsciencoj kaj de la animoj, skribu ke ne estas en tio perfekta ĝojo». Post ne multe ankoraŭ sankta Francisko laŭte alvokas: «Ho frato Leono, ŝafeto de Dio, kvankam frato minorito parolus per anĝela lingvo kaj konus la iradon de la steloj, la sanigajn kvalitojn de la kreskaĵoj kaj estus al li konatigataj ĉiuj trezoroj de la tero kaj li konus la emon de la birdoj kaj de la fiŝoj kaj de ĉiuj bestoj kaj de la homoj kaj de la arboj kaj de la ŝtonoj kaj de la radikoj kaj de la akvoj, skribu ke ne estas tie la perfekta ĝojo». Kaj ankoraŭ post longa tempo sankta Francisko laŭte alvokas: «Ho frato Leono, kvankam la frato minorito tiel bone predikus, ke li konvertus ĉiujn nekredemulojn al la fido de Kristo, skribu ke ne estas tie perfekta ĝojo». Kaj daŭrigante tiu ĉi parolmaniero dum du mejloj, irato Leono kun granda miro lin demandis kaj diris: «Patro, mi petas vin je nomo de Dio, ke vi diru al mi kie estas la perfekta ĝojo». Kaj sankta Francisko tiamaniere respondis al li: «Kiam ni alvenos al Sankta Mario de la Anĝeloj, tiel malsekigitaj de la pluvo kaj frostiĝintaj pro la malvarmo kaj malpurigitaj de la koto kaj dolorigita de la malsato, kaj ni frapos la pordon de la monaĥejo, kaj la pordisto kolere venos kaj diros: Kiu vi estas? Kaj ni diros: Ni estas du el viaj fratoj; kaj tiu diros: Vi ne diras la veron; male vi estas du friponoj, kiuj vagas trompante la mondon, kaj ŝtelante la almozojn de la malriĉuloj; foriru; kaj li ne malfermos al ni kaj li faros ke ni restu for en la neĝo, sub la akvo kun la malvarmo kaj kun la malsato eĉ dum la nokto, tiam, se tiomajn ofendojn kaj tiomajn kruelecojn kaj tiomajn forpelojn ni pacience eltenos sen protesto kaj ne murmurante pri li, kaj humile kaj karite ni pensos ke tiu pordisto vere nin konas kaj ke Dio faras ke li parolu kontraŭ ni, ho frato Leono, skribu ke tie estas perfekta ĝojo. Kaj se ni insistos frapante, kaj li kolere prezentiĝos ĉe la pordon kaj kiel ĝenigajn friponojn li nin per malĝentilaĵoj kaj per vangofrapoj forpelos dirante: «Foriru el ĉi tie, tre malnoblaj ŝtelistoj, iru al rifuĝejo, ĉar tie ĉi vi nek manĝos, nek loĝos», se ni tion ĉi pacience kaj ĝoje kaj amege eltenos, ho frato Leono, skribu ke tio ĉi estas perfekta ĝojo. Kaj se ni devigataj de la malsato kaj de la malvarmo kaj de la nokto eĉ plie frapos kaj alvokos kaj plorante ni petos por la amo al Dio, ke li malfermu kaj lasu nin interne, kaj tiu plej skandalita diros: Tiuj ĉi estas ĝenigaj friponoj; mi .pagos ilin laŭ iliaj meritoj kaj li eksteren venos kun nodplena bastono kaj li kaptos nin sur la kapuĉo kaj jetos nin teren kaj kunvolvos nin en la neĝo kaj senkompate frapos nin per

tiu bastono, se ni ĉiujn tiajn aferojn pacience kaj ĝoje suferos pensante al la doloroj de Kristo benata, kiujn ni devas suferi por la amo al li, ho frato Leono, skribu ke tie ĉi kaj en tio estas perfekta ĝojo; kaj pro tio aŭskultu la konkludon, frato Leono. Sur ĉiuj favoroj kaj donacoj de la Sankta Spirito, kiujn Kristo konsentas al siaj amikoj, estas la venko sur si mem kaj la volonta elteno de la penadoj, ofendoj kaj ĝenoj por la amo al Kristo; ĉar pri ĉiuj aliaj donacoj de Dio ni ne povas fanfaroni, ĉar ili ne estas niaj, sed de Dio; pro tio diras la Apostolo: Kio estas, kion vi ne ricevos de Dio? Kaj se vi tion ĉi de li ricevis, kial vi laŭdas vin, same kiel se de vi mem ilin vi ricevis? Sed en la kruco de la doloro kaj de la malfeliĉeco ni povas ĝojegi, ĉar tio ĉi estas tute nia kaj pro tio diras la Apostolo: Mi ne volas ĝoji nur en la kruco de nia sinjoro Jesuo Kristo». Al kiu estu ĉiam honoro kaj gloro in *saecula saeculorum*. Amen.

ĈAPITRO IX.

Kiel sankta Francisko instruis respondi al frato Leono, kiu ĉiam kontraŭdiris tion, kion sankta Francisko volis.

Foje dum la unuaj tempoj de la Ordeno estante sankta Francisko en iu loko kune kun frato Leono, kie ili ne havis librojn por legi la dian ofiĉojn, kiam alvenis la horo de la matutino, sankta Francisko diris al frato Leono: «Tre kara, ni ne havas brevieron per kiu ni povos diri la matutino; sed por pasigi la tempon laŭdante Dion, mi diros kaj vi respondos kiel mi vin instruos; kaj zorgu ne ŝanĝi la vortojn pri kiuj mi vin instruos. Mi tiamaniere diros: Ho frato Francisko, vi faris tiomajn malbonojn kaj tiomajn pekojn dum la vivo en la mondo, ke vi meritas la inferon; kaj vi, frato Leono, respondos: «Estas ĝuste ke vi meritu la profundan inferon». Kaj frato Leono per kolomba naiveco respondis: «Volonte, patro; komencu je nomo de Dio». Tiam sankta Francisko komencis diri: «Ho frato Francisko, tiomajn malbonojn vi faris kaj tiomajn pekojn dum la vivo en la mondo, ke vi meritas la inferon». Kaj frato Leono respondis: «Dio faros per vi tiomajn bonojn ke vi iros en paradizon». Diris sankta Francisko: «Ne diru tiel, frato Leono; sed kiam mi diros: Frato Francisko, multajn tre malindajn aferojn kontraŭ Dio vi faris, tiel ke vi estas inda de la dia malbeno, kaj tiel respondu: Vere vi estas inda esti metata inter malbenitoj». Kaj frato Leono respondas: «Volonte, patro». Tiam sankta Francisko kun multaj larmoj kaj sopiroj kaj frapoj sur la brusto, laŭte diris: «Ho sinjoro mia de l' ĉielo kaj de la tero, mi faris kontraŭ vi tiom da malbonaĵoj kaj tiom da pekoj, ke tute mi estas inda esti de vi malbenata». Kaj frato Leono respondas: «Ho frato Francisko, Dio faros vin tia, ke inter la benitoj vi estos speciale benata». Kaj sankta Francisko mirigis ke frato Leono respondas la kontraŭon de tio, kion li estis al li ordoninta, tiel li riproĉis lin dirante: «Kial vi ne respondas kiel mi vin instruas? Mi ordonas al vi por sankta obeo ke vi respondu kiel mi vin instruos. Mi diros tiel: Ho frato Francisko malbona, ĉu vi pensas ke Dio kompatos vin, dum vi faris tiom da pekoj kontraŭ la patro de la mizerikordoj kaj Dio de ĉiuj konsoloj, ke vi ne estas inda trovi mizerikordon? Kaj vi, frato Leono, ŝafo, respondos: «Neniel vi estas inda trovi mizerikordon». Sed post kiam sankta Francisko diris: Ho frato Francisko malbona, k.t.p. frato Leono tiel respondis: «Dio patro, kies mizerikordo estas senfina pli ol via peko, faros al vi grandan mizerikordon kaj sur ĝi li aldonos multajn favorojn». Je tia respondo sankta Francisko, dolĉe koleriĝinta kaj paciencie konfuzita, diris al frato Leono: «Kial vi pretendis agi kontraŭ la obeo, kaj jam multfoje vi respondis kontraŭ tio, kion mi ordonis al vi?». Tre humile kaj respektoplene frato Leono respondis: «Dio scias, patro mia, ke ĉiufoje mi intencis respondi laŭ via ordono, sed Dio paroligas min laŭ lia plaĉo kaj ne kiel plaĉas al mi». Pri kio sankta Francisko mirigis kaj diris al frato Leono: «Kore mi vin petas ke tiun ĉi fojon vi respondu kiel mi diris al vi». Respondas frato Leono: «Diru je nomo de Dio, certe tiun ĉi fojon mi respondos kiel vi volas». Kaj sankta Francisko plorante diris: «Ho frato Francisko malbona, ĉu vi pensas, ke Dio havu pri vi mizerikordon?». Respondis frato Leono: «Anstataŭ grandan favoron vi ricevos de Dio, kaj eterne laŭdegos kaj glorigos vin, ĉar kiu humiligas sin, tiu estos laŭdegata; kaj nenion alian mi povas diri, ĉar Dio parolas per mia buŝo». Kaj tiel en la daŭro de tiu ĉi disputo, kun multaj larmoj kaj spirita konsolo, ili maldormis ĝis la mateno. Je laŭdo de Kristo. Amen.

ĈAPITRO X.

Kiel frato Maseo, preskaŭ proverbante, diris al sankta Francisko ke la mondo lin sekvas, kaj li respondis, ke tio estas por konfuzi la mondon, kaj por favoro de Dio.

Loĝante foje sankta Francisko ĉe la monaĥejo de Porziuncola [Porciŭnkola] kune kun frato Maseo el Marignano [Marinjano] viro je granda sankteco, diskreteco kaj Dia favoro tiel ke sankta Francisko tre amis lin, tagon, revenante sankta Francisko el la arbaro, kie li preĝis, kaj ekforiĝinte el la arbaro, la dirita frato Maseo volis eksperimenti lin kiel li estas humila, kaj li iris renkonte al li, kaj kvazaŭ proverbante diris: «Kial al vi ? Kial al vi? Kial al vi?». Sankta Francisko respondis: «Kion vi volas diri?» Diris frato Maseo: «Mi diras, kial vin la tuta mondo sekvas, kaj ĉiu persono deziras vidi vin kaj aŭdi vin kaj obei vin? Vi ne estas bela viro en la korpo, vi ne estas je granda scienco, vi ne estas nobelo; kial do la tuta mondo vin sekvas?» Aŭdante tion ĉi sankta Francisko, tute ĝoja en sia spirito, turnante la vizaĝon al ĉielo, longatempe li restis kun la penso al Dio; kaj poste, revenante en si, li genufleksiĝis, kaj donis laŭdon kaj dankon al Dio: kaj poste kun granda spirita fervoro sin turnis al frato Maseo kaj diris : «Ĉu vi volas scii kial al mi? ĉu vi volas scii kial al mi? ĉu vi volas scii kial al mi la tuta mondo venas? Tio ĉi alvenas el tiuj okuloj de la tre alta Dio, kiuj ĉie vidas la bonulojn kaj la kulpulojn; ĉar tiuj tre sanktaj okuloj vidis inter la pekantoj neniun nek pli malnoblan nek pli nesufiĉan nek pli grandan pekanton ol mi; kaj tial por fari tian mirindan agon, kiun li intencas fari, li ne trovis pli malnoblan kreitaĵon sur la tero; kaj tial li elektis min por humiligi la nobelaron, kaj la fierecon kaj la forton kaj la belecon kaj la sciencon de la mondo ; por ke oni konu ke ĉiu virto kaj ĉiu bono elvenas de li kaj ne de la kreitaĵo, kaj ke neniu persono sin povu gloriigi antaŭ li; sed kiu sin glorigos, sin glorigu en la Sinjoro al kiu eterne apartenas ĉiu honoro kaj gloro». Tiam frato Maseo pro tiel humila respondo, tiel fervore dirita, teruriĝis kaj li certe konis ke sankta Francisko vere fondas sin en vera humileco. Je laŭdo de Kristo. Amen.

CAPITRO XI.

Kiel sankta Francisko igis, ke frato Maseo iru multfoje ĉirkaŭe, kaj poste li iris al Siena.

Foje sankta Francisko marŝante kune kun frato Maseo, la dirita frato Maseo iom antaŭeniris; kaj alvenintaj al trivojo, per kiu oni povas iri al Florenco, al Siena kaj al Arezzo [Areco], frato Maseo diris: «Patro, laŭ kiu vojo ni devas iri?». Respondis sankta Francisko: «Laŭ kiu Dio volos». Diris frato Maseo: «Kaj kiel ni povos koni la volon de Dio?» Respondis sankta Francisko: «Je la signalo, kion mi montros al vi; pro tio mi ordonas al vi, por la merito de la sankta obeo, ke ĉe tiu ĉi trivojo, en la loko kie vi staras, vi ĉirkaŭe turniĝu kaj returniĝu kiel faras la knaboj, kaj ne forlasu turniĝi ĝis kiam mi ne diros al vi». Tiam frato Maseo komencis ronde turniĝi; kaj tiom da fojoj li turniĝis, ke pro la kapoturno, kiu okazas pro tio, li kelkajn fojojn teren falis. Sed, ne dirante sankta Francisko ke li haltu, kaj volante fidele obei, li ree komencadis. Fine, kiam li tre rapide turniĝis, sankta Francisko diris: «Haltu kaj ne vin movu»; kaj li haltis kaj sankta Francisko demandis al li: «Al kiu flanko vi turnas la vizaĝon?» Respondis frato Maseo: «Je la flanko al Siena». Diris sankta Francisko: «Tiu estas la vojo, laŭ kiu Dio volas ke ni iru». Irante laŭ tiu vojo, Frato Maseo tre mirigis pri tio, kion sankta Francisko farigis al li, kiel la knaboj, antaŭ la sekularoj, kiuj preterpasis; tamen, por respekto, li ne havis kuraĝon ion diri al patro sankta. Alproksimiĝante ili al Siena, la popolo de la urbo, kiu jam estis aŭdinta la okazintaĵon de la sanktulo, venis lin renkonte, kaj por pieco portis lin kaj la kunulon ĝis la episkopejo, tiel ke ili tute ne tuŝis la teron per la piedoj. Dum sama horo kelkaj viroj el Siena estis batalantaj kune, kaj jam du el ili estis mortigitaj. Alveninte tien sankta Francisko, li tiel pie kaj tiel sankte predikis al ili, ke ĉiujn li rekondukis kune al la paco, al granda unuiĝo kaj interkonsento. Pro tio, aŭdinte, la episkopo de Siena tian agon farita de sankta Francisko, invitis lin ĉe si kaj lin ricevis kun granda honorigo dum tiu tago kaj ankaŭ dum la nokto. Kaj la sekvantan matenon sankta Francisko, vere humila, kiu en siaj agoj serĉis nur la gloron de Dio, frue ellitiĝis kun sia kunulo kaj foriris kaŝe el la episkopejo. Pri kio la dirita frato Maseo dum la vojo inter si mem murmuradis dirante: «Kion faris tiu ĉi bona viro, kiu turnigis min kiel knabo, kaj al episkopo, kiu tiom honorigis lin, eĉ bonan vorton li nek diris, nek lin dankis?». Kaj ŝajnis al frato Maseo, ke sankta Francisko maldiskrete sin kondukis. Sed poste pro dia inspiro revenante en si mem kaj ĝin riproĉante, li diris en sia koro: «Frato Maseo, vi estas tro malhumila, juĝante la diajn agojn kaj vi estas inda de la infero pro via ne diskreta fiereco; ĉar hieraŭ frato Francisko faris tiel sanktajn agojn, ke se ilin estus farinta la anĝelo de Dio, ili ne estus estintaj pli mirindaj. Pro tio se li ordonus al vi ke vi ĵetu la ŝtonojn, vi devus lin obei; ĉar tio, kion li faris dum la vojirado, okazis pro dia ordono, kiel pruvis la bona fino, kiu el tio sekvis; ĉar, se li ne estus repaĉiginta tiujn, kiuj interbatalis, ne nur multaj korpoj, kiel jam estis komencite, estus mortigitaj per tranĉilo, sed ankaŭ multajn animojn la diablo estus tirinta al infero; kaj pro tio vi estas tre stulta kaj malhumila, se vi murmuris pri tio, kio malkaŝe devenis el la volo de Dio». Kaj ĉiuj ĉi aferoj, kiujn frato Maseo diradis en sia koro dum la irado, estis de Dio konatigitaj al sankta Francisko. Pro tio sankta Francisko, alproksimiĝante al li, tiel diris: «Tiujn aferojn, kiujn vi nun pensas, konservu, ĉar ili estas bonaj kaj utilaj kaj de Dio inspiritaj: sed la unua murmurado, kiun vi faris, estis blinda kaj vana kaj fiera kaj ĝi estis en vin enmetita de la demono». Tiam frato Maseo klare konstatis, ke sankta Francisko konas la sekretojn de la koro, kaj li tute certe komprenas ke la spirito de la dia scienco direktas en ĉiuj liaj agoj la patron sanktan.

ĈAPITRO XII.

Kiel sankta Francisko metis fraton Maseon al servo de la pordo, de la almozo kaj de la kuirajo: poste, laŭ peto de la aliaj fratoj, lin forlevis.

Sankta Francisko, volante humiligi fraton Maseon, pro tio ke pro multaj donacoj kaj favoroj, kiujn Dio donis al li, li ne falu en ambicio, sed per la virto de la humileco ili ĉiam pli kreskigu, foje, kiam li loĝis ĉe senhoma loko kune kun tiuj unuaj kunuloj vere sanktaj, inter kiuj estis la dirita frato Maseo, antaŭ ĉiuj kunuloj diris al frato Maseo: «Ho frato Maseo, ĉiuj ĉi kunuloj havas la favoron de la intensiva preĝado; sed vi havas la favoron de la predikado de la parolo de Dio por kontentigi la popolon: kaj tial mi volas, por ke tiuj ĉi povu sin okupadi tute pri la preĝado, ke vi faru la oficon de pordisto kaj de kuiristo; kaj kiam la aliaj fratoj manĝos, vi manĝos ekster de la pordo; tiel ke al tiuj, kiuj venos al monaĥejo, antaŭ ol ili frapu, vi kontentigu ilin per kelkaj bonaj vortoj pri Dio; tiel ke ne estu necese ke iu alia foriru krom vi; kaj tion faru por la merito de sankta obeo». Tiam frato Maseo surtiris la kapuĉon kaj klinis la kapon; kaj humile ricevis la ordonon kaj daŭris en tiu ĉi obeo dum kelkaj tagoj, farante la diritajn oficojn. Pro tio la kunuloj, kiel viroj inspiritaj de Dio, eksentis en siaj koroj grandan riproĉon de konscienco konsiderante ke frato Maseo estas viro de granda perfekteco kiel ili aŭ pli, kaj por li estas nur la pezo de la monaĥejo kaj ne por ili. Tial ili kune havis kompaton kaj petis la patron sanktan, ke li havu la bonecon disdoni al ili tiajn oficojn; ĉar iliaj konsciencoj neniel povas permesi, ke frato Maseo suferu tiom da penadoj. Aŭdinte tion ĉi sankta Francisko cedis al iliaj konsiloj, kaj konsentis al ilia volo; kaj, alvokante fraton Maseon, tiel diris al li: «Frato Maseo, viaj kunuloj volas partopreni la oficojn, kiujn mi donis al vi kaj tial mi volas ke la diritajn oficojn oni dividu». Tre humile kaj pacience diris frato Maseo: «Patro, kion vi ordonas al mi, mi konsideras ordonita de Dio». Tiam sankta Francisko, konstatinte ilian kariton kaj la humilecon de frato Maseo, mirinde predikadis al ili pri la tre sankta humileco; instruante ilin ke ju pli grandajn donacojn kaj favorojn al ni donas Dio, des pli ni devas esti humilaj; ĉar sen la humileco neniu virto estas agrabla al Dio. Kaj post la prediko li disdonis la oficojn kun granda karito. Je laŭdo de Kristo. Amen.

ĈAPITRO XIII.

Kiel sankta Francisko kaj frato Paseo metis sur ŝtonon, ĉe iu fonto, la panon, kiun ili almoze ricevis, kaj sankta Francisko tre laŭdis la malriĉecon. Poste li preĝis Dion kaj sanktan Petron kaj sanktan Paŭlon por ke ili metu ilin en la amo al la sankta malriĉeco; kaj kiel aperis al ili sankta Petro kaj sankta Paŭlo.

La mirinda servanto kaj imitanto de Kristo, tio estas sinjoro sankta Francisko, por perfekte konformiĝi en ĉio al Kristo, kiu, laŭ la diro de la Evangelio, duope sendis siajn disĉiplojn al ĉiuj urboj kaj lokoj kien ili devas iri, post kiam laŭ la ekzemplo de Kristo li estis kuniginta dek-du kunulojn, tiel li duope dissendis ilin ĉien por prediki. Kaj por doni al ili ekzemplon de vera oboe, li unue komencis iri laŭ ekzemplo de Kristo, kiu antaŭ ĉio komencis agi ol instrui. Pro tio, asigninte al la kunuloj la aliajn partojn de la mondo, li prenante fraton Maseon kiel kunulon ekmarŝis al la provinco Francujo. Kaj ili, alveninte tagon al vilaĝo tre malsataj, komencis, laŭ la statuto, almozpeti panon por la amo al Dio; kaj sankta Francisko iris tra unu vojo, kaj frato Maseo tra ala. Sed, ĉar sankta Francisko estis viro mokata kaj malgranda je korpo kaj pro tio konsiderata de kiu lin ne konas malnobla almozpetanto, li ne ricevis pli ol kelkajn plenbuŝojn kaj pecetojn da malfreŝa pano. Sed frato Maseo, ĉar li estis viro granda kaj bela je korpo, ricevis multajn kaj bonajn grandajn pecojn kaj ankaŭ panon nerompitan. Post la kolektado, la du ree sin renkontis kune ekster de la vilaĝo en oportuna loko por manĝi, kie estis bela fonto kaj tute proksime estas bela longa ŝtono, sur kiu la du metis la almozon, kiun ili estis ricevintaj. Kaj vidante sankta Francisko, ke la pecoj de la pano de frato Maseo estis plimultaj kaj pli belaj kaj pli grandaj ol la siaj, li havis grandan ĝojon kaj tiel diris: «Ho frato Maseo, ni ne estas indaj de tiu ĉi tiel granda trezoro». Kaj, re-dirinte li pli foje tiujn ĉi vortojn, frato Maseo respondis: «Patro, kiel oni povas voki trezoro, kie estas tioma malriĉeco kaj manko de ĉiuj tiuj aferoj, kiuj estas bezonaj? Tie ĉi nek estas tablotuko, nek tranĉilo, nek tranĉtableto, nek telero, nek domo, nek tablo, nek servisto, nek servistino». Tiam sankta Francisko diris: «Tion ĉi mi konsideras granda trezoro, kie estas nenia afero preparita per la homa industrio; sed tio, kio estas, estas preparita de la dia karito, kiel oni klare vidas en la pano trovita, en la bela tablo el ŝtono kaj en la fonto tiel pura; kaj pro tio mi volas, ke ni preĝu Dion, ke la trezoron de la tiel nobla sankta malriĉeco, kiu havas Dion kiel serviston, amu ni tutkore». Kaj post kiam li diris tiujn ĉi vortojn kaj ili ambaŭ preĝis kaj manĝis kelkajn el tiuj pecoj da pano kaj trinkis akvon, ili stariĝis por marŝi al Francujo; kaj kiam ili alvenis al iu preĝejo, sankta Francisko diris al la kunulo: «Eniru ni en tiun ĉi preĝejon por preĝi». Kaj sankta Francisko tiam iras malantaŭ de la altaro, kaj komencas preĝi; kaj dum tiu preĝado li ricevis de la dia vizito tiel grandan fervoron, kiu flamigis tiel plene lian animon al la amo de la sankta malriĉeco, ke ĉu pro la koloro de la vizaĝo ĉu pro la oscedo de la buŝo, ŝajnis ke li forĵetu flamon de amo. Kaj venante li kiel bruliĝinta al sia kunulo, tiel diris al li: «Ha! ha! ha! frato Maseo, donu al mi vin mem». Kaj tiel trifoje li diris; kaj la trian fojon sankta Francisko per la spiraĵo aeren levis fraton Maseon, kaj ĵetis lin malproksime de si je la distanco de unu granda stango; pri kio frato Maseo multege mirigis, kaj poste li rakontis al siaj kunuloj ke dum tiu leviĝo kaj per la spira puŝigo, kiujn igis al li sankta Francisko, li sentis tiom da dolĉeco en la animo kaj tiom da konsolo de la sankta Spirito, ke neniam dum sia vivo tiom da ili li sentis. Kaj post kiam sankta Francisko estis farin-

te tion ĉi, li diris: «Tre kara kunulo, ni iru al sankta Petro kaj al sankta Paŭlo por preĝi ilin, por ke ili instruu kaj helpu nin posedi la nemezureblan trezoron de la tre sankta malriĉeco; ĉar ĝi estas tiel digna kaj tiel dia trezoro, ke ni ne estas indaj ĝin posedi en niaj malnoblecaj korpoj; ĉar tiu ĉi estas tiu ĉiela virto, per kiu ĉiajn terajn kaj transireblajn aferojn oni dispremas per la piedoj kaj per kiu ĉian baron kontraŭ la animo oni elprenas por ke la lasta povu unuiĝi kun la eterna Dio. Tiu ĉi estas tiu virto, kiu faras ke la animo dum sia surtera restado kunparolu kune kun la anĝeloj. Tiu ĉi estas la virto, kiu portis Kriston sur la krucon ; kune kun Kristo ĝi estis enterigita, kun Kristo ĝi reviviĝis, kune kun Kristo ĝi supreniris al ĉielo, kaj kiu, ankaŭ dum tiu ĉi vivo, donos al la animoj, kiuj enamiĝas je ĝi, ke ili povu facile flugi en ĉielon; ĉar ĝi enhavas la armilon de la veraj humileco kaj karito. Pro tio preĝu ni la tre sanktajn apostolojn de Kristo, kiuj perfekte amis tiun ĉi evangelian perlon, ke ili petu por ni al nia sinjoro Jesuo Kristo tiun ĉi favoron, por ke, per sia tre sankta kompato, li faru ke ni meritu fariĝi veraj amantoj, observantoj kaj humilaj disĉiploj de la tre multvalora kaj tre amata evangelia malriĉeco». Kaj tiamaniere parolante ili alvenis al Romo, kaj eniris en la preĝejon Sankta Petro; kaj sankta Francisko en unu angulo de la preĝejo kaj frato Masseo en alia, ili preĝis; kaj, post kiam ili longtempe preĝadis kun multaj larmoj kaj granda pieco aperis al sankta Francisko kun granda lumeco la sanktaj apostoloj Petro kaj Paŭlo, kiuj diris: «Pro tio ke vi demandas kaj deziras konservi tion, kion Kristo kaj liaj apostoloj konservis, nia sinjoro Jesuo Kristo sendas nin al vi por informi vin, ke via preĝo estas akceptita kaj ke Dio jam donis al vi kaj al via sekvantaro la tutan trezoron de la tre sankta malriĉeco. Kaj ankaŭ je lia nomo ni diras al vi ke, kiu ajn laŭ via ekzemplo sekvos perfekte tiun ĉi deziron, li estos certa pri la feliĉeco de la eterna vivo ; kaj vi kaj via sekvantaro estos benataj de Dio». Kaj post tiuj ĉi vortoj ili malaperis lasante sanktan Franciskon plena el konsolo. Tiu ĉi post la preĝo stariĝis kaj revenis al kunulo kaj al li demandis ĉu Dio estis ion konatiginta al li; kaj li respondis ke ne. Tiam sankta Francisko diris al li, ke la sanktaj apostoloj aperis al li, kaj kion ili konatigis al li. Pri kio ambaŭ decidis, plenaj el sankta ĝojo, reveni al la valo de Spoleto, forlasante la iradon al Francujo. Je laŭdo de Kristo. Amen.

ĈAPITRO XIV.

Kiel dum sankta Francisko estis parolanta kune kun la fratoj pri Dio, tiu aperis inter ili.

Foje sankta Francisko, dum la komenco de la Ordeno, kolektis ĉiujn siajn kunulojn en iu loko por paroli pri Kristo, kaj en fervoro de spirito li ordonis al unu el ili, ke je nomo de Dio li malfermu sian buŝon kaj parolu pri Dio laŭ la inspiro de la sankta Spirito. Plenuminte la frato la ordonon kaj mirinde parolinte pri Dio, sankta Francisko silentigis lin kaj ordonis la samon al alia frato. Obeinte tiu kaj tre akurate parolinte pri Dio, li silentigis lin kaj ordonis al tria ke li parolu pri Dio. Tiu same tiel profunde parolis pri la sekretaj diaj aferoj, ke tute certe sankta Francisko ekkonis ke li kiel la aliaj parolis per la sankta Spirito. Tio ankaŭ manifeste sin montris per certa signo: ĉar dum tia parolado ekaperis inter ili, en ŝajnigo de tre bela junulo, Kristo benata, kiu, benante ĉiujn, ilin plenigis el tiom da dolĉeco, ke ĉiuj estaziĝis kaj restis kiel mortintoj, nenion aŭdante pri tiu ĉi mondo. Poste ili revenis en si mem, kaj tiam sankta Francisko diris al ili: «Fratoj miaj karaj, danku Dion, kiu volis per la buŝo de la naivuloj malkovri la trezorojn de la dia scienco; ĉar Dio estas tiu, kiu malfermas la buŝon al la mutuloj kaj la langojn de la naivuloj klare li paroligas». Je lia laŭdo. Amen.

ĈAPITRO XV.

Kiel sankta Klaro manĝis kune kun sankta Francisko kaj kune kun liaj kunfratoj en Sankta Mario de la Anĝeloj.

Kiam sankta Francisko estis en Asizo, ofte li vizitis sanktan Klaron por doni al ŝi instruojn. Kaj tre dezirante ŝi manĝi unu fojon kun li, kaj tion multfoje ŝi petinte, li neniam volis doni al ŝi tian konsolon. Pro tio liaj kunuloj, komprenante la deziron de sankta Klaro, diris al sankta Francisko: «Patro, al ni ŝajnas ke tiu malkonsento ne estu laŭ la dia karito, ĉar vi ne kontentigas fratino Klaron, tiom sankta virgino al Dio ŝatata, en tiel malgranda afero, kiel estas la manĝo kune kun vi; kaj konsiderante ke ŝi per via predikado forlasis la riĉecojn kaj la pompojn de la mondo. Kaj vere se ŝi demandus al vi pligrandan favoron ol tiu ĉi, vi devus ĝin doni al via spirita kreskaĵo». Tiam sankta Francisko respondis: «Ĉu ŝajnas al vi, ke mi kontentigu Sin?». Kaj la kunuloj: «Jes, patro; estas inda ofero, ke vi donu al ŝi tian konsolon». Tiam sankta Francisko diris: «Ĉar ŝajnas al vi, ŝajnas ankaŭ al mi. Sed por ke ŝi estu pli konsolata, mi deziras ke tiun manĝon oni faru ĉe sankta Mario de la Anĝeloj; ĉar ŝi restis longtempe en sankta Damiano; tiel ke helpos ŝin la revido de la monaĥejo de sankta Mario, kie ŝi estis kaphartondita kaj kie ŝi fariĝis mistika edzino de Jesuo Kristo; kaj tie ni manĝos kune je nomo de Dio. Alveninte do la tago por tio ordonita, sankta Klaro foriras el la monaĥejo kune kun unu kunulino, kaj, akompanata de la kunuloj de sankta Francisko, ŝi alvenas al sankta Mario de la Anĝeloj; kaj, post kiam ŝi salutis la virginon Marion antaŭ ŝia altaro kie ŝi estis kaphartondita kaj kie ŝi ricevis la vualon, oni kondukis ŝin viziti la monaĥejon ĝis kiam alvenis la horo de la tagmanĝo. Kaj sankta Francisko, kiel kutime, preparigis la oportunajn necesojn sur la nuda tero. Kaj je la horo de la tagmanĝo sankta Francisko sidiĝis kune kun sankta Klaro, unu el la kunuloj de sankta Francisko sidiĝis kune kun la kunulino de sankta Klaro, kaj poste ĉiuj la aliaj kunuloj humile alproksimiĝis al la preparita manĝejo. Kaj kiel unua manĝaĵo sankta Francisko komencis priparoli pri Dio tiel dolĉe, tiel alte kaj tiel mirinde ke, malsuprenveninte sur ĉiuj la sufiĉego de la dia favoro, ĉiuj estaziĝis en Dio. Kaj dum ili restis en estazo kun la okuloj kaj kun la manoj leviĝintaj al ĉielo, la homoj de Asizo kaj de Betono kaj tiuj de la ĉirkaŭaĵoj vidis ke sankta Mario de la Anĝeloj kaj la tuta monaĥejo kaj la arbaro ĉe ĝi ege brulas; kaj ŝajnis ke estas granda fajrego, kiu okupas la preĝejon kaj la monaĥejon kaj la arbaron kune. Pro tio la Asizanoj rapide alkuris tien por estingi la fajron, kredante certe ke ĉio brulu. Sed alveninte ili al monaĥejo kaj konstatinte neĝon brulanta, ĉiuj eniris kaj trovis sanktan Franciskon kune kun sankta Klaro kaj kun la tuta gekunularo estaze sin turnantaj al Dio, kaj sidiĝantaj ĉirkaŭ tiu humila manĝejo. Pro tio ili komprenis, ke tiu estis dia fajro kaj ne natura, kiun Dio mirakle ŝajnis tia por prui kaj signifi la fajron de la dia amo, kies estis plenaj la animoj de tiuj sanktaj fratoj kaj sanktaj monaĥinoj; pro tio ili revenis kun granda konsolo kaj sankta edifo en siaj koroj. Poste, post longa tempo, revenis en si mem sankta Francisko kaj sankta Klaro kaj ankaŭ la aliaj, kaj, sentante sin bone konsolitaj per la spirita manĝaĵo, malmulte sin okupis pri la korpa manĝaĵo. Kaj tiel ili finis tiun benitan tagmanĝon, kaj sankta Klaro, bone akompanita, revenis al S. Damiano. La monaĥinoj, vidante ŝin, havis grandan ĝojon, ĉar ili timis ke sankta Francisko estus sendinta ŝin estri iun alian monaĥinejon kiel okazis al monaĥino Agnezo, sankta ŝia fratino, kiun sankta Francisko jam sendis esti kiel abatino al monaĥinejon en Montiĉeli en

Florenco; kaj, sankta Sankta Francisko kelkfoje estis dirinta al sankta Klaro: «Pretigu vin, okaze ke ni sendu vin al kelka monaĥinejo»; kaj ŝi kiel filino de la sankta obo, estis respondinta: «Patro, mi estas ĉiam preta iri al kiu ajn loko, kien vi sendos min». Kaj pro tio la monaĥinoj ĝojegis, kiam ili rehavis ŝin; kaj sankta Klaro restis de nun tre konsolata. Je laŭdo de Kristo. Amen.

ĈAPITRO XVI.

Kiel sankta Francisko ricevis la konsilon de sankta Klaro kaj de sankta frato Silvestro, ke li predikante konvertu multajn homojn; kaj li predikis al la birdoj kaj kvietigis la hirundojn.

La humila servanto de Dio sankta Francisko malmulte da tempo post sia konvertiĝo, kuniĝinte jam multajn kunulojn, kaj ricevinte ilin en la Ordenon, havis grandan pripenson kaj grandan dubon pri tio, kion li estus devonta fari, ĉu sin priokupi nur pri la preĝado, ĉu kelkfoje prediki; kaj pri tio li tre deziris koni la dian volon. Kaj ĉar la humileco, kiu estis en li, ne lasis lin fanfaroni pri si kaj pri siaj preĝoj, li pensis serĉi la dian volon per la preĝoj de la aliaj. Pro tio li alvokis fraton Maseon kaj diris al li: «Iru al sankta Klaro kaj diru al ŝi je mia nomo, ke ŝi kune kun kelkaj el la pli preĝemaj kunulinoj pie preĝu Dion, ke li bonvolu montri la pli-bonon: ĉu ke mi zorgu prediki, ĉu ke mi nur preĝu. Kaj poste iru al frato Silvestro kaj diru al li la samon». Tiu ĉi estis en la mondo tiu sinjoro Silvestro, kiu estis vidinta oran krucon foriri el la buŝo de sankta Francisko, kiu estis longa ĝis la ĉielo kaj larĝa ĝis la randoj de la tero. Frato Silvestro havis tiom da pieco kaj tiom da sankteco, ke ĉion, kion li demandis al Dio, li ricevis kaj ofte kun Dio li parolis; kaj pro tio sankta Francisko havis pri li la plej bonan opinion. Iris frato Maseo, kaj laŭ la ordono de sankta Francisko, li faris la demandon unue al sankta Klaro kaj poste al frato Silvestro. Tiu ĉi kiam ricevis ĝin tuj komencis preĝi, kaj preĝante li havis la dian respondon kaj revenis al frato Maseo kaj tiel diris: «Tion ĉi Dio diras, ke vi diru al frato Francisko ke Dio vokis lin en tiu ĉi vivmaniero ne nur por li mem, sed ankaŭ por ke li kolektu frukton de animoj, kaj por ke multaj per li trovu la savon». Post kiam frato Maseo ricevis tiun ĉi respondon, revenis al sankta Klaro por koni tion, kion ŝi estis petinta al Dio; kaj ŝi respondis, ke ŝi kaj la aliaj kunulinoj estis ricevintaj de Dio la saman respondon, kiun ricevis frato Silvestro. Post tio frato Maseo revenas al sankta Francisko; kaj sankta Francisko lin ricevis kun granda karito lavante liajn piedojn kaj preparante por li ion por manĝi. Kaj post la manĝo sankta Francisko alvokis fraton Maseon al la arbaro, kaj tie ĉi antaŭ li genufleksiĝis, kovris sian kapon per la kapuĉo, krucigis sur la brusto la brakojn kaj demandis al li: «Kion ordonas ke mi faru mia sinjoro Jesuo Kristo?». Respondis frato Maseo: «Ĉu al frato Silvestro, ĉu al fratino Klaro kaj al kunfratinoj Kristo respondis kaj montris ke sia volo estas, ke vi trairu tra la mondo por prediki, ĉar li ne elektis vin por vi sola, sed por la savo de la aliaj». Tiam sankta Francisko, post kiam aŭdis tiun ĉi respondon kaj konis per ĝi la Kristan volon, stariĝis kun granda fervoro kaj diris: «Iru ni je nomo de Dio»; kaj li prenas kun si kiel kunulojn fraton Maseon kaj fraton Anĝelon, sanktaj viroj. Ili tutfervore iris ne pripensante nek pri vojo nek pri baroj, kaj ili alvenis al iu kastelo nomata Savorgnano [Savornjano], kaj sankta Francisko komencis prediki kaj antaŭ ĉio ordonis al la hirundoj, kiuj kantis, ke ili silentigu dum li predikas; kaj la hirundoj lin obeis. Kaj tie li tiel fervore predikis, ke ĉiuj viroj kaj virinoj de tiu kastelo volis por pieco lin sekvi kaj forlasi la kastelon. Sed sankta Francisko ne permesis dirante al ili: «Ne estu rapidemaj kaj ne foriru; kaj mi ordonos tion, kion vi devos fari por la savo de viaj animoj». Kaj tiam li pensis starigi la trian Ordenon por la universala savo de ĉiuj animoj. Poste li foriris lasante tiun personamason tre konsolita kaj tre ema al la pento; kaj li alvenis inter Armanon kaj Bevnagnon [Bevanjon]. Kaj transpasante kun tiu fervoro, li levis la okulojn kaj vidis laŭ la vojo kelkajn arbojn, sur kiuj estas senfina kvanto da birdoj; pro tio sankta Francisko mirigis kaj

diris al la kunuloj: «Atendu min tie ĉi sur la vojo dum mi iras prediki al miaj fratoj birdoj ». Kaj li eniris en la kampon kaj komencis prediki al la birdoj, kiuj estis sur la tero; kaj tiuj, kiuj estis sur la arboj venis al li kaj kune kun la aliaj kviete restis dum sankta Francisko daŭrigadis la predikon; eĉ post la fino ili restis ĝis kiam li donis al ili sian benon. Kaj, laŭ la posta diro de frato Maseo al frato Jakobo el Massa, neniu el ili ŝin movis eĉ kiam sankta Francisko, marŝante inter ili, ilin tuŝis per la vesto. La temo de la prediko de sankta Francisko estis jena: «Fratoj miaj birdoj, vi estas tre devigataj al Dio, via kreinto, kaj ĉiam kaj ĉie vi devas lin laŭdi, ĉar li donis al vi la liberecon ĉien flugi, ankaŭ li donis al vi la duoblan kaj trioblan veston; poste, ĉar li konservis vian rason en la noea kestoŝipo pro tio ke via raso ne malaperu el la mondo: ankaŭ vi estas al li devigataj por la aero, kiun li preparis por vi. Krom tio vi ne semas kaj vi ne falĉas la rikolton; kaj Dio satigas vin kaj li donas al vi la riverojn kaj fontojn por trinki, kaj li donas al vi la montojn kaj la valojn por via rifuĝejo, kaj la altajn arbojn por fari viajn nestojn kaj, kvankam vi nek scias ŝpini nek kudri, Dio vestas vin kaj viajn filojn; pro tio multe vin amas la kreinto, ĉar li donas al vi tiomajn bonfarojn, tial zorgu, fratoj miaj, ne fali en la pekon de la nedankemeco, sed ĉiam zorgu laŭdi Dion». Dirinte sankta Francisko tiujn ĉi vortojn, ĉiuj tiuj birdoj komencis malfermi la bekojn, longigi la kolojn, malfermi la flugilojn kaj riverence klinigi la kapojn ĝis la tero, kaj per movadoj pruvi ke la vortoj de la patro sankta donis al ili tre grandan ĝojon. Kaj sankta Francisko kune kun ili ĝojegis kaj amuziĝis kaj tre mirigis pri tioma kvanto da birdoj kaj pri ilia tre bela diverseco kaj pri iliaj atenteco kaj familiareco; pro tio li en ili pie laŭdis la kreinton. Fine, post la plenumo de la predikado, sankta Francisko ilin krucoŝignis, kaj donis al ili la permeson foriri; kaj tiam are ĉiuj tiuj birdoj fluge sin levis tra la aero kun mirindaj kantoj: kaj poste, laŭ la kruco, kiun ŝignis por ili sankta Francisko, ili sin dividis en kvar grupoj: unu grupo flugis al oriento kaj la alia al okcidento, la tria al sudo, kaj la alia al nordo, kaj ĉiu grupo mirinde daŭrigadis la kanton; tio signifis ke, ĉar sankta Francisko, heroldo de la kruco de Kristo, estis predikinta al ili, kaj super ili li estis farinta la signon de la kruco, laŭ tiu signo ili sin dividis kantante por iri al la kvar flankoj de la mondo; tiel la predikado de la kruco de Kristo, renovigita per sankta Francisko, okazos per li kaj per liaj fratoj, kiel faris la birdoj, ne posedante ion en tiu ĉi mondo, nur en la mano de Dio metante sian vivon. Je laŭdo de Kristo. Amen.

ĈAPITRO XVII.

Kiel infano frateto, dum sankta Francisko nokte estis preĝanta, vidis Kriston kaj la Virginon Marion kaj multajn sanktulojn kunparoli kun li.

Infano, tre pura kaj senkulpa, estis ricevita en la Ordeno dum la vivo de sankta Francisko; li loĝis en malgranda monaĥejo, en kiu la fratoj por neceseco dormis tre proksime unu la alia. Foje vespere sankta Francisko venis al dirita monaĥejo, li frue enlitiĝis por povi nokte ellitiĝi por preĝi, kiel kutime, kiam la aliaj fratoj dormas. La dirita infano decidis zorge spioni sanktan Franciskon por koni lian sanktecon, kaj precipe por scii kion li faras dum la nokto kiam li ellitiĝas. Kaj por ke la dormemo ne trompu lin, tiu ĉi infano kuŝis flanke de sankta Francisko kaj ligis sian ŝnuron kun tiu de sankta Francisko, por ekvidi kiam li ellitiĝas; kaj pri tio sankta Francisko nenion rimarkis. Sed la nokton dum la unua dormo, kiam ĉiuj la aliaj fratoj dormis, sankta Francisko ellitiĝas kaj trovas sian ŝnuron tiel ligita; li tiel delikate ĝin malligis, ke la infano nenion ekvidis; kaj sankta Francisko iris sola al la arbaro, kiu estis proksime de la monaĥejo, kaj eniris en kabaneton, kiu estis tie kaj komencis preĝi. Post kelka tempo la infano vekiĝis kaj trovinte la ŝnuron malligita kaj sanktan Franciskon jam ellitiĝinta, tuj ellitiĝis por lin serĉi; kaj trovinte la pordon malfermita, tra kiu oni povas iri al la arbaro, li pensis ke sankta Francisko iris tien, kaj pro tio li eniris en la arbaron. Kiam li alvenis ĉe la lokon kie sankta Francisko preĝis, ekaŭdis grandan konversacion; kaj alproksimiĝinte plie por aŭdi kion li diradis, li vidis mirindan lumon, kiu ĉirkaŭis sanktan Franciskon, kaj en ĝi li vidis Kriston kaj la virginon Marion kaj sanktan Johanon Baptiston kaj la Evangeliistojn kaj grandan aron da anĝeloj, kiuj parolis kune kun sankta Francisko. Vidinte ĉi tion la infano svene falas teren; poste, kiam la mistero de tiu sankta aperado finis, kaj sankta Francisko revenis al monaĥejo, li trovis laŭ la vojo la infanon kuŝanta kiel mortinto, kaj komplete prenis lin sur siaj brakoj kaj remetis lin sur la liton, kiel faras bona paŝtisto por sia ŝafido. Kaj post kiam li sciis de li ke li estis vidinta la diritan vizion, li ordonis ke li ne parolu pri tio kun neniu dum lia vivado. La infano poste, kreskinte en la dia favoro kaj en piegeco al sankta Francisko, fariĝis klera viro en la Ordeno; kaj nur post la morto de sankta Francisko li malkaŝis al la fratoj la diritan vizion. Je laŭdo de Kristo. Amen.

ĈAPITRO XVIII.

Pri la mirinda kunveno, kiun faris sankta Francisko ĉe sankta Mario de la Anĝeloj, kie ĉeestis pli ol kvin mil fratoj.

La tre fidela servanto de Kristo, sinjoro sankta Francisko, faris foje ĝeneralan kunvenon ĉe sankta Mario de la Anĝeloj, al kiu kunveno partoprenis pli ol kvin mil fratoj; kaj venis ankaŭ sankta Domeniko, estro kaj fondinto de la Ordeno de la fratoj predikistoj, kiu tiutempe iris de Burgonjo al Romo. Li aŭdinte pri la alvoko por la kunveno, kiun sankta Francisko faros en la ebenaĵo de sankta Mario de la Anĝeloj, kun sep fratoj de sia Ordeno aliris por ĝin vidi. Ĉe la dirita kunsido ĉeestis ankaŭ kardinalo tre sindona al sankta Francisko, al kiu la lasta profetis ke li fariĝos papo, kaj tio okazis. Tiu kardinalo venis eksprese de Peruĝo, kie estis la kortego, al Asizo. Kaj ĉiutage li venis por viziti sanktan Franciskon kaj liajn kunfratojn, kaj kelkfoje li kantis la meson, kelkfoje predikis al ĵa tuta kunfrataro: kaj tiu kardinalo, kiam venis por viziti tian sanktan kolezion, havis grandan ĝojon kaj piegecon. Ĉar en tiu ebenaĵo ĉe sankta Mario de la Anĝeloj la fratoj grupe sidiĝis, tie ĉi kvardek, tie ducent, tie tricent kune, ĉiuj okupataj nur por priparoli pri Dio kaj por preĝi; kaj ili pasigis la tempon en granda silento kaj kun tiom da modesteco, ke tie oni nenian bruon aŭdis, eĉ nenian brueton; la kardinalo mirigis pri tiu granda amaso tiel ordigita, kaj kun larmoj kaj granda piegeco diradis: «Vere tiu ĉi estas la kampo kaj la armeo de la kavaliroj de Kristo». Oni ne aŭdis, en tioma kvanto da personoj iun rakontanta fabelojn aŭ burleskaĵojn; sed ĉie, kie kuniĝis grupo da fratoj, ili ĉu preĝis, ĉu diris la ofiĉon, ĉu ploris siajn pekojn kaj tiujn de siaj bonfarantoj, ĉu interparoladis pri la sano de la animo. Kaj estis en tiu kampo tegmentoj el plektaĵo kaj el mato, malsimilaj je formo laŭ la diversaj provincoj de la fratoj, kaj tial tiu kampo estis nomata kampo de la plektaĵoj aŭ de la matoj. Iliaj litoj estis la ebena tero, kaj kelkaj havis nur iom da pajlo: la kapkusenoj estis ĉu ŝtonaj, ĉu lignaj. Pro tio kiu ajn aŭdis kaj vidis ilin, tiu havis tiom da amo al ili, kaj tioma estis la famo de ilia sankteco, ke el la kortego de la papo, kiu tiam estis en Peruĝo, kaj el aliaj vilaĝoj de la Valo de Spoleto venadis multaj grafoj, baronoj kaj kavaliroj kaj aliaj ĝentilaj viroj kaj plebanoj kaj kardinaloj kaj episkopoj kaj abatoj kun aliaj pastroj por vidi tiun tiel sanktan kaj grandan kaj humilan kunvenon, kiun la mondo neniam vidis. Kaj precipe oni alvenis por vidi la estron kaj tre sanktan patron de tioma sankta popolamaso, kiu estis ŝtelinta al la mondo tiel belan kaptajon kaj kuniginta tiel belan kaj pian ŝafaron por ke ĝi sekvu la vojon de la respektiginta paŝtisto Jesuo Kristo. Kiam la tuta kunvenantaro estis kuniĝinta, la sankta patro de ĉiuj kaj ĝenerala ministro sankta Francisko, en fervoro de spirito proponas la parolon pri Dio, kaj li laŭte predikas al ĉiuj tion, kion la Sankta Spirito paroligas al li; kaj kiel temon de la prediko li proponis tiujn vortojn: «Miaj filoj, grandajn aferojn ni promesis al Dio; sed pli grandaj estas la promesoj de Dio al ni. Observu ni tion, kion ni promesis; kaj atendu ni la promesojn al ni faritajn. Mallonga estas la ĝojo de la mondo, sed la puno, kiu ĝin sekvas, estas eterna. Malgranda estas la puno de tiu ĉi vivo, sed la gloro de la alia vivo estas senfina». Kaj pri tiuj ĉi vortoj tre pie predikante, li konsolis kaj konvinkis la fratojn al la obeo kaj respekto al la sankta patrino la Eklezio, al la fratamo, al la preĝo por la tuta popolo, al la pacienco en la malfeliĉecoj kaj modereco en la feliĉecoj, al la konservo de la anĝela ĉasteco, al la paco kaj interkonsento kun Dio kaj kun la homoj kaj kun sia konscienco, al la amo kaj al la plenumo de la tre sankta malriĉeco. Kaj tie

ĉi li diris: «Mi ordonas al vi ĉiuj, kiuj estas tie ĉi kunvenintaj, ke por merito de la sankta oboe neniu el vi sin priokupu pri nenio nek por manĝi, nek por trinki, nek por la necesajoj de la korpo, sed nur sin okupu pri la preĝo kaj pri la laŭdo al Dio, kaj la priokupon por via korpo lasu tute al li, ĉar li speciale sin okupas pri vi». Kaj ĉiuj tutkontente akceptis tiun ĉi ordonon. Kaj post la fino de la prediko de sankta Francisko, ĉiuj ekpreĝis. Pri kio sankta Domeniko, kiu ĉeestis ĉiujn ĉi aferojn, mirigis pri la ordono de sankta Francisko, kaj li juĝis ĝin maldiskreta, ne povante li pensi kiel tioma kvanto da personoj povas vivi, sen ia zorgo pri la necesaj bezonoj pri la vivo. Sed la ĉefa paŝtisto, Kristo benata, volis montri kiel li pri-zorgas pri siaj ŝafoj kaj kiel li amas siajn malriĉulojn; kaj tuje inspiris la loĝantojn en Peruĝo, en Spoleto, en Fuligno, [Fulinjo] en Spelo kaj en Asizo kaj en la ĉirkaŭaĵoj, ke ili portu ion por manĝi kaj trinki al tiu sankta kunvenantaro. Kaj jen venas el la diritaj lokoj homoj kun azenoj, ĉevaloj, ĉaroj ŝarĝitaj de pano, vino, faboj, fromaĝo kaj aliaj bonaj mangaĵoj laŭ la bezono de la malriĉuloj de Kristo. Krom tio ili portis tablotukojn, potojn, telerojn, glasojn kaj aliajn vazojn, kiuj bezonas al tiom da personoj. Kaj feliĉa sin estimis tiu, kiu pli da aĵoj povas porti kaj pli zorge servi; kaj ankaŭ la kavaliroj, la baronoj kaj la aliaj homoj, kiuj venis por vidi, servis tre humile kaj tre pie. Pro tio sankta Domeniko, vidinte tiujn ĉi aferojn kaj klare koninte ke Dio agas en ili, humile konstatis ke false li juĝis la ordonon de sankta Francisko; kaj pro tio li genufleksiĝis antaŭ li kaj humile konfesis sian kulpon kaj aldonis; «Vere Dio speciale zorgas por tiuj ĉi sanktaj malriĉuloj kaj mi tion ne sciis; kaj de nun mi promesas konformiĝi al la sankta evangelia malriĉeco: kaj mi malbenas je nomo de Dio ĉiujn monaĥojn de mia Ordeno, kiuj zorgas por havi propraĵojn». Tial sankta Domeniko estis tre kortuŝita de la fido de sankta Francisko kaj de la oboe kaj de la malriĉeco de tiel granda kaj ordigita kunveno, de la dia helpo kaj de la granda sufiĉego de ĉiu bono. En tiu sama kunveno oni informis sanktan Franciskon ke multaj fratoj portas pentofarilon sur la karnoj kaj ferajn ringegojn; pro tio multaj el ili malsaniĝis kaj kelkaj mortis kaj multaj ne povas libere preĝi. Pri kio sankta Francisko, kiel diskreta patro, ordonis por sankta oboe ke, kiu ajn havas pentofarilon aŭ feran ringegon, li levu ĝin kaj metu ĝin antaŭ si. Kaj tiel oni faris, kaj ĉirkaŭ kvincent ferajn pentofarilojn kaj plie da ferajn ringegojn oni povis kalkuli; tiel ke poste oni faris grandan monteton, kaj sankta Francisko ilin lasigis tie. Post la fino de la kunveno sankta Francisko, konsolinte ĉiujn kaj instruinte ilin kiel ili devas sin konservi sen pekoj en tiu ĉi malbonega mondo, per la dia beno kaj la sia, al iliaj provincoj li resendis ĉiujn, konsolitaj per spirita ĝojo. Je laŭdo de Kristo. Amen.

ĈAPITRO XIX.

Kiel el la vinberejo de iu pastro en Rieti, ĉe kiu sankta Francisko preĝis, pro la kvanto da personoj, kiuj venis al li, estis forportitaj ĉiuj vinberaroj ; kaj poste ĝi mirakle produktis pli da vino ol antaŭe, kiel sankta Francisko estis promesinta; kaj kiel Dio revelaciis al sankta Francisko ke li iros en paradizon.

Foje kiam sankta Francisko estis tre malsana je la okuloj, sinjoro Ugolino, kardinalo protektanto de la Ordeno, pro la granda kompatemo, kiun li havis por li, skribis al li por ke li iru al Rieti, kie estas tre kleraj okulkuracistoj. Tiam sankta Francisko, post kiam li ricevis la leteron, iris al sankta Damiano, kie estas sankta Klaro, tre pia edzino de Kristo, por doni al ŝi kelkan konsolon kaj poste por iri al kardinalo. La sekvantan nokton, kiam sankta Francisko estis tie, plimal saniĝis tiel, ke li tute ne povis vidi la lumon. Ne povante li foriri el tie, sankta Klaro aranĝis por li kabaneton el kanoj, en kiu pli oportune li ripozu. Sed sankta Francisko, ĉu pro la doloro de la malsaneco, ĉu pro la granda kvanto da musoj, kiuj multe ĝenis lin, tute ne povis ripozi nek tage nek nokte. Kaj suferinte dum pliaj tagoj tiujn ĝenon kaj suferon, li komencis pensi kaj konstati ke tiu estas puno de Dio permesata pro siaj pekoj, kaj li komencis tutkore danki Dion laŭte dirante: «Sinjoro mia, mi estas inda suferi tion kaj plie. Sinjoro mia, bona paŝtisto, kiu al ni pekantoj vi montris vian kompaton en multaj korpaj punoj kaj doloregoj, donu favoron kaj forton al mi, via ŝafo, por ke pro neniam malsaneco kaj malĝojego kaj doloro mi ne malproksimiĝu el vi». Post kiam li tiel preĝis, voĉo el ĉielo diris: «Francisko, respondu al mi: Se la tuta tero estus el oro, kaj ĉiuj maroj kaj fontoj kaj riveroj estus balzamo, kaj ĉiuj montoj, montetoj kaj ŝtonoj estus multkostaj ŝtonoj: kaj vi trovus alian trezoron pli nobla ol tiuj ĉi aferoj, tiel kiel la oro estas pli nobla ol la tero, kaj la balzamo ol la akvo kaj la multkostaj ŝtonoj ol la montoj kaj la ŝtonoj, kaj tiun ĉi pli noblan trezoron oni donus al vi por via malsaneco; ĉu vi ne estus kontenta kaj ĝoja?». Respondis sankta Francisko: «Sinjoro mi ne esta inda posedi tiel multkoston trezoron» Kaj la dia voĉo diris al li: «Ĝoju, Francisko, ĉar tiu estas la trezoro de eterna vivo, kiun mi konservas por vi kaj de nun ĝi estas via, kaj tiu ĉi malsaneco kaj malĝojego estas garantiaĵo de tiu feliĉega trezoro». Kaj tiam sankta Francisko alvokis la kunulon kaj pro la granda ĝojego pri tiu glora promeso, li diris: «Iru ni al Kardinalo»; kaj li, doninte konsoligajn vortojn al sankta Klaro, humile petis al ŝi forpermeson, kaj ekmarŝis al Rieti. Kaj kiam li estis apud la urbo, granda popolamaso renkonte venis al li, tiel ke li ne volis eniri en la urbon, sed iris al preĝejo, kiu estas proksime de la urbo preskaŭ du mejlojn. Kiam la urbanoj sciis ke li estis en tiu preĝejo, are kuris por lin vidi, kaj dume la vinberejo de tiu preĝejo tute difektiĝis kaj la vinberaroj estis forprenitaj. Pri kio la pastro tre plendis en si mem kaj pentis esti ricevinta en sian preĝejon sanktan Franciskon. Dio revelaciis al sankta Francisko la penson de la pastro, pro tio li alvokis lin kaj al li diris: «Tre kara patro, kiom da mezuroj da vino donas al vi po jaro tiu ĉi vinberejo kiam ĝi plibone donas?» La alia respondis: «Dek-du mezurojn». Diris sankta Francisko: «Mi petas vin, patro, ke vi pacience toleru mian restadon dum kelkaj tagoj, pro tio ke mi trovas tie ĉi grandan ripozon, kaj lasu ke ĉiu persono prenu vinberarojn el tiu ĉi via vinberejo por la amo al Dio kaj al mi malriĉulo; kaj mi promesas al vi je nomo de mia Sinjoro Jesuo Kristo, ke ĝi la nunan jaron donos al vi dudek mezurojn da vino». Kaj sankta Francisko intencis resti tie por la granda frukto por la animoj, kiun li konstatis, pro tio ke multaj

foriris plenaj el dia amo, kaj ili forlasis la mondon. La pastro konfidis je la promeso de sankta Francisko, kaj libere lasis la vinberejon al tiuj, kiuj venas. Mirindaĵo! La vinberejo estis tute difektita tiel ke restis apenaŭ kelkaj vinberoj. Venas la tempo de la vinrikolto, kaj la pastro rikoltas tiujn vinberojn, metas ilin en la tinon kaj subpremas; kaj laŭ la promeso de sankta Francisko, li plenigis dudek mezurojn da vino. Per tiu miraklo klare oni vidas ke, kiel pro la merito de sankta Francisko la senvestigita vinberejo donis bonan rikolton, tiel la kristana popolo sen ia virto pro la peko, per la merito kaj la dia scienco de sankta Francisko ofte repleniĝas per bonaj fruktoj de pento. Je laŭdo de Kristo. Amen.

ĈAPITRO XX.

Pri tre bela vizio, kiun vidis juna frato, kiu ekabomenis la monaĥan robon, kaj kiu estis ema demeti ĝin kaj ekŝiĝi el la Ordeno.

Tre nobela kaj delikata junulo venis al la Ordeno de sankta Francisko. Li, post kelkaj tagoj, pro la tento de la demono, komencis tiel abomeni la monaĥan robon, kiun li survestis, ke ĝi ŝajnis al li abomeninda ĉifono; li hontis pri la manikoj, pri la kapuĉo, kaj la longeco kaj la malglateco ŝajnis al li neportebla pezo. Kaj, pligrandiĝinte ankaŭ la malplezuro pri la monaĥeco, li fine decidis forlasi la Ordenon kaj reveni en la mondon. Li kutimis, laŭ la instruo de sia instruanto, kiam li pasis antaŭ la altaro de la monaĥejo, en kiu oni konservas la korpon de Kristo, tre pie genufleksiĝi kaj surtiri la kapuĉon kaj kun la brakoj krucigitaj kliniĝi. Okazis ke tiun nokton, dum kiu li devis foriri kaj forlasi la Ordenon, li pasis antaŭ la altaro de la monaĥejo; kaj li, pasante, laŭ la kutimo genufleksiĝis kaj kliniĝis. Kaj tuje li havis estazon kaj Dio montris al li mirindan vizon; ĉar li vidis pasi antaŭ si preskaŭ senfina kvanto da sanktuloj duope procesie pasantaj kaj ĉiuj survestitaj per tre belaj kaj multkostaj roboj, kaj iliaj vizaĝoj kaj manoj brilis kiel la suno, kaj ili pasis tra anĝelaj kantoj kaj sonoj; inter tiuj sanktuloj estis du plibele vestitaj kaj ornamitaj ol ĉiuj aliaj, kaj la du estis ĉirkaŭataj de tiom da lumeco, ke kiuj ilin rigardis restis mirigitaj, kaj preskaŭ je la fino de la procesio, li vidis iun ornamita de tiom da gloro, ke li ŝajnis novkavaliro pli honorigita ol la aliaj. Tiu junulo vidinte tian vizon, mirigis, sed ne konis ĝian signifon. kaj ne havis kuraĝon demandi pri ĝi. Kiam la tuta procesio pasis, li farinte al si kuraĝon kuris al la lastaj kaj timeme demandas ilin dirante: «Ho tre karuloj, mi petas ke vi bonvolu diri al mi, kiuj estas tiuj du miregindaj, kiuj estas en tiu ĉi rava procesio». Respondis ili: «Sciu, filo, ke ni estas fratoj minoritoj, kiuj estas en la gloro de la paradizo». Kaj la alia demandas: «Kiuj estas tiuj du, kiuj brilas pli ol la aliaj?». Respondas ili: «Tiuj estas sankta Francisko kaj sankta Antono; kaj la lasta, kiun vi vidas tiel honorigita estas sankta kunfrato, kiu nun mortis; pro tio ke li kuraĝe batalis kontraŭ la tentoj kaj daŭrigis ĝis la fino, nun ni triumfe kondukas lin al la gloro de la paradizo; kaj tiujn ĉi vestaĵojn, kiuj nin ornamas, donis al ni Dio kiel ŝanĝon de la maldelikataj roboj, kiujn ni pacience survestis en la Ordeno; kaj la glora brilo, kiun vi vidas en ni, estis de Dio al ni donita pro la humileco kaj pacienco kaj pro la sankta malriĉeco kaj obeo kaj ĉasteco, kiujn ni konservis ĝis la fino. Kaj pro tio, filo, ne estu al vi ĝene porti la tiel fruktodonan monaĥan robon, ĉar se per la vesto de sankta Francisko vi malestimos la mondon por la amo al Kristo kaj vi humiligos la karnon, kaj kontraŭ la demono vi kuraĝe batalos, vi havos kiel ni similan veston kaj gloran briladon». Kaj post kiam ili diris tiujn ĉi vortojn, la junulo serioze pripensis kaj, konsolita de la vizio, forpelis el si ĉiun tenton kaj konis sian kulpon antaŭ la gardanto kaj la aliaj kunfratoj; kaj de nun li deziris la maldolĉecoj, de la pento kaj de la roboj, kaj en granda sankteco li finis la vivon en la Ordeno. Je laŭdo de Kristo. Amen.

ĈAPITRO XXI.

Pri la tre sankta miraklo farita de sankta Francisko, kiam li konvertis la lupon el Gubjo.

Kiam sankta Francisko loĝis en la urbo Gubjo, en la ĉirkaŭaĵo aperis granda lupoj, terura kaj kruelega, kiu ne sole manĝegis la brutojn, sed ankaŭ la homojn; pro tio ĉiuj urbanoj tre timegis, ĉar ofte ĝi alproksimiĝis al la urbo; kaj tiuj, kiuj foriris el ĝi, estis ĉiam devigataj porti kun si armilojn, kiel ili irus por batali; kaj tamen oni ne povis sin defendi solaj kontraŭ ĝi. Kaj post kelka tempo neniu estis tiom kuraĝa foriri el la urbo. Pro tio sankta Francisko havis multan kompaton pri la kamparanoj kaj volis foriri el la urbo kvankam la urbanoj tute malkonsilis lin; kaj li sin krucoŝignis kaj foriris el la urbo kune kun siaj kunfratoj tute me-tante sian fidon en Dio. La aliaj dubis plie antaŭeniri kaj sankta Francisko marŝis sola al la loko kie estas la lupoj. Kaj jen ke la urbanoj, kiuj venis por vidi tian miraklon, konstatas ke la lupoj kun la buŝo malfermata renkontiĝas kun sankta Francisko; kaj alproksimiĝante al ĝi sankta Francisko krucoŝignas ĝin kaj ĝin al si alvokas kaj tiel diras: «Venu tien ĉi, frato lupoj, mi ordonas al vi je nomo de Kristo ke vi danĝeru nek min, nek aliajn personojn». Mirinde! tuj post kiam sankta Francisko faris la signon de la kruco, la teruriga lupoj fermis la buŝon, kaj haltis; kaj post la ordono ĝi malsovaĝe venis kiel ŝafido kaj kuŝiĝis ĉe la piedoj de sankta Francisko. Tiam sankta Francisko tiel parolas al ĝi: «Frato lupoj, vi multe danĝeras tiujn ĉi lokojn, kaj vi faris multajn malbonfarojn vundante kaj mortigante la kreitaĵojn de Dio sen lia permeso; kaj ne sole vi mortigis kaj manĝis la bestojn, sed ankaŭ vi kuraĝis mortigi la homojn, kiuj estas farataj je simileco de Dio; pro tio vi estas inda de la eŝafodo kiel malbonega ŝtelisto kaj mortiginto; kaj ĉiuj krias kaj murmuras pri vi, kaj la tuta lando estas via malamiko. Sed mi volas, frato lupoj, porti la pacon inter vi kaj la aliaj; kondiĉe ke vi ne plu ofendu ilin, kaj ili pardonu vin pri ĉiuj pasintaj ofendoj, kaj nek homoj nek hundoj plu vin persekutu». Post kiam li diris tiujn ĉi vortojn, la lupoj per movoj de la korpo kaj de la vosto kaj de la oreloj kaj klinigante la kapon montris akcepti tion, kion sankta Francisko estis dirinta, kaj voli ĝin observi. Tiam sankta Francisko diris: «Frato lupoj, ĉar plaĉas al vi fari kaj konservi tiun ĉi pacon, mi promesas ke mi donigos al vi la necesajn manĝaĵojn, ĝis kiam vi vivos, tiel ke vi ne plu suferos la malsaton. Sed, ĉar mi havigos al vi tiun ĉi favoron, mi volas, frato lupoj, ke vi promesu al mi, ke vi neniam plu danĝeros la homojn kaj la bestojn: ĉu vi promesas tion ĉi? Kaj la lupoj klinigante la kapon donis videblan signon de promeso. Kaj sankta Francisko diris: «Frato lupoj, mi volas ke vi certigu min pri tiu ĉi promeso, por ke mi povu bone kredi kaj etendinte sankta Francisko la manon por ricevi la certigan signon, la lupoj levis la antaŭan dekstran piedon, kaj afable ĝin metis sur la manon de sankta Francisko, donante tiun certigan signon, kiun ĝi povis. Kaj tiam sankta Francisko, diris: «Frato lupoj, mi ordonas al vi je nomo de Jesuo Kristo, ke vi venu kun mi sen ia hezito, kaj ni iru konkludi tiun ĉi pacon je l' nomo de Dio». Kaj la lupoj obeeme iras kune kun li kiel bona ŝafido, pri kio la urbanoj tre mirigis. Kaj tiun novaĵon tuje oni konis en la tuta urbo; tiel ĉiuj, viroj kaj virinoj, plenaĝuloj kaj junuloj alvenas sur la placon por vidi la lupojn kun sankta Francisko. Kaj post kiam la tuta popolo estis tie kuniĝinta, stariĝis sankta Francisko, kaj al ĝi predikis dirante, inter aliaj aferoj, kiel pro la peko Dio permesas tiajn danĝerojn, «kaj tro pli danĝeriga estas la flamo de la infero, kiu devas je eterne daŭri por la kondamnitaj, ol la furoro de la lupoj, kiu povas mortigi nur la korpon: kiom pli oni devas timi la buŝon de la infero, kiam

tiom da popolamaso terure timas la buŝon de malgranda besto! Revenu do, tre karaj, al Dio kaj faru penton por viaj pekoj, kaj nuntempe Dio liberigos vin de la lupo, kaj estonte de la infera fajro». Kaj post kiam sankta Francisko finis la predikon, aldonis: «Aŭdu, fratoj miaj: frato lupo, kiu estas tie ĉi antaŭ vi, tute promesis al mi kaj ĵuris paciĝi kun vi kaj neniam plu ofendi vin en kio ajn se vi promesas al li ke vi ĉiutage donos la necesajojn; kaj mi estas garantianto por li ke la packontrakton ĝi firme eltenos». Tial unuvoĉe la tuta popolo promesis daŭrige ĝin nutri. Kaj sankta Francisko antaŭ ĉiuj diris al la lupo: «Ĉu, frato lupo, vi promesas elteni la packontrakton, kaj ofendi nek la homojn, nek la bestojn, nek iun kreitaĵon?» Kaj la lupo genufleksiĝas kaj klinigas la kapon, kaj per malsovaĝaj movoj de la korpo kaj de la vosto kaj de la oreloj elmontras, kiel estas eble, voli elteni ĉiun packontrakton. Diras sankta Francisko: « Frato lupo, mi volas ke, kiel vi promesis al mi elteni tiun ĉi promeson for el la urbopordo, tiel antaŭ la tuta popolo vi redonu al mi la promeson ke vi ne trompos min pri la garantieco, kiun mi faris kun vi». Tiam la lupo, levante la dekstran piedon, metis ĝin en la manon de sankta Francisko. Tial pro tiu ĉi kaj pro la aliaj suprediritaj agoj estis tiom da ĝojo kaj admiro tra la tuta popolo, ke pro la piemeco al sanktulo kaj pro la mirindeco de la miraklo kaj pro la paco de la lupo, ĉiuj laŭte ekkriadis laŭdante kaj benante Dion, kiu al ili sendis sanktan Franciskon, kiu per siaj meritoj ilin liberigis el la buŝo de la krueliga besto. Kaj poste la dirita lupo vivis du jarojn en Gubjo; kaj ĝi familie eniris en ĉiujn domojn ne danĝerante iun kaj ne ricevante de iu danĝeron; kaj la loĝantoj nutradis ĝin; kaj dum ĝi disiradis, neniam iu hundo bojis kontraŭ ĝi. Fine post du jaroj frato lupo pro maljuneco mortis; pro tio la urbanoj multe plendis, ĉar vidante ke ĝi tiel malsovaĝe iradis tra la urbo, plibone rememoris la virton kaj la sanktecon de sankta Francisko. Je laŭdo de Kristo. Amen.

ĈAPITRO XXII.

Kiel sankta Francisko malsovaĝigis la sovaĝajn turtojn.

Foje junulo estis kaptinta multajn turtojn, kaj li portis ilin por vendi. Sankta Francisko, kiu ĉiam havis specialan kompaton al la bonaj bestoj, lin renkontis kaj kompateme rigardante tiujn turtojn, diris al la junulo: «Ho bona junulo, mi petas vin ke vi donu ilin al mi, kaj ke tiel senkulpaj birdoj, al kiuj la Sankta Skribo komparas la ĉastajn kaj humilajn kaj fidelajn animojn, ne falu en manon de la malbonuloj, kiuj ilin mortigos». Tiu, enspirita de Dio, tuj donacis ilin ĉiujn al sankta Francisko; kaj li ricevante ilin ame komencis paroli: «Fratinoj miaj, turtinetoj miaj naivaj, senkulpaj kaj ĉastaj, kial vi lasas ke oni vin kaptu? jen nun mi volas vin savi el la morto kaj fari por vi la nestojn, por ke vi fruktodonu kaj multiĝu laŭ la ordono de via Kreinto». Kaj sankta Francisko faras por ĉiuj la neston. Kaj ili, uzante ilin, komencis fari la ovojn kaj la idojn antaŭ la monaĥoj, kaj tiel intimece ili vivis kun sankta Francisko kaj kun la aliaj kunfratoj, kiel se ili estus kokinoj ĉiam nutritaj de ili. Kaj neniam ili foriris, ĝis kiam sankta Francisko per sia beno donis al ili la permeson foriri. kaj al la junulo kiu ilin estis donacinta sankta Francisko diris: «Filo, ankaŭ vi estos frato en tiu ĉi Ordeno, kaj tre fervore vi servos Jesuon Kriston». Kaj tiel okazis; ĉar la dirita junulo monaĥiĝis kaj vivis en la Ordeno kun granda sankteco. Je laŭdo de Kristo. Amen

ĈAPITRO XXIII.

Kiel sankta Francisko liberigis kunfraton, kiu estis en peko kun la demono.

Preĝante foje sankta Francisko en la monaĥejo de la Porziuncola [Porciŭnkola] vidis per dia inspiro la tutan monaĥejon ĉirkaŭita kaj sieĝita de la demonoj, kiel granda militistaro. Sed neniu el ili povis eniri en la monaĥejon, ĉar tiuj fratoj havis tioman sanktecon, ke la demonoj havis neniun en kiun eniri. Sed tiel daŭrigante, foje unu el tiuj fratoj sin skandalis pri alia, kaj en si mem li pensis kiel kulpigi lin kaj sin venĝi pri li. Pro tio, ĉar tiu ĉi tiel malbone pensis, la demono, havante la pordon malfermita, eniris en la monaĥejon kaj kuŝiĝis sur la kolo de tiu frato. Vidinte tion la pia kaj vigla paŝtisto, kiu ĉiam gardadis ĝian ŝafaron, ke la lupo estis enirinta por manĝegi lian ŝafon; tuje al si alvokigis tiun fraton, kaj ordonis al li ke tuj li elmontru la venenon de la malamo elpensita kontraŭ la proksimulo, pro kiu malamo li estas en la manoj de la malamiko. Tiu, ekkoninte ke la patro sankta estis kompreninta, iĝis timanta, kaj la tutan venenon kaj la tutan malamon malkovris, kaj rekonis sian kulpon kaj humile demandis la pekopunon, kaj post kiam tion ĉi li faris, li estis absolvita pri la peko kaj ricevis la pekopunon; pro tio la demono antaŭ sankta Francisko tuj forkuris; kaj la kunfrato, liberigita el la manoj de la kruela besto pro la boneco de la bona paŝtisto, dankis Dion; kaj reenirinte en la ŝafaron de la sankta paŝtisto, li vivis en granda sankteco. Je laŭdo de Kristo. Amen.

ĈAPITRO XXIV.

Kiel sankta Francisko konvertis al la fido la Sultanon de Babilonio.

Sankta Francisko, puŝita de la fervoro por la fido al Kristo kaj de la deziro por la martireco, foje alvojaĝis trans la maro kune kun dek-du siaj tre sanktaj kunuloj por iri rekte al Sultano de Babilonio. Kaj kiam ili alvenis al iu loko de la Saracenoj, kie gardis iaj kruelaj viroj por ke neniu kristano, kiu pasas, povu sin savi kaj estu mortigata; kiel plaĉis al Dio ili ne estis mortigitaj, sed kaptitaj, batitaj kaj ligitaj, ili estis kondukitaĵoj antaŭ la Sultano. Kaj antaŭ li sankta Francisko, inspirita de la Sankta Spirito, tiel fervore pri la fido al Kristo antaŭ la Sultano predikis, ke por ĝi eĉ li estus enirinta en la fajron. Pro tio la Sultano komencis havi grandan emon al li ĉu pro la firmeco de lia fido, ĉu pro la malestimo al la mondo, kiun li vidis en li; ĉar nenium donacon li volis ricevi kiel malriĉulo; eĉ ankaŭ pro la deziro al martireco, kiun li vidis en li. Kaj de tiam la Sultano volonte lin aŭskultis, kaj petis ke ofte li revenu al li, libere permesante al li kaj al liaj kunuloj ke ili prediku kie plaĉas al ili. Kaj li donis al ili signon, per kiu ili ne povu de iu esti ofendataj. Do, kiam sankta Francisko ricevis tiel liberan permeson, li tiujn siajn elektitajn kunulojn duope sendis al diversaj partoj de la Saracenoj por prediki la fidon de Kristo: kaj li kune kun unu el ili elektis iun lokon, al kiu alveninte, li eniris en gastejon por ripozi. Kaj tie estis virino tre bela je korpo, sed malpurega en la animo, kiu, malbenata, demandis lin por peko. Kaj sankta Francisko diris: «Mi konsentas, enlitiĝu ni»; kaj ŝi kondukis lin en ĉambrom. Diris sankta Francisko: «Venu kun mi»; kaj ŝin li kondukis apud tre granda fajro, kiu estis en tiu ĉambro, kaj en fervoro de spirito li nude senvestiĝis kaj sin ĵetis apudege de la fajro je la flanko pli bruliganta; kaj li ŝin invitis ke ŝi senvestigu kaj kuŝu kune kun tia lito plumoplana kaj bela, kaj sankta Francisko tiamaniere longatempe restis kun ĝoja vizaĝo, kaj nek brulis, nek bruniĝis je la haŭto; pro tia miraklo tiu virino ektimigis kaj pentita en sia koro, ne sole ŝi pentis pri la peko kaj la malbona intenco, kaj perfekte konvertiĝis al la fido de Kristo kaj fariĝis je tiom da sankteco, ke dank' al ŝi en tiu lando multaj animoj sin savis. Fine sankta Francisko konstatinte ke li ne povas atingi plian frukton en tiuj lokoj, laŭ dia inspiro, sin preparis kune kun siaj kunuloj por reveni inter la kristanojn; kaj kuniginte ĉiujn, li revenis al Sultano kaj prenis forpermeson. Kaj tiam la Sultano diris: «Frato Francisko, mi volonte konvertiĝus al la fido de Kristo, sed nun mi timas, ĉar se tiuj ĉi ĝin aŭdus, ili mortigus min kaj vin kun ĉiuj viaj kunuloj, kaj pro tio ke vi povas fari ankoraŭ multe da bono, kaj mi devas plenumi kelkajn gravajn aferojn, mi volas konduki nek vin nek min al la morto, sed instruu min kiamaniere mi povu min savi; kaj mi estas preta por fari kion vi ordonos al mi». Tiam sankta Francisko diris: «Sinjoro, nun mi foriros el vi, sed post kiam mi estos reveninta al miaj landoj kaj post mia morto mi estos irinta en ĉielon per la favoro de Dio, laŭ la dia plaĉo mi sendos al vi du el miaj fratoj, de kiuj vi ricevos la sanktan bapton de Kristo kaj vi havos la savon, kiel al mi inspiris mia sinjoro Jesuo Kristo. Kaj vi tiel malligos vin el ĉiu malhelpo, ĉar kiam la favoro de Kristo venos al vi, ĝi vin trovos preparita al la fido kaj al la pieco». Kaj tiel li promesis kaj tiel li faris. Poste sankta Francisko revenas kune kun tiu respektinda kaj sankta kunfrataro; kaj post kelkaj jaroj pro korpa morto sankta Francisko donis la animon al Dio. Kaj la Sultano, malsaniĝinte, atendas la promeson de sankta Francisko kaj starigas gardantojn je kelkaj pasejoj ordonante ke, se du fratoj aperas vestitaj kiel sankta Francisko, tuj oni konduku ilia al li. Samtempe sankta

Francisko, aperis al du fratoj kaj ordonis al ili ke tuje ili iru al Sultano kaj zorgu por lia savo laŭ kio li estis promesinta. Tiuj fratoj tuj forvojaĝis kaj, post kiam ili estis transpasintaj la maron, la gardantoj kondukis ilin al Sultano. Kaj li vidante ilin tre ĝojis kaj diris: «Nun vere mi scias ke Dio sendis al mi siajn servantojn laŭ la promeso, kiun sankta Francisko per dia inspiro faris al mi». Do li ricevis de la dirtaj fratoj sciigon pri la fido de Kristo kaj la sanktan bapton, tiel renaskiĝinta en Kristo li mortis pro tiu malsaneco kaj lia animo per la indeco kaj ago de sankta Francisko trovis la savon.

ĈAPITRO XXV.

Kiel sankta Francisko mirakle resanigis leprulon en la animo kaj en la korpo; kaj pri tio, kion tiu animo diris flugante al ĉielo.

La vera disĉiplo de Kristo, sinjoro sankta Francisko, vivante ĉi tiun mizeran vivon, tutzorge penadis imiti Kriston, perfekta majstro; pro tio ofte okazis ke, al kiu li per dia volo resanigis la korpon, Dio samtempe resanigis la animon, kiel oni legas pri Kristo. Kaj, ĉar li ne sole volonte flegis la leprulojn, krom tio li estis ankaŭ ordoninta al la fratoj de sia Ordeno, ke vojaĝante tra la mondo aŭ restante, ili flegu la leprulojn por la amo al Kristo, kiu volis por ni esti konsiderata leprulo; foje okazis ke apud la monaĥejo, kie loĝis sankta Francisko, la fratoj flegis en malsanulejo la leprulojn kaj la malsanulojn: inter kiuj estis leprulo senpacienca kaj netolerema kaj malbona, tiel ke ĉiu opiniis ke tute certe li estas, kaj tiel estis, prenita de la demono. Ĉar li maldece ofendis per vortaĉoj kaj batadoj kiun ajn, kiu lin flegis, kaj, malplibone, li eĉ insulte blasfemis Kriston benatan kaj lian tre sanktan patrinon Virga Mario; kaj neniel oni povis trovi tiun, kiu volas lin flegi. Kaj kvankam la fratoj zorgis pacience suferi la al si adresitajn ofendojn kaj malnoblaĵojn por pligrandigi la meriton de la pacienco, tamen iliaj konsciencoj ne povante suferi tiujn adresitajn al Kristo kaj al lia patrino, ili decidis forlasi la diritan leprulon: sed ili ne volis tion fari antaŭ ol tute informi sanktan Franciskon, kiu loĝis tiutempe ĉe apuda monaĥejo. Kaj post kiam li estis informita, sankta Francisko iris al malbonega leprulo; kaj alveninte al li, tiel lin li salutas dirante: «Dio donu al vi la pacon, frato mia tre kara». Respondis riproĉante la leprulo: «Kian pacon mi povas ricevi de Dio, kiu pacon kaj ĉiun bonon elprenis el mi, kaj igis min tute putra kaj malbonodora?». Kaj sankta Francisko diris: «Filo. paciencon; ĉar la malsanecojn de la korpoj Dio donis al ni en tiu ĉi mondo por la savo de la animo, ĉar ili donas al ni grandan profiton, kiam ni pace suferas ilin». Respondis la malsanulo: «Kaj kiel mi povas pace suferi la daŭran doloron, kiu tage kaj nokte premege min? Kaj ne sole dolorigas min mia malsaneco sed plimalbone faras al mi viaj fratoj, kiuj vi donis al mi por ke ili min flegu, kaj ili ne flegas min kiel ili devas». Tiam sankta Francisko, inspire konante ke tiu leprulo estas okupita de iu malbonega spirito, foriris kaj piege preĝis Dion por li. Kaj post la preĝado li revenas al li kaj diras: «Filo, mi mem volas vin flegi, pro tio ke vi ne estas kontenta pri la aliaj». «Tio plaĉas al mi, diras la malsanulo, sed kion vi povos fari pli ol la aliaj?». Respondas sankta Francisko: «Ĉion, kion vi volas mi faros». Diras la leprulo: «Mi volas ke vi tute lavu min; ĉar mi tiel malbonodoras, ke mi mem ne povas suferi». Tiam sankta Francisko tuje varmigis akvon kun multaj bonodoraj kreskaĵoj; poste li tiun senvestigas, kaj komencas lin lavi per la manoj, kaj alia frato metis la akvon. Kaj pro dia miraklo, kie sankta Francisko tuŝis per siaj sanktaj manoj, la lepro malaperis, kaj la karno restis perfekte resanigata kaj kiel la karno komencis resaniĝi, tiel ankaŭ komencis resaniĝi la animo; pro tio la leprulo, vidante ke li komencis resaniĝi, havis grandan ĉagrenon kaj penton pri siaj pekoj kaj dolorplene ploris; tiel ke dum la korpo repuriĝadis el la lepro per la lavado je akvo, la animo puriĝadis el la peko per pentoj kaj per larmoj. Kaj, post kiam li tute resaniĝis je la korpo kaj je la animo, humile li sin konfesis kaj laŭte plorante diradis: «Ve min! ke mi estas inda de la infero pro miaj malnoblaĵoj kaj ofendoj al la fratoj, kaj pro la malpacienca kaj pro la blasfemoj kontraŭ Dio»; kaj dum la daŭro de dek-kvin tagoj li persistis dolore plori siajn pekojn kaj petegi kompaton al

Dio. Kaj sankta Francisko, konstatinte tian miraklon, kiun Dio faris per liaj manoj, dankis Dion kaj foriris vojaĝante al landoj tre malproksimaj; ĉar pro humileco li volis forkuri el ĉiu monda gloro, kaj en ĉiuj siaj agoj nur li serĉis la honoron kaj gloron de Dio. Poste, kiel plaĉis al Dio, la dirita leprulo, resaniĝinta je la korpo kaj je la animo, post dek-kvin tagoj de sia pento remalsaniĝis pro alia malsaneco; kaj sub la protekto de la sakramentoj de sankta Patrio la Eklezio, li sankte mortis kaj lia animo flugante al paradizo aere aperis al sankta Francisko, kiu estis preĝanta en iu arbaro, kaj ĝi diris al li: «Ĉu vi rekonas min?». «Kiu vi estas?» diris sankta Francisko. Kaj la alia diris: «Mi estas la leprulo, kiun Kristo benata resanigis pro via indeco, kaj hodiaŭ mi aliras al la eterna vivo: pro tio mi dankas Dion kaj vin. Benata estu via animo kaj via korpo kaj benataj viaj vortoj kaj viaj agoj; ĉar per vi multaj animoj trovas la savon en la mondo; kaj sciu ke ne estas tago en la mondo, dum kiu la sanktaj anĝeloj kaj la aliaj sanktuloj ne dankas Dion pri la sanktaj fruktoj faritaj en multaj partoj de la mondo de vi kaj de via Ordeno; kaj pro tio ĝoju kaj danku Dion kaj restu kune kun lia beno». Kaj post tiaj vortoj li eniris en ĉielon; kaj sankta Francisko restis tre konsolita. Je laŭdo de Kristo. Amen.

ĈAPITRO XXVI.

Kiel sankta Francisko konvertis tri mortigemajn ŝtelistojn, kaj ili monaĥiĝis; kaj pri la mirinda vizio, kiun vidis unu el ili, kiu estis tre sankta frato.

Foje sankta Francisko iris al la dezerto de Borgo Sankta Sepolkro [Strato de la Sankta Tombo], kaj pasinte apud kastelo, kiu estas nomata Monto Kazale, venis al li nobela kaj delikata junulo, kiu diris al li: «Patro, tre volonte mi volus veni inter viaj fratoj». Respondis sankta Francisko: «Filo, vi estas juna, delikata kaj nobela; eble vi ne povas toleri la malriĉecon kaj pentofaradon niajn». Kaj la alia diris: «Patro, ĉu vi ne estas viroj kiel mi? do kiel toleras vi, tiel ankaŭ mi povos per la dia favoro». Tre plaĉis al sankta Francisko tiun respondon; kaj pro tio lin benante, tuj lin ricevis en la Ordeno, kaj alvokis lin frato Anĝelo. Kaj tiu sin kondukis tiel bone, ke post ne multe da tempo sankta Francisko lin elektis gardanto de la monaĥejo en Monto Kazale. Tiutempe estis en la lando tri ŝtelistoj, kiuj faris multajn malbonaĵojn; ili tagon venis al la monaĥejo de la fratoj kaj petis la diritan fraton Anĝelon gardanto ke li donu al ili ion por manĝi. La gardanto tiel respondis al ili severe riproĉante: «Ĉu vi ne hontas, kruelaj kaj mortigemaj ŝtelistoj, ŝteli la penadojn de la aliaj?; kaj ankaŭ malhumile kaj senhonte vi volas formanĝi la almozojn senditajn al servantoj de Dio; kaj ankaŭ vi ne estas indaj ke la tero vin subtenu; ĉar eĉ vi ne havas iun respekton nek al la homoj, nek al Dio, kiu vin kreis; iru do kaj ne plu aperu tie ĉi». Pro tio ili konfuzis kaj kolere foriris. Kaj jen sankta Francisko, kiu revenas kun la poŝego de la pano kaj kun vazeto da vino, kiujn li kaj la kunfrato estis almoze ricevintaj; kaj la gardanto informis lin kiel li forpelis tiujn, kaj sankta Francisko serioze riproĉis lin dirante: «Vi kruele vin kondukis; ĉar plibone la pekuloj revenas al Dio per la dolĉeco ol per la severaj riproĉoj; ĉar nia majstro Jesuo Kristo, kies evangelio, kiun ni promesis observi, diras ke ne bezonas la kuracisto por la sanuloj sed por la malsanuloj; kaj ke li venis ne por alvoki al pento la justulojn sed la pekulojn; kaj ofte li kune kun ili manĝis. Do pro tio, kion vi faris kontraŭ la karito kaj kontraŭ la sankta evangelio de Kristo, mi ordonas al vi por sankta obeo ke tuj vi prenu tiun ĉi poŝegon da pano, kiun mi almoze ricevis, kaj tiun ĉi vazeton da vino kaj ke tute rapide vi sekvu ilin inter montoj kaj valoj tiel ke ilin vi trovu, kaj oferdonu al ili tiun ĉi panon kaj tiun ĉi vinon je mia nomo; kaj poste genufleksiĝu antaŭ ili kaj humile konfesu al ili vian kulpon pro via krueleco; kaj poste je mia nomo petu ilin ke ne plu ili faru malbonaĵojn sed ke ili timu Dion, kaj ne ofendu la proksimulojn; kaj se ili tion ĉi faros, mi promesas provizi ilin en iliaj bezonoj kaj daŭrige doni al ili por manĝi kaj trinki. Kaj kiam vi tion ĉi estos dirinta, humile revenu tien ĉi». Dum la dirita gardanto iradis por plenumi la ordonon de sankta Francisko, li komencis preĝi, kaj preĝis Dion ke la koroj de tiuj ŝtelistoj malsovaĝiĝu, ke ili sin konvertu al pento. La obeema gardanto alvenis al ili, kaj al ili oferdonis la panon kaj la vinon; kaj li faras kaj diras kion sankta Francisko ordonis al li. Kaj, kiel plaĉis al Dio, post kiam tiuj ŝtelistoj manĝis la almozon de sankta Francisko, kune ili komencis diri: «Ve nin, mizeraj malfeliĉuloj! Kiom da dolorigaj punoj de la infero nin atendas, pro tio ke ni ne nur ŝtelas la proksimon batante kaj vundante, sed ankaŭ mortigante: kaj eĉ pri tiomaj malbonaĵoj kaj malbonegaj agoj, kiujn ni faras, nek iun penton ni havas, nek timon al Dio. Kaj jen tiu ĉi sankta frato, kiu venis al ni, kaj pro kelkaj vortoj kiujn li ĝuste diris al ni pro nia malboneco, humile li sin kulpigis; kaj krom tio li portis al ni la panon kaj la vinon kaj tion bonfaran promeson de la sankta pa-

tro. Vere tiuj ĉi fratoj estas sanktuloj de Dio, kiuj meritas la paradizon, kaj ni estas filoj de la eterna puno, kiuj meritas la dolorojn de la infero kaj ĉiutage ni kreskigas nian pereon, kaj ni ne scias ĉu ni povos trovi ĉe Dio kompaton pro la pekoj, kiujn ĝis nun ni faris». Tiujn kaj similajn vortojn diris unu el ili; la alia diris: «Tute certe vi diras la veron: sed nun, kion ni devas fari?». «Iru ni, respondis tiu, al sankta Francisko; kaj se li donas al ni esperon ke ni povos trovi kompaton ĉe Dio pri niaj pekoj, faru ni, kion li ordonos al ni, kaj ni povos liberiĝi niajn animojn el la punoj de la infero». Plaĉis tiu konsilo al la aliaj; kaj tiel ĉiuj tri konsente venis rapide al sankta Francisko, kaj tiel ili diris al li: «Patro, ni pro multaj malbonegaj pekoj, kiujn ni faris, ni ne kredas trovi kompaton ĉe Dio; sed se vi havas kelkan esperon ke Dio kompatos nin, jen ni estas pretaj fari ĉion, kion vi diros al ni, kaj kune kun vi fari la penton». Tiam sankta Francisko karite kaj humane akceptis ilin, kaj konsoligis ilin per multaj ekzemploj; kaj certigante ilin pri la kompato de Dio, li promesis demandi ĝin por ili al Dio, elmontrante ke la kompato de Dio estas senfina; «kaj se ni havas senfinajn pekojn, la kompato de Dio estas jam pligranda laŭ la Evangelio; kaj la apostolo sankta Paŭlo diris: Kristo benata venis en tiun ĉi mondon por reaĉeti la pekulojn». Pro tiaj vortoj kaj similaj instruoj la diritaj tri ŝtelistoj forlasis la demonon kaj liajn agojn kaj sankta Francisko ricevis ilin en la Ordeno, kaj ili komencis fari grandan penton; kaj du el ili vivis malmulte da tempo post sia konvertiĝo kaj aliris en paradizon. Sed la tria postvivis kaj li, pripensante pri siaj pekoj, komencis fari tian penton, ke dum la daŭro de dek-kvin jaroj krom la kutimaj fastoj, kiujn li faradis kun la aliaj fratoj, ĉiam dum tri tagoj ĉiusemajne li fastis per pano kaj akvo; kaj ĉiam nudpiede li marŝis survestita nur per sola tuniko, kaj neniam li dormis post la matutino. Dum tiu ĉi tempo sankta Francisko transpasis el tiu ĉi vivo. Do daŭriginte tiu dum multaj jaroj tian penton, jen nokton, post la matutino, li sentis tioman dormemon, ke neniel li povis kontraŭstari ĝin kaj kiel kutime maldormi. Fine, nek povinte kontraŭstari la dormemon, nek preĝadi, li enlitiĝis por dormi; kaj tuj post kiam li kuŝis la kapon, li estaziĝis kaj spirite li estis kondukita sur tre altan monton, kiu havis tre profundan deklivon, kaj dise rompita kaj splititajn ŝtonojn kaj malglatajn rokojn forvenantaj el la ŝtonoj, pro tio estis terurige rigardi tian deklivon. Kaj la anĝelo, kiu kondukis tiun ĉi fraton, puŝis lin kaj lin malsupren ĵetis laŭ la deklivo: li, de roko al roko kaj de ŝtono al ŝtono elsaltante kaj batante, fine, laŭ sia ŝajno tute disrompita kaj dispeciĝinta alfalis en la profundon; kaj tiamaniere li kuŝadis sur la tero, kaj tiu, kiu lin kondukis diris: «Stariĝu, ĉar estas por vi konvene fari pli longan vojaĝon». Respondis la frato: «Vi ŝajnas al mi tre maldiskreta kaj senkompatema viro; ĉar vi vidas min mortanta pro la falo, kiu tiel min dispecigis, kaj vi diras al mi: Stariĝu». Kaj la anĝelo alproksimiĝas al li kaj, tuŝante lin, perfekte lin sendifektigas en ĉiuj membroj kaj lin resanigas. Kaj poste li montras al li grandan ebenaĵon, plenan je pintoplenaj kaj akraj ŝtonoj, el dornoj kaj el tribloj, kaj li diras al li ke laŭ la tuta ebenaĵo estas konvene ke li nudpiede pasu ĝis la fino; kie li vidis brulantan fornegon en kiun li devos eniri. Kaj post kiam la frato tiun ebenaĵon tre malĝojege kaj ĉagrene estis pasinta, la anĝelo diras al li: «Eniru en tiun ĉi fornegon, ĉar tio ĉi estas por vi konvena». Respondas tiu: «Ho ve! kiom kruela gvidanto vi estas, kiu vidas min preskaŭ mortinta pro tiu ĉi tre malfacila ebenaĵo, kaj nun por ripozo vi diras al mi ke mi eniru en tiun ĉi brulantan fornego!» Kaj li elrigadante vidis ĉirkaŭe de la fornego multajn demonojn, tenantajn ferajn forkegojn, kaj per tiuj ĉi ili lin tuj internen puŝis, ĉar li malrapidigas eniri. Enirinte en la fornego, li elrigardas kaj ekvidas iun, kiu estis lia baptono, kiu tute brulis; kaj li demandas: «Ho baptono malfeliĉa, kial vi venis tien ĉi?» Kaj la alia respondis: «Iru iom pli antaŭe kaj vi trovos mian edzinon, via baptonino, kiu diros al vi la kialon de nia kondamno». Antaŭenirinte la frato, jen aperis la dirita baptonino tute brulanta,

fermita en mezurilo de greno same tute brulanta; kaj li demandas ŝin: «Ho malfeliĉa kaj mizera bapтанino, kial vi venis en tiun ĉi tiel kruelan turmenton?» Kaj ŝi respondis: «Ĉar dum malsatega tempo, kiun sankta Francisko antaŭanoncis, mia edzo kaj mi falsis la grenon kaj la nutraĵon, kiujn ni disvendadis per tiu ĉi mezurilo, kaj pro tio mi brulas en tiu ĉi mezurilo mem». Kaj post tiuj vortoj, la anĝelo, kiu kondukis la fraton, puŝis lin for el fornego kaj poste li diris al li «Preparu vin por fari terurigan vojaĝon kiun vi devos plenumi». Kaj li doloresprime diris: «Ho kruela kondukanto, kiu ne havas iun kompaton por mi! vi vidas ke mi jam preskaŭ tute brulis en tiu ĉi fornego kaj ankaŭ vi volas konduki min laŭ danĝerigan vojaĝon». Tiam la anĝelo lin tuŝis kaj lin resanigis kaj fortikigis; kaj poste li kondukis lin al iu ponto, kiun oni ne povas transpasi sen granda danĝero; ĉar ĝi estis tre maldika kaj mallarĝa kaj tre glitiga kaj flanke senranda, kaj sube fluis terura rivero plena je serpentoj kaj drakoj kaj skorpioj, kaj ĝi multe haladzis kaj la anĝelo diris al li: «Transpasu sur tiu ĉi ponto, ĉar al vi tute konvenas». Respondas tiu: «Kaj kiel mi povos pasi, ne falante en tiun ĉi danĝeran riveron?». Diras la anĝelo: «Venu kun mi kaj metu la piedon kie vi vidis la mian, kaj tiel vi bone transpasos». Pasas la frato post la anĝelo, kiel la lasta instruis, tiel ke li alvenis sur la mezo de la ponto; kaj el tie ĉi la anĝelo forflugis kaj, forflugante de li, alflugis sur tre altan monton tre malproksime de la ponto. Kaj la alia bone konsideras la lokon kien estis fluginta la anĝelo; sed restante sen gvidanto kaj rigardante malsupren, li vidis tiujn bestojn tiom terurigajn starantaj kun la kapoj for el la akvo kaj kun la buŝoj malfermataj pretaj por lin manĝegi se li falas; kaj li tiel terurtremis, ke neniel li sciis kion fari kaj kion diri: ĉar li nek povis malantaŭe reveni, nek antaŭeniri. Pro tio en tioma sufero li sin turnis al Dio, genufleksiĝis, ĉirkaŭpremis la ponton kaj tutkore kaj larme sin rekomendas al Dio, por ke per lia tre sankta komato li helpu lin. Kaj, post la preĝo, ŝajnis al li ke flugiloj komencas kreski sur si mem; pri tio li tre ĝoje atendas ke ili kresku, por povi flugi transen de la ponto, kien estis fluginta la anĝelo. Sed post kelka tempo, pro la granda deziro, kiun li havas por transpasi la ponton, li ekflugis; kaj, ĉar la flugiloj ne fariĝis ankoraŭ sufiĉe grandaj, li falis sur la ponton kaj falis ankaŭ la plumoj; pro tio li denove ĉirkaŭpremas la ponton, kiel antaŭe, kaj sin rekomendas al Dio. Kaj post la preĝo, ŝajnis ankaŭ al li ke flugiloj kreskas; sed, kiel antaŭe, li ne atendis ke ili perfekte kresku; pro tio, antaŭtempe ekfluginte, li refalis sur la ponton kaj la plumoj falis. Pro tio vidante ke pro la rapidemo, kiun li havas por flugi antaŭtempe, li falis, tiel li komencis diri en si mem: «Tute certe, se la flugiloj kreskos la trian fojon, mi atendos ĝis kiam ili estu tiel grandaj, ke mi povos flugi sen refalo». Kaj tion pensante li vidis la trian fojon la flugilojn kreskantaj; kaj nun li longatempe atendas ĝis kiam ili pligrandiĝas, kaj ŝajnis al li, ke por la unua kaj dua kaj tria kreska-do, li atendis cent kvindek jarojn aŭ pli. Fine la trian fojon per ĉiu sia peno li leviĝis, ekflugis kaj alflugis ĝis la loko, kien estis fluginta la anĝelo; kaj, frapante je la pordo de la palaco, kie tiu estas, la pordisto demandis lin: «Kiu vi estas, kiu venis tien ĉi?». Respondas tiu: «Mi estas frato minorito». Diras la pordisto: «Atendu min, ĉar mi volas konduki sanktan Franciskon por ke li vidu se li konas vin». Li iras por alvoki sanktan Franciskon, kaj dume la alia komencas rigardi la mirindajn murojn de tiu palaco: kaj tiuj ĉi muroj ŝajnis brilantaj je tioma lumeco, ke li detale vidis la aron de la sanktuloj kaj kion interne oni faras. Dum li mirigita rigardas, jen venas sankta Francisko kaj frato Bernardo kaj frato Egidjo kaj post ili tioma amaso da sanktuloj kaj sanktulinoj, kiuj estis sekvintaj lian vivon, ke preskaŭ ili ŝajnis nenombreblaj. Kiam sankta Francisko alvenis, diris al la pordisto: «Lasu ke li eniru, ĉar li estas unu el miaj fratoj». Kaj tuj kiam li eniris, sentis tiom da konsolo kaj tiom da dolĉeco, ke li forgesis ĉiujn dolorojn, kiujn li estis suferinta, kiel se neniam ili estus estintaj. Kaj tiam sankta Francisko kondukante lin montris al

li multajn mirindajn aferojn kaj poste li diris: «Konvenas ke vi revenu al la mondo kaj ke tie vi restu sep tagojn, dum kiuj vi diligente vin preparu kun ĉiu pieco; ĉar post la sep tagoj mi venos por vi kaj vi venos kun mi en tiun ĉi lokon de la feliĉeguloj». Kaj sankta Francisko estis survestita de mirinda mantelo kovrita de tre belaj steloj, kaj liaj kvin cikatroj estis kiel kvin tre belaj steloj kaj je tioma brilado, ke la tutan palacon ili lumigadis per siaj radioj. Kaj frato Bernardo havis sur la kapo kronon el tre belaj steloj, kaj frato Egidjo estis ornamita per mirinda lumeco: kaj multajn aliajn sanktajn fratojn inter ili li rekonis, kiujn en la mondo neniam li estis vidinta. Do forpermesita de sankta Francisko li, kvankam kontraŭvole, revenis al la mondo. Li vekigis kaj revenis en si mem dum la fratoj sonorigis la unuan preĝhoron; pro tio la vizio daŭrigis de la matutino ĝis la unua, kvankam ĝi al li ŝajnis longa multajn jarojn. Li akurate rakontis al gardanto tiun ĉi vizion, kaj post sep tagoj li malsaniĝis je febro, kaj la okan tagon venis por li sankta Francisko, laŭ la promeso, kune kun granda aro da gloraj sanktuloj, kaj kondukis lian animon al la regno de eterna vivo. Je laŭdo de Kristo. Amen.

ĈAPITRO XXVII.

Kiel sankta Francisko konvertis en Bolonjo du studentojn kaj ili fariĝis fratoj; kaj poste li levis al unu el ili grandan tenton.

Kiam foje sankta Francisko alvenis al la urbo Bolonjo, la tuta popolo de la urbo alkuris por lin vidi; kaj estis tiel granda la popolamaso, ke tre pene li povis alveni ĝis la placo. Kaj kiam la placo fariĝis tute plena el viroj kaj studentoj, sankta Francisko supreniras sur altan lokon kaj komencas prediki tion, kion la Sankta Spirito diktis al li; kaj tiel mirinde li predikadis, ke ŝajnis ke predikas anĝelo prefere ol viro; kaj liaj vortoj ŝajnis ĉielaj kiel akraj fulmotondroj, ĉar ili trapasis tra la koroj de tiuj, kiuj aŭdis lin, kaj per tiu prediko granda kvanto da kaj virinoj sin konvertis al pento. Inter kiuj estis du nobelaj studentoj de la provinco Ankono; unu sin nomis Pelegrino, la alia Riĉieri; la du pro la dirita prediko, tuŝitaj en la koro de la dia inspiro, venis al sankta Francisko dirante ke ili tute volas forlasi la mondon kaj fariĝi liaj fratoj. Tiam sankta Francisko, konante pro inspiro ke tiuj estas senditaj de Dio kaj ke en la Ordeno ili atingos sanktan vivon, kaj konsiderante ilian grandan fervoron, li kontente ilin ricevis, kaj diris al ili: «Vi, Pelegrino, sekvu en la Ordeno la vojon de la humileco kaj vi, frato Riĉieri, sekvu la fratojn». Kaj tiel okazis; ĉar frato Pelegrino neniam volis pastrigi, sed resti laiko, kvankam li estas klera literaturisto kaj dekretisto; per tia humileco li alvenis al granda virta perfekteco, tiel ke frato Bernardo, unua filo de sankta Francisko, diris pri li ke li estas unu el la plej perfektaj monaĥoj en tiu ĉi mondo. Kaj fine la sama frato Pelegrino, plena je virto, pasis el tiu ĉi vivo al ĉiela vivo, kun multaj mirakloj antaŭ kaj post la morto. Kaj la dirita frato Riĉieri pie kaj fidele servis la fratojn tre sankte kaj humile vivante; kaj li fariĝis tre intima kun sankta Francisko, kaj tiu ĉi konfidis al li multajn sekretojn. Elektita poste ministro de la provinco Ankono, longatempe li ĝin estris en granda paco kaj diskreteco. Post longa tempo Dio permesis grandan tenton al lia animo; pri kio li multe suferis kaj malĝojegis kaj per fastoj, per punopentoj, per larmoj kaj preĝoj, la tagon kaj la nokton li malĝojigis sin, tamen li ne povis forpeli tiun tenton; kaj ofte li estis en granda malespero, ĉar pro tio li opiniis esti forlasata de Dio. Dum tiu ĉi malespero, kiel lasta rimedo li decidis iri al sankta Francisko tiamaniere pensante: «Se sankta Francisko grandanime min ricevos kaj montros al mi la kutiman intimecon, mi kredos ke Dio ankoraŭ min kompatos; kontraŭe, estos signo ke mi estas forlasita de Dio». Do tiu ekmarŝas kaj aliras al sankta Francisko, kiu tiutempe loĝis ĉe la palaco de la episkopo de Asizo, tre serioze malsana; kaj Dio estis inspirinta lin pri la tento kaj malespero de la dirita frato Riĉieri kaj pri lia propono kaj pri lia alveno. Kaj tuje sankta Francisko alvokas fraton Leonon kaj fraton Maseon, kaj al ili diras: «Iru tuj renkonte al mia tre kara filo frato Riĉieri; kaj ĉirkaŭpremu lin je mia nomo, kaj salutu lin, kaj diru al li, ke el ĉiuj fratoj, kiuj estas en la mondo, speciale mi lin amas». Iras tiuj, kaj ili trovas sur la vojo fraton Riĉieri, lin ĉirkaŭpremas dirante al li tion, kion sankta Francisko estis al ili ordoninta. Pro tio tioma konsolo kaj dolĉeco venis en lian animon, ke tute li ĝojegis; kaj tutkore dankante Dion li almarŝis kaj alvenis al la loko kie sankta Francisko malsane kuŝas. Kaj, kvankam sankta Francisko estas serioze malsana, tamen kiam li aŭdis ke venas frato Riĉieri, stariĝis kaj iris por lin renkonti, kaj ame lin ĉirkaŭpremis kaj diris al li: «Filo mia tre kara, frato Riĉieri, el ĉiuj fratoj, kiuj estas en la mondo, mi speciale amas vin»; kaj tion dirinte li krucosignis lin sur la frunto kaj ĉi tie lin kisis, kaj poste li diris al li:

«Filo tre kara, tiun ĉi tenton Dio permesis por via granda merito; sed se vi ne deziras plu tiun gajnon tiel estu». Mirinde! tuj post kiam sankta Francisko estis dirinta tiujn ĉi vortojn, tuje foriris el li ĉiu tento, same kiel li dum la vivo neniam estus havinta ĝin, kaj li restis tre konsolita.

ĈAPITRO XXVIII.

Pri estazo, kiun frato Bernardo havis, pro kiu li restis for el si mem de la mateno ĝis la naŭa.

Kioman favoron Dio donas ofte al la humilaj evangelianoj, kiuj por la amo al Kristo forlasis la mondon, estas elmontrate en frato Bernardo el Quintavale [Kvintavalo], kiu post kiam li sin vestis per la vestaĵo de sankta Francisko, ofte li estaziĝis en Dio dum la medito pri la ĉielaj aferoj. Interalie okazis foje ke estante li en preĝejo por ĉeesti la meson kaj intense meditante pri Dio, li tiel estaziĝis, ke dum la montrado de la korpo de Kristo, nenion li ekvidis, nek genufleksiĝis, nek altiris la kapuĉon, kiel la aliaj; sed ne movante la okulojn fikse rigardis de la mateno ĝis la naŭa. Kaj post la naŭa revenante en si mem, laŭiris laŭ la monaĥejo kriante kun admira voĉo: « Ho fratoj! ho fratoj! en tiu ĉi lando ne estas homo tiel klera, tiel nobela, al kiu se estus promesata palaco tre bela plena je oro, estus malfacile porti sakon plena je malpuraĵoj, por gajni tiun tiel multvaloran trezoron». Al tiu ĉiela trezoro, promesata al la amantoj de Dio, estis la dirita frato Bernardo tiel leviĝinta kun la penso, ke dum dekvin jaroj ĉiam li havis la penson kaj la vizaĝon turniĝintaj al ĉielo; kaj dum tiu tempo li neniam dum tagmanĝo tute malsatigis sin, kvankam iom el tio, kion oni metis antaŭ li, li manĝis. Ĉar li diris ke tio, kion la homo ne gustumas, ne faras perfektan abstinencan: sed la vera abstinenco estas moderigi la uzadon de tiuj aferoj, kiuj estas bongustaj por la buŝo; kaj per tio li atingis ankaŭ tioman klarecon kaj tioman inteligentecon, ke eĉ la kleraj pastroj sin turnis al li por solvi seriozajn problemojn kaj malfacilajn ĉapitrojn de la S. Skribo; kaj li ĉiun malfacilaĵon klarigis. Kaj, ĉar lia penso estis tute libera pri la teraj aferoj, li, kiel hirundo, alten flugis en estazo; pro tio kelkafoje dudek, kelkafoje tridek tagojn li apartiĝis sola sur la altaĵoj de la plej altaj montoj por mediti pri la ĉielaj aferoj. Pro tio pri li frato Egidjo diris ke al la aliaj homoj ne estas donita tiu favoro, kiun frato Bernardo el Quintavale posedas, tiel estas ke, flugante, li sin nutras kiel la hirundo. Kaj pro tiu belega favoro, kiun li ricevis de Dio, ofte sankta Francisko volonte kunparolis kune kun li tage kaj nokte: pro tio kelkafoje oni trovis ilin dum la tuta nokto en la arbaro kune estaziĝintaj en Dio, en kiu arbaro ili ambaŭ kunigis sin por kune paroli al Dio, kiu estas benata in saecula k.t.p.

ĈAPITRO XXIX.

Kiel la demono, laŭ ŝajnigo de la Krucumito, aperis kelkfoje al frato Rufino, dirante al li ke li perdas ĉiun bonon, kiun li faras, pro tio ke li ne estas inter la elektitoj por la vivo eterna. Kion sankta Francisko konis pro dia inspiro, kaj li informis pri lia eraro fraton Rufinon.

Frato Rufino, unu el la plej nobelaj viroj el Asizo kaj kunulo de sankta Francisko, estis viro el granda sankteco, kaj li foje estis multe tentita en la animo de la demono pri la antaŭdestino; pro kio li melankolie kaj malĝoje vivis; ĉar la demono sugestis lin ke li estas kondamnata kaj ke li ne estas inter la antaŭdestinitaj por la eterna vivo, kaj ke li perdas tion, kion li faradas en la Ordeno. Daŭrigis tiu ĉi tento dum kelkaj tagoj, kaj li pro honto ne konfidis tion al sankta Francisko, tamen li ne forlasis preĝi kaj fasti kiel kutime; pro tio la malamiko komencis aldoni malĝojon sur malĝojoj; krom la interna batalado li bataladis lin ankaŭ ekstere per falsaj aperoj. Foje li aperis al li laŭ ŝajnigo de la Krucumito dirante: «Ho frato Rufino, kial vi ĉagrenas en pentoj kaj en preĝoj, dum vi ne estas inter la antaŭdestinitaj por la eterna vivo? kaj kredu min, ĉar mi scias kiun mi elektis kaj antaŭdestinis; kaj ne kredu al filo de Petro Bernardoni, se li diros la kontraŭon, kaj ankaŭ ne demandu lin pri tiu ĉi afero, ĉar nek li, nek alia scias pli ol mi, kiu estas filo de Dio; kaj pro tio kredu min ke certe vi estas inter la kondamnitaj; kaj la filo de Petro Bernardoni, via patro, kaj ankaŭ lia patro estas kondamnitaj, kaj kiu ajn sekvas lin, tiu estas kondamnita kaj trompita». Laŭ tiuj ĉi vortoj, frato Rufino komencis esti konfuzita de la princo de la mallumo, tiel ke li jam ekperdis la fidon kaj la amon, kiujn li havis al sankta Francisko, kaj eĉ li tute ne sin priokupis por informi lin. Sed tion, kion al patro sankta ne diris frato Rufino, inspiris la Sankta Spirito. Pro tio, inspire vidinte sankta Francisko la danĝeron de la dirita frato, li sendis al li fraton Maseon; al kiu frato Rufino riproĉe respondis: «Kion mi havas por fari kune kun frato Francisko?» Tiam frato Maseo, plena je dia scienco, konante la trompon de la demono, diris: «Ho frato Rufino, ĉu vi ne scias ke frato Francisko estas kiel anĝelo de Dio, kiu lumigis tiomajn animojn en la mondo, kaj de kiu ni ricevis la dian favoron? kaj mi volas ke perforte vi venu al li; ĉar mi klare vidas ke la demono vin trompas». Do frato Rufino ekmarŝis kaj iris al sankta Francisko; kaj kiam sankta Francisko el malproksime vidis lin ke li venas, komencis laŭte krii: «Ho frato Rufino malbona, kiun vi kredis?». Kaj post kiam frato Rufino alvenis al li, tiu ĉi klare konatigis al li la tutan tenton, kiun li interne kaj ekstere suferas pro la demono; eĉ li klare elmontris al li, ke tiu, kiu al li aperis, estis la demono kaj ne Kristo, kaj ke neniel li konsentu ian sugestion; «sed kiam la demono diras al vi: Vi estas kondamnita (diras sankta Francisko) respondu: Malfermu la buŝon por ke mi volas kani en ĝin; kaj tio ĉi estu la signo, ke li estas la demono kaj ne Kristo: ĉar, se vi tiel respondos al li, tuj li forkuros. Ankaŭ vi estus devinta koni, ke li estas la demono, ĉar li malmoligis al vi la koron, kio estas lia ofico; sed Kristo benata neniam malmoligas la koron de la homo fidela, anstataŭ li moligas ĝin, laŭ sia diro per la buŝo de la profeto: Mi elprenos al vi la koron el ŝtono, kaj mi donos al vi la koron el karno». Tiam frato Rufino, vidinte ke sankta Francisko orde konis tutan lian tenton, humile pro ties vortoj li komencis abunde plori kaj preĝi sanktan Franciskon kaj humile elmontri sian kulpon por esti kaŝinta sian tenton. Kaj tiel li restis tute konsolata pro la admonoj de la patro sankta kaj tute pliboniĝinta. Fine diris al li sankta Francisko: «Iru, filo, kaj

vin konfesu kaj ne forlasu la kutiman preĝon, kaj sciu ke tute certe tiu ĉi tento estos al vi tre utila kaj konsoliga, kaj post ne multe da tempo vi ĝin konstatos». Revenas frato Rufino al sia kabaneto en la arbaro; kaj dum li estis preĝanta kun multaj larmoj, jen venas la malamiko en ŝajnigo de Kristo, kaj tiu ĉi diras: «Ho Rufino, ĉu mi ne diris ke vi ne kredu al filo de Petro Bernardoni kaj ke vi ne laciĝu en ploroj kaj preĝoj, ĉar vi estas kondamnita? kio helpas vin ke malfeliĉigu vin dum la vivo, kaj poste, kiam vi mortos, vi pereos?» Kaj tuje frato Rufino respondis al demono: « Malfermu la buŝon. por ke mi volas kaki en ĝi», pro tio la demono koleriĝinta tuj forkuris kun tiom da uragano kaj moviĝo de ŝtonoj de la monto Subazio, kiu estis proksime, ke disruliĝo de la ŝtonoj okazis sur granda spaco; kaj tiel granda estis la ekfrapo kune dum la ruliĝo, ke en la valo ili terure forĵetis fajrerojn; kaj pro la teruriga bruoj, kiun ili faris, sankta Francisko kaj la kunuloj kun granda miro foriris el la monaĥejo por vidi la novaĵon; kaj ankoraŭ nune oni vidas tiun grandan disruliĝon de la ŝtonoj. Tiam frato Rufino klare konstatis, ke la demono estis lin trompinta. Kaj li revenis al sankta Francisko, teren sin ĵetis kaj konfesis sian kulpon. Kaj sankta Francisko per dolĉaj vortoj lin konsoligas kaj resendadas kun granda konsolo al lia ĉambreto. En kiu, dum li estis pie preĝanta, Kristo benata aperis al li kaj tute varmigi lian animon per dia amo kaj diris: «Bone vi faris, filo, ke vi obeis fraton Franciskon, ĉar tiu, kiu malfeliĉigis vin, estis la demono: sed mi estas Kristo via majstro kaj por certigi vin mi donas al vi tiun ĉi signon; ke dum la tuta vivo vi neniam suferos malĝojon kaj melankolion». Kaj poste Kristo malaperis lasante lin kun tioma ĝojo kaj tioma dolĉeco de spirito kaj delikateco de penso, ke dum la tago kaj la nokto li ĝojadis la estazon en Dio. Kaj de nun li estis tiel certa pri la dia favoro kaj pri sia savo, ke tute li ŝanĝiĝis; kaj li estus restinta la tagon kaj la nokton preĝanta por mediti la diajn aferojn, se la aliaj estus lasintaj ke li tion faru. Pro sankta Francisko diradis pri li: ke frato Rufino estas dum la vivo kanonigita de Jesuo Kristo, kaj ke, ne je lia ĉeesto, li ne dubus nomi lin sankta Rufino, kvankam li estas vivanta sur la tero. Je laŭdo de Kristo. Amen.

ĈAPITRO XXX.

Pri La bela prediko, kiun faris en Asizo sankta Francisko kaj frato Rufino, kiam ili nude predikis.

La dirita frato Rufino, pro la daŭriga estazo, estis tiel ravita en Dio, ke preskaŭ li fariĝis sensenta kaj tre malofte parolis; kaj pro tio li ne havis la favoron, nek la kuraĝon, nek la elokventecon de la predikisto. Tamen foje sankta Francisko ordonis al li ke li iru al Asizo por prediki al la popolo kion Dio inspiras al li. Pri kio Frato Rufino respondis: «Riverencinda Patro, mi petas vin ke vi pardonu min kaj ne sendu min; ĉar, kiel vi scias, mi ne havas la virtoton de la predikemo kaj mi estas nescianta idiotulo». Tiam sankta Francisko diris: «Ĉar vi tuj ne obeis, mi ordonas al vi por sankta oboe ke, senvestite kiel vi naskiĝis, kun la solaj pantalonoj, vi iru al Asizo kaj eniru preĝejon kaj tie vi prediku al popolo». Al tiu ĉi ordono frato Rufino senvestiĝas, kaj nude li iras al Asizo, eniras en iun preĝejon; riverencas antaŭ la altaro, supreniras sur la predikseĝon kaj komencas prediki. La knaboj kaj la viroj komencis ridi dirante: «Jen, nun tiuj faras tioman penton, ke ili fariĝas malsaĝaj kaj senpripensemaj». Pro tio sankta Francisko pripensante pri la tuja oboe de frato Rufino, kiu estis unu el la plej nobelaj viroj el Asizo, kaj pri la severa ordono, kiun li estis farinta al li, komencis riproĉi sin mem dirante: «Kial, hontinda viraĉo, filo de Petro Bernardoni, vi havas tioman fanfaronecon por ordoni al frato Rufino, kiu etis unu el la plej nobelaj viroj el Asizo, ke li iru prediki al popolo nude kiel frenezulo? Je nomo de Dio, faru vi kion vi ordonis al li». Kaj tuje kun granda spirita fervoro li senvestiĝas, kaj nude iras al Asizo kaj kondukas kun si frato Leone por ke li portu lian veston kaj tiun de frato Rufino. Laŭlonge la vojo la Asizanoj lin mokadis konsiderante lin kaj fraton Rufinon frenezaj pro tro da pentoj. Sankta Francisko eniras en la preĝejon en kiu frato Rufino estas predikanta tiujn ĉi vortojn: «Tre karaj, forkuru el la mondo, forlasu la pekon, se vi volas eviti la inferon: observu la ordonojn de Dio amante lin kaj la proksimularon se vi volas iri al ĉielo; kaj faru pentojn se vi volos posedi la ĉielan regnon». Tiam sankta Francisko nude supreniras sur la predikseĝon kaj tiel mirinde li komencas prediki pri la malestimo al la mondo, pri la sankta pentoj, pri la volonta malriĉeco, pri la deziro de la ĉiela regno kaj pri la nudeco kaj la honto de la pasio de nia sinjoro Jesuo Kristo, ke ĉiuj ĉeestantoj, viroj kaj virinoj en granda kvanto, komencis laŭte plori kun nekredebla pieco kaj kun kora pentoj; kaj ne nur tie, sed ankaŭ tra la tuta Asizo estis tioma ploro pri la pasio de Kristo. ke neniam tie okazis la samo. Kaj tiel la popolo, konsolita de la agoj de sankta Francisko kaj de trato Rufino, sankta Francisko survestigis fraton Rufinon, kaj sin mem, kaj ili ambaŭ kune revenis al monaĥejo de la Porciunkola, laŭdante kaj glorigante Dion, kiu estis doninta al ili la favoron por ke ili provu venki sin mem por sia malestimo, kaj por konsoli la ŝafojn de Kristo per la bona ekzemplo kaj por montri kiom malestiminda estas la mondo. Kaj tiun tagon tiom kreskis la emo de la popolo al ili, ke tiu, kiu povis tuŝi ilian veston, estis feliĉega. Je nomo de Kristo. Amen.

ĈAPITRO XXXI.

Kiel sankta Francisko tute konis la sekretojn da la konsciencoj de ĉiuj siaj fratoj.

Sam' kiel nia sinjoro Jesuo Kristo diris en la Evangelio: Mi konas miajn ŝafojn kaj ili konas min, k.t.p., tiel la patro sankta Francisko, kiel bona paŝtisto, konis per dia konigo ĉiujn meritojn kaj virtojn de siaj kunuloj kaj ŝajne li konis ankaŭ la difektojn; pro tio li sciis provizi por ĉiuj la necesajn rimedojn, tio estas humiligante la malhumilajn kaj laŭdegante la humilajn, malestimegante la malvirtojn, laŭdante la virtojn; kiel oni legas en la mirindaj konigoj, kiujn ni havas pri lia unua familio. Oni legas ke foje ĉe iu monaĥejo sankta Francisko priparolante pri Dio kun la dirita familio, kaj frato Rufino ne ĉeestante, pro tio ke li estis en la arbaro por mediti, dum la priparolado jen sama frato Rufino, kiu foriras el la arbaro kaj pasas iom malproksime. Tiam sankta Francisko, vidinte lin, sin turnis al la kunuloj kaj demandis ilin dirante: «Diru al mi, kiu estas la plej sankta animo, kiun Dio kreis?» Kaj tiuj respondinte ke ili kredas ke estas la lia, sankta Francisko diris: «Tre karaj fratoj, mi estas la plej malinda kaj la plej malhonorinda viro kreita de Dio en tiu ĉi mondo, sed ĉu vi vidas fraton Rufinon, kiu nun foriras de la arbaro? Dio konatigis al mi ke lia animo estas unu el la plej sanktaj, kiujn Dio kreis en la mondo; kaj mi firme diras al vi ke mi ne dubus konsideri lin sankta eĉ dum la vivo, ĉar lia animo estas sanktigita en ĉielo de nia sinjoro Jesuo Kristo». Kaj tiujn ĉi vortojn sankta Francisko neniam diradis je la ĉeesto de frato Rufino. Same, kiel sankta Francisko konis la difektojn de siaj fratoj, oni bone komprenas pro tio ke li ofte riproĉis fraton Helion pri lia malhumileco, kaj antaŭdiris ke frato Johano de la Cappella (elp. Kapela) mempendigos je la gorĝo, kaj korektis pri la malobeo tiun fraton, kiun la demono premis je la gorĝo, kaj per helpo de Kristo benata li konis la sekretajn difektojn kaj virtojn de multaj aliaj. Amen.

ĈAPITRO XXXII.

Kiel frato Maseo ricevis de Kristo la virton de la humileco.

La unuaj kunuloj de sankta Francisko kun granda zorgo penadis por esti malriĉaj pri la teraj aferoj kaj riĉaj de virtoj, per kiuj oni atingas la verajn ĉielajn kaj eternajn ĝojojn. Okazis foje ke dum ili kunestis kune por paroli pri Dio unu el ili diris tiun ĉi ekzemplon: «Iu, kiu estis vera amiko de Dio kaj ĝojis la favoron de la estazo, ĉar li estis ege humila, li sin konsideris tre pekanto; tiu humileco sanktigis lin kaj ĉiam pli igis lin kreski en la virto kaj en la favoro de Dio, kaj neniam ĝi permesis ke li falu en pekon». Aŭdinte frato Maseo tiajn mirindajn ecojn de la humileco kaj koninte ke ĝi estas trezoro de eterna vivo, li komencis flamiĝi je amo kaj deziro al la virto de la humileco, turnante tre fervore al ĉielo la vizaĝon; li firme promesis neniam ĝoji en tiu ĉi mondo, ĝis kiam li ne sentos perfekte en si mem tiun virton. Kaj de nun li seninterrompe restadis en sia ĉambreto pentofarante per fastoj, preĝoj kaj ploroj antaŭ Dio, por petegi al li tiun ĉi virton, sen kiu li sin juĝis inda de la infero. Kaj frato Maseo tion dezirinte dum multaj tagoj, okazis ke foje li eniris en arbaron, kaj en fervoro de spirito li fluigadis larmojn kaj per sopiroj kaj ĝemoj kaj fervora deziro demandadis al Dio tiun ĉi dian virton. Kaj, ĉar Dio volonte plenumas la peton de la uloj humilaj kaj pentitaj, frato Maseo tiamaniere pasiginte la tempon, venis voĉo el ĉielo, kiu alvokis lin dufoje: «Frato Maseo, frato Maseo»; kaj li inspire koninte, ke tiu estas la voĉo de Kristo, tiel li respondis: «Sinjoro mia, sinjoro mia ». Kaj Kristo al li: «Kion vi volas doni por havi la favoron, kiun vi demandas?». Respondas frato Maseo : «Sinjoro, mi volas doni la okulojn de mia kapo». Kaj Kristo al li: «Kaj mi volas ke vi havu la favoron kaj la okulojn». Kaj tion dirinte, la voĉo silentis, kaj frato Maseo restis plena je tiom da favoro de la dezirata virto de la humileco kaj de la dia lumo, ke de nun li estis ĉiam en ĝojo: kaj ofte, kiam li preĝis, forsendis per la buŝo malhelan sonon, kiel la kolombo: Hu! hu! hu!; kaj kun kontenta mieno kaj gaja koro restadis en estazo; kaj pro tio li, fariĝinte tre humila, sin konsideris la plej humila el ĉiuj homoj de la mondo. Demandita de frato Jakobo el Fallerono kial dum la ĝojo li ĉiam forsendadas tiun sonon, li respondis kun granda ĝojesprimo ke, kiam oni trovas la veran bonon, tiam oni devas ŝanĝi nenion. Je laŭdo de Kristo. Amen.

ĈAPITRO XXXIII.

Kiel sankta Klaro, je ordono de la Papo, benis unu panon, kiu estis sur la tablo : kaj pro tio sur la aliaj panoj aperis la signo de la sankta kruco.

Sankta Klaro, tre pia sekvantino de la kruco de Kristo kaj ĝentila kreskaĵo de sinjoro sankta Francisko, estis plena je tiom da sankteco, ke ne sole la episkopoj kaj la kardinaloj, sed ankaŭ la papo mem deziregis ŝin vidi, aŭskulti, kaj ofte li eĉ ŝin persone vizitis. Inter la aliaj fojoj la Sankta Patro iris al ŝia monaĥinejo por aŭdi ŝin parolanta pri la ĉielaj kaj diaj aferoj; kaj dum ili interparoladis, sankta Klaro preparigis la manĝotablojn kaj surmetigis la panon, por ke la Sankta Patro ĝin benu. Pro tio, fininte la interparoladon, sankta Klaro genuflegiĝis kaj petis ke la Papo bonvolu beni la panon de la tagmanĝo. Respondis la Sankta Patro: «Fratino Klaro, mi volas ke vi benu tiun panon kaj ke vi signu ĝin per la signo de la kruco de Kristo, al kiu vi vin dediĉis». Sankta Klaro diris: «Tre Sankta Patro, pardonu min, ĉar mi estus tre riproĉinda se antaŭ la vikario de Kristo, mi, malnobla virino, kuraĝus doni tiun benon». La Papo respondis: «Por ke tio ne ŝajnu malhumileco sed merito de obo, mi ordonas ke vi por sankta obo sur tiu ĉi pano faru la signon de la kruco kaj ĝin benu en nomo de Dio». Tiam sankta Klaro, kiel vera filino de la obo, tiujn panojn piege benis per la signo de la kruco. Mirindaĵo! tuj sur ĉiuj tiuj panoj aperis klare stampita la signo de la kruco kaj tiam la panoj estis manĝitaj esceptinte iujn, kiuj pro la miraklo, estis konservitaj. Kaj la Sankta Patro, vidinte la miraklon, prenis kelkajn bulkojn, dankis Dion kaj foriris lasante al sankta Klaro sian benon. Tiutempe loĝis ĉe sama monaĥinejo la monaĥino Hortulana, patri-no de sankta Klaro, kaj la monaĥino Agnezo, fratino de la sama, kun multaj aliaj sanktaj monaĥinoj, ĉiuj plenaj je virto kaj je sankta spirito. Al kiuj sankta Francisko sendis multajn malsanulojn, kaj ili per preĝoj kaj per la signo de la kruco ĉiujn resanigis. Je laŭdo de Kristo. Amen.

ĈAPITRO XXXIV.

Kiel sankta Ludoviko, reĝo de Francujo, pilgrime iris al Peruĝo por viziti la sanktan fraton Egidjon.

Sankta Ludoviko, reĝo de Francujo, pilgrimante iris por viziti la sanktejojn de la mondo, kaj aŭdinte pri la tre granda sankteco de frato Egidjo, kiu estis unu el la unuaj kunuloj de sankta Francisko, decidis lin viziti persone. Pro tio li venis al Peruĝo, kie tiutempe loĝis la dirita frato Egidjo. Kaj alveninte ĉe la pordo de la monaĥejo, kiel nekonata malriĉa pilgrimanto kune kun malmultaj kunuloj, insiste petis pri frato Egidjo, nenion dirante al pordisto, kiu li estas. Iras la pordisto al frato Egidjo, kaj li diras al li ke ĉe la pordo estas pilgrimanto, kiu demandas pri li: frato Egidjo per dia inspiro sciis ke tiu estas la reĝo de Francujo; pro tio kun granda fervoro tuj li foriras el la ĉambreto kaj kuras al la pordo nenion demandante kaj ili ambaŭ kune sin ĉirkaŭpremas kaj reciproke sin kisas, same kiel ili estus longatempe estintaj en granda amikeco. Sed dume nek unu nek la alia parolis, tamen ili kune ĉirkaŭpreme restis silente kun tiuj signoj de kora amo. Kaj post kiam ili restis tiel dum kelka tempo, nenion kune dirante unu forlasis la alian; kaj sankta Ludoviko reiris laŭ sia vojaĝo, kaj frato Egidjo revenis al sia ĉambreto. Foririnte la reĝo, iu frato demandis al unu el liaj kunuloj kiu estas tiu, kiu estis ĉirkaŭpreminta kun frato Egidjo; kaj tiu respondis ke li estas Ludoviko, reĝo de Francujo, kiu estis volinta viziti fraton Egidjon. Dirinte li ĉi tion al aliaj fratoj, ili havis grandan ĉagrenon pro tio ke frato Egidjo ne estis parolinta al li; kaj plendante ili diris: «Ho frato Egidjo, kial vi estis tiel malĝentila ke al tiu reĝo, kiu venis el Francujo por viziti vin kaj por aŭdi de vi kelkan vorton, vi nenion diris al li?». Respondis frato Egidjo: «Tre karaĵ fratoj, ne miru pri tio, se nek mi al li, nek li al mi ni parolis ĉar tuj post kiam ni reciproke nin ĉirkaŭpremis, la lumo de la dia scio konatigis al mi lian koron, al li la mian; kaj tiel per dia informo ni klare konis tion kion mi volis diri al li, kaj tion, kion li volis diri al mi, same kiel ni estus parolintaj per la buŝo kaj se ni estus volontaj klarigi per la voĉo tion, kion ni sentis en la koro, pro la nesufiĉo de la homa lango, kiu ne povas detale esprimi la sekretajn misterojn de Dio, ni anstataŭ estus havintaj senkonsolon ol konsolon. Kaj pro tio mi certigas vin ke la reĝo foriris de mi tre konsolita». Je laŭdo de Kristo. Amen.

ĈAPITRO XXXV.

Kiel sankta Klaro, dum ŝi estis malsana, estis mirakle portita, la nokton de Kristnasko, al la preĝejo de sankta Francisko kaj tie ŝi ĉeestis la diservon.

Foje sankta Klaro estis serioze malsana, tiel ke ŝi tute ne povis iri al preĝejo por diri la ofiĉon kun la aliaj monaĥinoj; kiam venis la festotago de la naskiĝo de Kristo, ĉiuj aliaj monaĥinoj iris por la matutino, ŝi sola restis en la lito plendante por ke ŝi ne povas iri kun la aliaj por ĝoji tiun spiritan konsolon. Sed Jesuo Kristo, ŝia spirita edzo, ne volis ŝin lasi senkonsolita, tiel li portigis ŝin al la preĝejo de sankta Francisko kie ŝi povis ĉeesti la tutan ofiĉon de la matutino kaj la meson de la nokto; kaj, krom tio, ŝi ricevis la sanktan Komunion kaj poste ŝi estis reportita al sia lito. Fininte la ofiĉo en sankta Damiano, la monaĥinoj revenis al sankta Klaro kaj ili diris al ŝi: «Ho patrino nia, fratino Klaro, kian belan konsolon ni ĝuis tiun ĉi nokton de la sankta naskiĝo! estus permesinta Dio ke ankaŭ vi estus ĉeestinta kun ni!» Kaj sankta Klaro respondis: «Fratinoj kaj filinoj miaj tre karaj, mi dankas kaj laŭdas mian sinjoron Jesuon Kriston, ĉar kun multa konsolo por mia animo mi ĉeestis la tutan solemon de tiu ĉi tre sankta festo; pro tio ke pere de mia sankta patro Francisko kaj pere de la favoro de mia sinjoro Jesuo Kristo, mi estis portita al la preĝejo de mia sankta patro Francisko, kaj per miaj homaj kaj spiritaj oreloj mi aŭdis la kanton kaj la sonorigon de la orgenoj, kaj tie ankaŭ mi ricevis la sanktan Komunion. Pro tioma favoro al mi farita ĝoju kaj dankunian sinjoron Jesuon Kriston». Amen.

ĈAPITRO XXXVI.

Kiel sankta Francisko klarigis al frato Leono belan vizion, kiun la lasta vidis.

Foje kiam sankta Francisko estis serioze malsana kaj frato Leono lin flegis, la lasta, preĝante apud sankta Francisko, estaziĝis kaj spirite iris al tre granda, larĝa kaj furioza rivero. Kaj li, rigardante tiujn, kiuj pasas, vidis kelkajn fratojn ŝarĝitajn eniri en la riveron, kiuj tuj, pro la furoro de la rivero, falis kaj dronis, kelkaj aliaj alvenis ĝis la triono, aliaj ĝis la duono de la rivero, kelkaj ĝis proksime de la alia bordo: sed ĉiuj, pro la rapideco de la akvo kaj pro la pezoj, kiujn ili havis kun si, falis kaj dronis. Vidinte tion, frato Leono havis grandan kompaton, sed tuj jen venas granda aro da fratoj sen ju ŝarĝo, en kiu briladis la sankta malriĉeco, kaj ili eniras en la riveron kaj transpasas ĝin sen iu danĝero. Kaj tiam sankta Francisko, inspire koninte ke frato Leono vidis kelkajn viziojn, alvokis lin al si, kaj demandis lin pri tio, kion li estis vidinta; kaj post kiam frato Leono la tutan vizion priskribis, sankta Francisko diris: «Kion vi vidis estas vera. La granda rivero estas tiu ĉi mondo; la fratoj, kiuj dronis estas tiuj, kiuj ne sekvas la Evangelion kaj precipe rilate la malriĉeco: sed tiuj, kiuj sendanĝere pasas, estas tiuj fratoj, kiuj en tiu ĉi mondo nenion nek mondan, nek karnan deziras kaj posedas; sed posedante nur moderajn vivon kaj veston, ili estas feliĉaj sekvi Kriston nude krukumita; sed la pezon kaj la dolĉegan jugon de Kristo kaj de la sankta oboe ili volonte kaj kontente portas; kaj facile de la monda vivo ili pasas al la vivo ĉiela».

ĈAPITRO XXXVII.

Kiel Jesuo Kristo benata, laŭ la preĝo de Sankta Francisko, konvertis riĉan kaj nobelan kavaliron, kiu estis farinta grandan honoron kaj oferdonon al sankta Francisko, kaj poste li monahiĝis.

Sankta Francisko servanto de Kristo, alveninte vespere malfrue ĉe tre riĉa nobelo, li kaj sia kunulo estis tre ĝentile kaj pie de tiu akceptitaj kiel anĝeloj de la paradizo. Pro tio sankta Francisko komencis tre ami lin, ĉar, kiam li eniris en lian hejmon, tiu amike lin ĉirkaŭpremis kaj kisis kaj poste li lavis, malsekigis kaj kisis liajn piedojn, kaj ekfajrigis grandan fajron kaj preparis multajn bonajn manĝaĵojn por la vespermanĝo; kaj dume ili manĝis, tiu tre ĝoje servadis. Post kiam sankta Francisko kaj la kunulo estis manĝintaj, tiu nobelo diris: «Jen, patro mia, nun mi oferdonas min mem kaj ĉiujn miajn bienojn; kvankam vi estas bezona nur de tuniko kaj de mantelo, aĉetu kaj mi pagos; kaj memoru ke mi estas preta provizi vin por ĉiuj viaj bezonoj, ĉar dank'al Dio mi povas tion fari pro tio ke mi havas multajn bienojn; kaj por dankemo al li, mi volonte donas al liaj malriĉuloj». Pro tio, vidinte sankta Francisko en li tiomajn ĝentilecon kaj amon kaj malavaran oferdonemon, sentis tiom da amo al li, ke forirante diris al sia kunulo: «Vere tiu ĉi nobelo estus taŭga por nia Ordeno, li vere estas danke- ma al Dio kaj amema kaj ĝentila al proksimularo kaj al la malriĉuloj. Sciu, frato tre kara, ke la ĝentileco estas unu el la donacoj de Dio, kiu ĝentile donas sian sunon kaj sian pluvon ĉu al la bonuloj, ĉu al la malbonuloj; kaj la ĝentileco estas fratino de la karito, tiu malfajrigas la malamon kaj konservas la amon. Kaj, ĉar mi konstatis en tiu ĉi bona viro grandan dian vir- ton, volonte mi volus lin kiel kunulo kaj tial mi volas ke alian fojon ni revenu al li kun la es- pero ke Dio tuŝu lian koron kaj li deziresprimu unuiĝi kun ni en la servado de Dio; kaj por tiu ĉi celo mi preĝos Dion, ke en lia koro li metu tiun ĉi deziron kaj ke li donu al li la favo- ron efektiviĝi ĝin». Mirindaĵo! post kelkaj tagoj, post konvena preĝo de sankta Francisko, Dio inspiris tiun ĉi nobelon; kaj sankta Francisko diris al sia kunulo: «Ni iru, frato mia, al tiu ĝentila viro: ĉar mi tute esperas en Dio, ke li, post la oferdono de ĉiuj siaj mondaj aĵoj, fariĝos nia kunulo. Kaj ili iris, kaj alveninte ĉe lia hejmo, sankta Francisko diris al kunulo: «Atendu mi iom, ĉar mi intencas preĝi Dion, por ke li bone sukcesigu nian vojaĝon, kaj ke li bonvolu konsenti pro virto de sia pasio, ke la bela kaptaĵo, kiun ni volas preni el la mondo, estu donaco por ni malriĉaj kaj malfortaj». Kaj tion dirinte, li komencis preĝi en loko kie tiu nobelo povas lin vidi: pro tio, kiel plaĉis al Dio, tiu viro dise rigardante, vidis sanktan Fran- ciskon piege preĝanta antaŭ Kristo, kiu kun granda lumeco estis al li aperinta kaj staris an- taŭ li. Kaj li vidis ke dum longa tempo sankta Francisko restis leviĝinta super la tero. Pro tio li estis tiel tuŝita de Dio per la deziro forlasi la mondon, ke tuj rapide li foriris de la palaco kaj en granda fervoro de spirito kuris al sankta Francisko, genufleksiĝis antaŭ li kaj kun var- ma deziresprimo kaj pieco petis ke li bonvolu lin ricevi por fari penton kune kun li. Tiam sankta Francisko, vidante ke sia preĝo estis de Dio plenumita, pro tio ke, tion, kion li dezi- ris, tiu nobelo petegis, li stariĝas, lin ĉirkaŭpremas kaj kisas pie dankante Dion, kiu bonvolis konduki al li alian evangelian kavaliron. Kaj tiu viro diris al sankta Francisko: «Kion vi or- donas ke mi faru? Jen mi estas preta al via ordono, doni al malriĉuloj ĉion, kion mi posedas, kaj kun vi sekvi Dion tute senŝarĝita de ĉia monda bieno». Kaj tiel okazis laŭ la ordono de sankta Francisko; li disdonis ĉiujn siajn propraĵojn al la malriĉuloj kaj eniris en la Ordenon; kaj li vivadis en granda pento kaj sankta vivo. Je laŭdo de Kristo. Amen.

ĈAPITRO XXXVIII.

Kiel sankta Francisko inspire konis ke frato Helio estis kondamnita kaj ke li devos morti for de la Ordeno.

Foje loĝante sankta Francisko ĉe iu monaĥejo kun frato Helio, Dio inspire sanktan Franciskon informis ke frato Helio estas kondamnita kaj ke li devos apostatiĝi el la Ordeno kaj fine morti for de la Ordeno mem. Pro tio sankta Francisko havis grandan doloron, tiel ke li ne interparoladis kun li; kaj se kelkafoje frato Helio iris al li, li apartiĝis, kaj iris al alia loko por ne renkonti lin. Frato Helio ekvidis kaj komprenis ke li estas malplezuriga al sankta Francisko; pro tio volante koni la kialon, li iun tagon alproksimiĝis al sankta Francisko por paroli al li; anstataŭ sankta Francisko malproksimiĝis, sed frato Helio ĝentile lin restigis kaj komencis petegi lin ke li bonvolu diri la kialon por kiu li ne ŝatas lian kuneston kaj lian interparoladon. Kaj sankta Francisko respondis: «La kialo estas jena; ĉar Dio inspiris min ke vi pro viaj pekoj apostatiĝos de la Ordeno, kaj ankaŭ vi mortos for de la Ordeno; kaj Dio eĉ inspiris min ke vi estas kondamnita». Aŭdinte tion frato Helio diras: «Riverencinda patro mia, mi petas vin por la amo al Jesuo Kristo, ke vi nek malproksimiĝu de mi, nek forpelu min de vi; sed kiel bona paŝtisto, laŭ la ekzemplo de Kristo, vi serĉu kaj ricevu la ŝafon, kiu pereos se vi ne helpos ĝin; kaj preĝu Dion por mi ke, se estas eble, li nuligu la sentencon de mia kondamno; ĉar oni legas ke Dio ŝanĝas ĝin se la pekanto korektiĝas; kaj mi tiel fidas en viaj preĝoj, ke se mi estus en la mezo de l' infero kaj vi preĝus Dion por mi, mi vere sentus iun dolĉigon; pro tio ankoraŭ mi petegas vin ke vi rekomendu min, pekanto, al Dio, kiu venis por savi la pekulojn, por ke li min ricevu en sia kompatato». Kaj frato Helio tion diris kun granda pieco kaj kun larmoj; pro tio sankta Francisko, kompatema patro, promesis ke li preĝos por li, kaj tion li faris. Kaj tre pie tiucele preĝante Dion, li inspire komprenis ke sia preĝo pri la nuligo de la sentenco de la kondamno de frato Helio estis kontentigita, kaj ke fine lia animo sin savos, sed ke tute certe li foriros de la Ordeno kaj ke for de la Ordeno li mortos. Kaj tiel okazis. Kontraŭstarinte al la Eklezio Frederiko, reĝo de Sicilio, la Papo ekskomunikis lin kaj kiun ajn donos al li helpon kaj konsilon; la dirita frato Helio, kiun oni konsideris unu el la plej saĝaj viroj en la mondo, demandita de la dirita reĝo Frederiko, alproksimiĝis al li kaj fariĝis ribela al la eklezio kaj apostata de la Ordeno; pro tio li estis ekskomunikita de la Papo kaj senigita de la vesto de sankta Francisko. Kaj en tiu kondiĉo li tre multe malsaniĝis: pri kiu malsaneco aŭdinte iu lia frato laiko, kiu estis restinta en la Ordeno kaj bone kaj honeste vivadis, iris lin viziti kaj interalie tion li diris: «Frato mia tre kara, multe dolorigas min ke vi estas ekskomunikita kaj ke for de la Ordeno vi mortos; sed se vi vidas ĉu vojon, ĉu manieron per kiu mi povu elpreni vin el la danĝero, volonte mi zorgados por vi». Respondas frato Helio; «Frato mia, alian manieron mi ne vidas ol ke vi iru al la Papo kaj ke vi petegu lin ke por la amo al Dio kaj al sankta Francisko, lia servanto, pro kies konsiloj mi forlasis la mondon, li absolvu mian ekskomunikon kaj redonu al mi la veston de la Ordeno». Tiu lia frato diris ke volonte li zorgos por lia savo; kaj, foririnte de li, li iris al Sankta Patro kaj humile petegis je liaj piedoj ke li pardonu fraton Helion por la amo al Kristo kaj al sankta Francisko, lia servanto. Kaj, kiel plaĉis al Dio, la Papo konsentis ke li revenu, kaj ke, se li trovos fraton Helion viva, li absolvu je lia nomo lian ekskomunikon kaj ke li redonu al li la veston. Pro tio la frato kontente forvojaĝis kaj tutrapide alvenis al frato Helio,

kaj trovis lin viva, sed tute proksima al la morto; kaj li absolvis lian ekskomunikon kaj, ree survestita de la vesto, frato Helio pasis el tiu ĉi vivo kaj lia animo trovis la savon pro la meritoj de sankta Francisko kaj pro la preĝo, en kiu frato Helio estis havinta tiel grandan esperon. Je laŭdo de Kristo Amen.

ĈAPITRO XXXIX.

Pri la mirinda prediko, kiun faris sankta Antono el Padovo, frato minorito, en koncistorio.

La mirinda ujo de la Sankta Spirito, sinjoro sankta Antono el Padovo, unu el la elektitaj disĉiploj kaj kunuloj de sankta Francisko, kiun tiu ĉi vokis sia proksimulo, foje predikante en koncistorio antaŭ la Papo kaj kardinaloj (kiun koncistorion ĉeestis viroj el diversaj nacioj, tio estas grekoj, latinoj, francoj, germanoj, slavoj, kaj angloj kaj el aliaj diversaj lingvoj de la mondo): enflamiĝinta de Sankta Spirito tiel efike, tiel pie, tiel profunde, tiel dolĉe kaj tiel klare li preparolis pri Dio, ke ĉiuj, kiuj ĉeestis, kvankam de malsimilaj lingvoj, klare komprenis liajn vortojn tiel, kiel se li estus parolinta en la lingvo de ĉiu el ili, kaj ĉiuj miregis kaj ŝajnis al ili ke renoviĝas tiu antikva miraklo de la apostoloj dum la Pentekosto, kiuj ĉiulingve parolis per la volo de la Sankta Spirito. Kaj ili diris unu al alia kun admiro: «Ĉu ne estas hispano tiu, kiu predikas? kaj kial ni aŭdas nian lingvon kiam li parolas?» La Papo miregis pri la klereco de liaj vortoj kaj diris; «Vere tiu estas kestego de la Testamento kaj ŝranko de la dia Skribo». Je laŭdo de Kristo. Amen.

ĈAPITRO XL.

Pri la miraklo, kiun Dio faris, kiam sankta Antono en Rimini predikis al la fiŝoj de la maro.

Kristo benata, dezirante elmontri la grandan sanktecon de sia tre fidela servanto sankta Antono, kaj kiom pie oni devas aŭskulti lian predikadon kaj lian sanktan doktrinon, per nerezonantaj brutoj, tio estas la fiŝoj, riproĉis la frenezecon de nefidelaj herezuloj sam' kiel antikve en la malnova Testamento per la buŝo de azenino estis riproĉinta la malsciemecon de Balaamo. Tiel, estante foje sankta Antono en Rimini, kie estis granda aro da herezuloj, volante li ilin rekonduki al la lumo de la vera fido kaj sur la vojjon de la vereco, dum multaj tagoj li predikis al ili kaj pridiskutadis pri la fido al Kristo kaj pri la Sankta Skribo: sed ili, ne sole malkonsentante al liaj sanktaj diroj, sed ankaŭ, kiel neflekseblaj kaj obstinaj, ne volante lin aŭdi, sankta Antono iun tagon laŭ dia inspiro, iris al la rivero flanke de la maro ; kaj starante tiel sur la bordo inter la maro kaj la rivero komencis predike paroli je nomo de Dio al la fiŝoj: «Aŭdu la dian parolon vi, fiŝoj de la maro kaj de la rivero, ĉar la malfidelaj herezuloj hontegas ĝin aŭdi» kaj post kiam li tion diris, tuj venis ĉe la bordo al li tiom granda amaso da fiŝoj grandaj, malgrandaj kaj duonkreskaj, kiom neniam en tiu tuta maro kaj tiu rivero estis vidita tiel granda kvanto, kaj ĉiuj tenis la kapon for el la akvo, kaj ĉiuj restis atentaj al la vizaĝo de sankta Antono kaj ĉiuj en granda paco kaj trankvileco kaj ordo; ĉar antaŭe kaj pli proksime de la bordo estis la duonkreskaj fiŝoj: poste, malantaŭe la fiŝoj pligrandaj. Estante do en tiu dispono la fiŝoj, sankta Antono komencis solene prediki kaj tion diri: «Fiŝoj, fratoj miaj, multe vi devas, laŭ via povo, danki nian kreinton, kiu donis al vi tiun noblan elementon por via loĝejo, tiel ke, kiel plaĉas al vi, vi havas dolĉajn kaj salitajn akvojn, kaj li donis al vi multajn rifuĝejojn por vin ŝirmi de la ventegoj; li ankaŭ donis al vi elementon klaran kaj diafanan kaj nutraĵon, per kiu vi povu vivi. Dio, via kreinto ĝentila kaj bona, kiam kreis vin, ordonis ankaŭ al vi kreski kaj multobliĝi, kaj li donis al vi sian benon: plie, kiam okazis la tutmonda akvego, ĉiuj bestoj mortis, vin solajn Dio sendanĝere konservis. Eĉ li donis al vi la naĝilojn por ke vi povu alnaĝi kien vi volas. Al vi estis permesite, laŭ dia ordono, konservi Jonon profeton kaj la trian tagon postan formeti lin teren sana kaj savita. Vi oferdonis la monon al nia sinjoro Jesuo Kristo, ĉar li, malriĉulo, nenion havis por pagi. Ankaŭ vi fariĝis manĝaĵo por la eterna reĝo Jesuo Kristo antaŭ lia reviviĝo kaj poste, pro speciala mistero. Pro ĉiuj ĉi aferoj vi estas tre devigataj laŭdi kaj beni Dion, kiu donis al vi tiajn kaj tiomajn bonfarojn pli ol al aliaj kreitaĵoj». Al tiuj ĉi kaj similaj vortoj kaj instruoj de sankta Antono la fiŝoj komencis malfermi la buŝojn kaj klini la kapojn; kaj per tiuj ĉi kaj iliaj salutodonaj signoj, laŭ aliaj eblaj manieroj, ili laŭdis Dion. Tiam sankta Antono, vidinte tiom da respekto de la fiŝoj al Dio kreinto, spirite ĝojante, laŭte diris : «Benata estu Dio eterna, ĉar pli honorigas lin la fiŝoj de la akvoj ol la herezuloj, kaj plibone aŭdas lian parolon la brutoj nerezonantaj ol la nefidelaj homoj». Kaj ju pli sankta Antono predikis, des pli la kvanto de la fiŝoj kreskis, kaj neniu el ili fornaĝis el la loko, kiun ĝi estis preninta. Okaze de tiu ĉi miraklo la popolo de la urbo alkuris, inter kiu estis ankaŭ la suprediritaj herezuloj. Kiuj, vidinte tiel mirindan kaj nerefuteblan miraklon, pentitaj en siaj koroj, ĉiuj sin ĵetis al la piedoj de sankta Antono por aŭdi lian predikon. Tiam sankta Antono komencis prediki pri la katolika fido, kaj tiel bone li predikis, ke ĉiujn tiujn herezulojn li konvertis kaj revenigis ilin al la vera fido de Kristo; kaj ĉiuj fideluloj restis kun granda ĝojo konsolitaj kaj firmigitaj en

la fido. Kaj tion ĉi farinte sankta Antono forsendis la fiŝojn per la dia beno, kaj ĉiuj foriris kun mirindaj signoj de kontenteco, kaj same la popolo; kaj poste sankta Antono restis en Rimini dum multaj tagoj predikante kaj donante grandan spiritan frukton al la animoj. Je laŭdo de Kristo. Amen.

ĈAPITRO XLI.

Kiel la respektinda frato Simono liberigis el granda tento iun fraton, kiu pro ĝi volis ekŝiĝi el la Ordeno.

Preskaŭ je la komenco de la Ordeno, dum la vivo de sankta Francisko, venis al Ordeno junulo el Asizo, kiu estis nomata frato Simono; kiun Dio ornamis kaj dotis per tiom da favoroj kaj tiom da pripensemo, ke dum la tuta vivo li estis spegulo de sankteco, laŭ tio, kion mi aŭdis de tiuj, kiuj longatempe estis kune kun li. Oni malofte lin vidis for de sia ĉambreto; kaj, se kelkafoje li kunestis kun la fratoj, ĉiam li parolis pri Dio. Li neniam estis lerninta gramatikon, tamen tiel profunde kaj tiel alte li parolis pri Dio kaj pri la amo al Kristo, ke liaj vortoj ŝajnis supernaturaj vortoj. Eĉ vesperon irinte en arbaron kune kun frato Jakobo el Massa por paroli pri Dio, kaj tre dolĉe ili parolante pri la dia amo, ili daŭrigadis dum la tuta nokto parolante pri tio; kaj je la mateno ŝajnis al ili esti pasigintaj tre malgrandan daŭron da tempo, laŭ la informo al mi donita de la dirita frato Jakobo. Kaj la dirita frato Simono tiom ĝojis pri la diaj klarigoj kaj pri la amaj vizitadoj de Dio, ke ofte, kiam li sentis ke ili venas, li kuŝiĝis en la lito, ĉar la trankvila ĝojeco de la spirito devigis lin ne sole ripozi kun la menso, sed ankaŭ kun la korpo. Kaj dum tiuj diaj vizitadoj multfoje li estaziĝis en Dio kaj tute fariĝis sensenta pri la korpaj aferoj. Tial foje kiam li estis tiamaniere estaziĝinta en Dio kaj sensenta je la mondo, interne li bruliĝis je dia amo kaj ekstere nenion li sentis per la korpaj sentoj; iu frato volante konstati tion kaj vidi ĉu la afero estas kiel ŝajnas, li iris kaj prenis fajran karbon kaj ĝin almetis sur senvestitan piedon; kaj frato Simono tute ĝin ne sentis, kaj ĝi neniun signon lasis sur la piedo, kvankam longatempe ĝi restis tie, ĝis kiam ĝi per si mem malfajriĝis. Kiam la dirita frato Simono sidiĝis apud la manĝotablo antaŭ ol tuŝi la por korpan manĝaĵon, prenis por si kaj donis al la aliaj spiritan manĝaĵon parolante pri Dio. Pro kies pia kutimo foje sin konvertis iu junulo el Sankta Severino kiu estis en la mondo tre vanta kaj malserioza nobelo kaj tre delikata je korpo. Kaj frato Simono, ricevante la diritan junulon en la Ordeno, volis teni liajn mondajn vestojn. La demono, kiu zorgas malsukcesigi ĉiun bonon, enmetis en la junan fraton tiel fortan instigon al peko kaj fajran karnan tenton, ke neniel li povis kontraŭstari. Pro tio li iris al frato Simono kaj diris al li: «Redonu al mi miajn vestojn, kiujn mi portis de la mondo, ĉar mi ne plu povas kontraŭstari la karnan tenton». Kaj frato Simono kun granda kompatato diris al li: «Filo, sidiĝu tie ĉi iom kun mi»; kaj li komencis paroladi pri Dio tiel ke ĉiu tento foriris; kaj post kelka tempo reveninte la tento, kaj li ripetinte la vestojn, frato Simono reforpelis la tenton reparolante pri Dio. Kaj okazinte pliajn fojojn, fine iun nokton la sama tento atakis lin tiel forte, pli ol antaŭe, ke li tute ne povante kontraŭstari, iris al frato Simono petegante por rehavi siajn mondajn robojn, ĉar tute li ne povas plu rezisti. Tiam frato Simono, laŭ la kutimo, sidigis lin apud si kaj parolante al li pri Dio, la junulo pro melankolio kaj malĝojo kapkliniĝis sur la surgenuo de frato Simono. Tiam frato Simono pro la granda kompatato, kiun li havis, turnis al ĉielo la okulojn kaj tre pie preĝante Dion por li, estaziĝis kaj la preĝo atingis la celon: pro tio la junulo tute sin sentis liberigita de tiu tento, kiel se li neniam estus ĝin sentinta. Anstataŭ la flamo de la tento sin ŝanĝis en flamo de la Sankta Spirito, ĉar li alproksimiĝis al flamiĝanta karbo, tio estas frato Simono; tiel li enflamiĝis por la amo al Dio kaj al la proksimuleco, ke iufoje, ĉar oni devis senokuligi malbon faranton, li kuraĝe iris al rektoro por peti ke unu okulon oni levu al li kaj alian oku-

lon al la alia por ke la malfeliĉulo ne restu tute blinda. Sed la rektoro kaj lia konsilantaro, vidinte la karitan fervoron de la monaĥo, pardonis al unu kaj al la alia. Dum la dirita frato Simono estis tagon en la arbaro por preĝi kaj sentante grandan konsolon en sia animo, aro da kornikoj per sia kriadado ĝenadis lin: pro tio li ordonis al ĝi je nomo de Jesuo ke ĝi forflugu kaj ne plu revenu. Kaj la diritaj birdoj forflugis, kaj de nun oni plu nek vidis, nek aŭdis en la tuta ĉirkaŭaĵo. Kaj tiun ĉi miraklon oni konis en la monaĥejo de Ferino, en kiu estis la dirita frato. Je laŭdo de Kristo. Amen.

ĈAPITRO XLII.

Pri belaj mirakloj faritaj de Dio per kelkaj fratoj.

La provinco de la Markolando de Ankono estis antikve ornamita, kiel la ĉielo de la steloj, de sanktuloj kaj de imitindaj fratoj; kiuj, kiel ĉielaj lumoj, lumigis kaj ornamis la Ordenon de sankta Francisko kaj la mondon per ekzemploj kaj scienco. Inter la aliaj unue estis frato Luĉido (esper. Luma), kiu estis vere lumiganta pro sankteco kaj brulanta pro dia karito; kies lango, instruita de la Sankta Spirito, donis mirindajn fruktojn de predikado. Alia estis frato Bentivoglio [Bentivoljo], kiun frato Maseo vidis aere leviĝinta dum longa spaco da tempo dum li estis preĝanta en la arbaro; pro kiu miraklo la dirita frato Maseo, kiu estis paroĥestro, forlasis la paroĥon kaj fariĝis minorito; kaj li estis je tiom da sankteco, ke li faris multajn miraklojn dum la vivo kaj post la morto, kaj lia korpo ripozas en Murro. La dirita frato Bentivoglio foje loĝante sola en Trave Bonanti por gardi kaj flegi leprulon, ricevinte la ordonon de la prelato foriri por iri al alia loko, kiu estas dek mejlojn malproksime, ne volante forlasi tiun leprulon, kun granda fervoro de karito tiun li prenis kaj lin surŝarĝis sur siaj ŝultroj kaj portis lin de la matenuro ĝis la sunleviĝo laŭlonge la tuta vojo je dek-kvin mejloj, ĝis la dirita loko, kiu estas Monto Sanĉino, kien li estis sendita. Tiun vojaĝon, se li estus estinta aglo, li ne estus povinta tiel mallonga-tempe fari flugante; kaj tiu ĉi miraklo donis grandan miron en la tuta lando. Alia estis frato Petro el Montiĉello (esper. Monteto); lin vidis frato Servodeo el Urbino (tiutempe gardanto en la malnova monaĥejo en Ankono), leviĝinta korpe de la tero kvin aŭ ses brakojn ĝis la krucumito de la preĝejo, dum li estis preĝanta. Tiu ĉi frato Petro, fastante foje la antaŭtagon de la festo de la sankta ĉefanĝelo Miĥaelo, dum li estis en la preĝejo preĝante, juna frato (restinte kaŝita sub altaro por konstati kelkan lian sanktecan agon) aŭdis ke li interparolas kune kun la sankta ĉefanĝelo Miĥaelo, kaj iliaj vortoj estis jenaj. Diris sankta Miĥaelo: «Frato Petro, vi fidele penadis por mi kaj diversmaniere vi humiligis vian korpon; jen mi venis por vin konsoli, petu kiun ajn favoron kaj mi perados por ĝi ĉe Dio». Respondis frato Petro: «Tre sankta princo de la ĉiela armeo kaj fidela disvastiganto de la dia amo kaj kompatema protektanto de la animoj, mi demandas al vi jenan favoron, ke vi petegu al Dio la pardonon de miaj pekoj». Respondis sankta Miĥaelo: «Petu alian favoron, ĉar tiun ĉi mi tre facile havigos al vi»; kaj, ĉar frato Petro nenion alian demandis, la ĉefanĝelo konkludis: «Mi pro viaj fido kaj pieco al mi, havigos al vi tiun ĉi favoron kaj multajn aliajn». Kaj, finita la interparolado, kiu longatempe daŭris, la ĉefanĝelo sankta Miĥaelo foriris, lasante lin tre konsolita. Dum la tempo de tiu ĉi sankta frato Petro estis la sankta Konrado el Offida, kiu, loĝante ĉe la monaĥejo de Forano apud la urbo Ankono, iris tagon en arbaron por mediti pri Dio, kaj kaŝe frato Petro sekvis lin por vidi kion li faras; frato Konrado komencis plorante piege preĝi la Virgan Marion, por ke ŝi havigu al li jenan favoron: ke li povu senti iom da tia dolĉeco, kiun sentis sankta Simono la tagon de la Puriĝo, kiam li havis inter siaj brakoj la benatan Jesuon savinton. Kaj la sankta Virga Mario kontentigis lin, ĉar ŝi aperis al li kun sia benata filo; ŝi, alproksimiĝante al frato Konrado, metis sur liajn brakojn sian benatan filon, kiun li ricevis piege kaj ĉirkaŭpremanante kaj kisante lin, tute li ĝojegis je nepriskribebla konsolo. Kaj same frato Petro, kiu kaŝe ĉion vidis, sentis en sia animo grandan dolĉecon kaj konsolon. Foririnte Virga Mario de frato Konrado, frato Petro rapide revenis al monaĥejo por ke la alia ne vidu lin; sed poste, kiam frato Konrado tute

kontenta kaj ĝojoplena revenis, frato Petro diris al li: «Ho vi feliĉa, grandan konsolon hodiaŭ vi havis». Demandis frato Konrado: «Kio estas tio, kion vi diras, frato Petro? Kaj ĉu vi scias kio okazis al mi?». «Bone mi scias, bone mi scias, diradis frato Petro, ke Virga Mario kun sia benata filo vin vizitis». Tiam frato Konrado humile petis lin ke li nenion diru al persono kaj de nun estis tiel granda la amo inter la du, ke en ĉio inter ili ŝajnis esti una sola koro, unu sola animo. Kaj foje la dirita frato Konrado, ĉe la monaĥejo en Sirolo, per siaj preĝoj liberigis virinon prenititan de la demono preĝante por ŝi la tutan nokton kaj aperante al ŝia patrino, kaj la matenon li forkuris por ne esti honorata de la popolo. Je laŭdo de Kristo. Amen.

ĈAPITRO XLIII.

Kiel frato Konrado el Offida konvertis junan fraton, kiu ĝenis la aliajn fratojn. Kaj kiel la dirita juna frato mortinte aperis al dirita frato Konrado petante ke li preĝu por li, kaj kiel li per sia preĝo liberigis lin de la grandegaj doloroj de la purgatorio.

La dirita frato Konrado el Offida, mirinda diskoniganto de la evangelia malriĉeco kaj de la institucio de sankta Francisko, tiel religie vivis kaj posedis tiel grandan meriton ĉe Dio, ke Kristo benata dum lia vivo kaj dum lia morto honorigis lin per multaj mirakloj; inter kiuj foje veninte li al monaĥejo de Offida, la fratoj lin petis por la amo al Dio kaj al la karito ke li admonu iun junan fraton, kiu estas kun ili, kiu sin kondukis tiel infane kaj malorde kaj malĉaste, ke la maljunulojn kaj junulojn de la monaĥejo li tre ĝenis, kaj pri la dia ofiĉo kaj pri la aliaj obeoj al la regularo li neniom aŭ tro malmulte sin priokupis. Pri tio frato Konrado, pro kompato al tiu junulo kaj pro la petoj de la fratoj, flanken alvokis la diritan junulon kaj fervore diris al li tiujn efikajn kaj piajn instruigajn parolojn, ke per la ago de la dia favoro li tuje fariĝis de infano maljunulo je moroj kaj tiel obeema kaj humila kaj diligenta kaj pia, kaj poste tiel trankvila kaj servema kaj priokupata pri ĉio, ke la antaŭe tute ĝenita kunfrataro fariĝis kontenta kaj konsolata kaj ĝi tre amis lin. Okazis, kiel plaĉis al Dio, ke malmultajn tagojn post sia konvertiĝo la dirita frato mortis; pri kio la diritaj fratoj multe plendis, kaj malmultajn tagojn post lia morto la animo aperis al frato Konrado dum li pie estis preĝanta ĉe la altaro de la dirita monaĥejo kaj ĝi lin salutis pie; kaj frato Konrado demandas lin: «Kiu vi estas?». Respondas ĝi: «Mi estas la animo de tiu juna frato, kiu antaŭ malmultaj tagoj mortis». Kaj frato Konrado: «Ho tre kara filo, kio estas pri vi?». Respondas la alia: «Pro la dia favoro kaj pro via instruado la afero bone sukcesis, ĉar mi ne estas kondamnita; sed pro iuj miaj pekoj, kiujn mi ĝustatempe ne purigadis sufiĉe, mi suferas la tre grandajn dolorojn de la purgatorio; pro tio mi petegas vin, patro, ke same kiel per via pieco vi helpis min kiam mi estis vivanta, tiel nun bonvolu helpi min dum miaj doloroj, dirante kelkajn patro-nia'jn, ĉar via preĝo estas tre akceptinda ĉe Dio». Tiam frato Konrado bone konsentis al liaj petoj kaj dirinte li unufoje la patro-nia'n kaj unu *requiem aeternam*, tiu animo diris: «Ho patro tre kara, kiom da bono, kaj kiom da profito mi sentas! nun mi petas ke ree ĝin diru» Kaj frato Konrado ĝin diras, kaj la animo daŭrigante: «Sankta patro, kiam vi preĝas por mi, mi tute sentas min plisaniĝanta; pro tio mi petegas vin ke vi ne forlasu preĝi por mi». Tiam frato Konrado, konstatinte ke tiu animo estis tiamaniere helpata per liaj preĝoj, li diris por ĝi cent patronia'jn, kaj poste tiu animo diris: «Mi dankas vin, tre kara patro, je nomo de Dio, pri la karito, kiun vi havis por mi; ĉar pro via preĝado mi estas liberigata de ĉiuj doloroj kaj nun mi iras al ĉiela regno». Kaj tion dirinte, tiu animo malaperis. Tiam frato Konrado por ĝojigi kaj konsoli la fratojn, rakontis al ili pri tiu vizio. Je laŭdo de Kristo Amen.

ĈAPITRO XLIV.

Kiel la Dipatrino kaj sankta Johano Evangeliisto aperis al frato Konrado; kaj ili diris al li, kiu el ili pli suferis pri la Pasio.

Kiam la suprediritaj frato Konrado kaj frato Petro (kiuj estis du lumigantaj steloj kaj du ĉielaj viroj de la Markolanda provinco) loĝis kune en la monaĥa distrikto de Ankono ĉe la monaĥejo de Forano, ĉar inter ili estis tiom da amo kaj tiom da karito, ke en la du ŝajnis esti sama koro kaj sama animo, ili kunligis sin kune per jena interkonsento: ke ĉiu konsolo, kiun la dia kompato estus al ili faronta, ili devu karite reciproke elmontri. Post la starigo de tiu interkonsento, okazis foje ke Petro, preĝante kaj pie pensante la pasion de Kristo, kaj ĉar la feliĉega Patrino de Kristo kaj santa Johano, tre amata disĉiplo, kaj sankta Francisko estis pentritaj piede de la kruco, per spirita doloro krucumitaj kune kun Kristo; venis al li la deziro scii kiu el ili tri sentis pligrandan doloron pro la pasio de Kristo; ĉu la Patrino, kiu lin naskis, ĉu la disĉiplo, kiu estis dorminta sur lia brusto, ĉu sankta Francisko, kiu estis kun Kristo krucumita. Kaj tion ĉi pie pensante, ekaperis al li Virga Mario kun sankta Johano Evangeliisto kaj kun sankta Francisko, vestitaj per tre ĉarmaj vestaĵoj de gloro beata; sed sankta Francisko ŝajnis vestita per pli bela vestaĵo ol sankta Johano. Pro tiu apero frato Petro tute teruriĝis, sed sankta Johano lin komfortis kaj diris: «Ne timu, tre kara frato, ĉar mi venis por vin konsoli kaj klarigi al vi vian dubon. Do sciu ke la Patrino de Kristo kaj mi pli ol ĉiu homo sentis doloron pro la pasio de Kristo: sed post ni sankta Francisko havis pli grandan doloron ol ĉiu alia; kaj tial vi lin vidas en tiom da gloro». Kaj frato Petro lin demandas: «Tre sankta apostolo de Kristo, kial la vestaĵo de sankta Francisko ŝajnas pli bela ol la via?». Respondis sankta Johano: «La kialo estas jena: ĉar, kiam li estis en la mondo, li sin survestis per pli humilaj vestaĵoj ol mi». Kaj sankta Johano, dirinte tiujn. ĉi vortojn, donis al frato Petro gloran vestaĵon, kiun li havis en mano, kaj diris al li: «Prenu tiun ĉi vestaĵon, kiun mi portis por ĝin doni al vi»; kaj, ĉar sankta Johano per tiu vestaĵo volis lin vesti, frato Petro, miregita, falis teren kaj ekkriis: «Frato Konrado, frato Konrado, helpu min tuj; venu por vidi mi-rindaĵon». Kaj je tiuj ĉi vortoj tiu sankta vizio malaperis. Poste, veninte frato Konrado, li ĉion akurate priskribis al li kaj ili dankis Dion.

ĈAPITRO XLV.

Pri la konverto kaj vivo kaj mirakloj kaj morto de la sankta frato Johano el Verno.

Frato Johano de la Plumo, dum li estis knabo kaj lernanto en provinco de Markizlando, iun nokton aperis al li infano tre bela, kiu lin alvokis dirante: «Johano, iru al sankta Stefano, kie predikas unu el miaj fratoj minoritoj, al kies doktrino kredu kaj al kies vortoj prizorgu, ĉar mi mem sendis lin tien; kaj post kiam vi estos farinta longan vojaĝon, vi venos al mi». Pro tio li tuje ellitiĝis, kaj en sia animo li sentis grandan ŝanĝon, kaj iris al sankta Stefano, kaj tie li vidis grandan popolamason atendanta la predikon. Kaj tiu, kiu devos prediki, estis unu el la unuaj fratoj, kiuj venis en la Markizlandon Ankono (ĝis nun malmultaj monaĥejoj estis en la Markizlando). Tiu frato Filipino supreniras sur la predikseĝon, pie li preĝas kaj ne per vortoj de homa scienco li predikas anoncanta la regnon de eterna vivo, sed per vortoj de spirito de Kristo. Kaj fininte li la predikon, la dirita knabo alproksimiĝis al frato Filipino kaj diris al li: «Patro se al vi plaĉas ricevi min en la Ordeno, mi volonte pentofarus kaj mi servus nian sinjoron .Jesuon Kriston». Frato Filipino konstatinte en la dirita knabo mirindan senkulpecon kaj firman volon servi Dio, tiel li diris: «venu al mi la difinitan tagon al Rekanato, kaj mi ricevigos vin». En tiu monaĥejo estis okazonta provinca kunsido. La knabo, kiu estis tre naiva, pensis ke tiu estis la longa vojaĝo, kiun, laŭ la inspiro ricevita, li devos plenumi antaŭ ol iri en paradizon. Do li iris, kaj li estis ricevita en la Ordonon; kaj naive li, konstatinte ke sia deziro ne plenumiĝas, tiam, ĉar la ministro dum la kunsido estis dirinta ke, kiu ajn volas iri al provinco de Provenco por la merito de la sankta oboe, li volonte donus la permeson; la knabo tre deziris iri tien, pensante en sia koro ke tiu estas la longa vojaĝo, kiun li devos fari antaŭ ol iri en paradizon. Sed li hontis ĝin diri; fine li konfidis tion al frato Filipino, kiu estis riceviginta lin en la Ordenon, kaj li varme petis lin ke li petegu por li la favoron iri al la provinco de Provenco. Tiam frato Filipino, vidante lian senkulpecon kaj lian sanktan deziron, ricevis por li la permeson: pro tio frato Johano tutkontente ekalvojaĝis kun la firma opinio ke, post la plenumo de la vojaĝo, li iros en paradizon. Sed, kiel plaĉis al Dio, li, ĉiam atendente kaj dezirante, restis en tiu provinco dum dudek kvin jaroj, vivante en granda honesteco kaj sankteco kaj ekzempleco, ĉiam pligrandigante la virtoj en la favoro de Dio kaj de la popolo, kaj li estis tre amata de la fratoj kaj de la laikoj. Foje frato Johano pie preĝante kaj plorante kaj plendante, ĉar lia deziro ne plenumiĝas ankoraŭ kaj ĉar lia pilgrimo en tiu ĉi vivo troe longiĝas; aperis al li Kristo benata, pro kies apero lia animo tute konfuziĝis, kaj Kristo diris al li: «Filo frato Johano, petu kion vi volas». Kaj la alia respondas: «Sinjoro mia, mi ne scias kion peti krom vi, ĉar nenion alian mi deziras; sed nur pri jeno mi vin petas, ke vi pardonu ĉiujn miajn pekojn kaj ke mi povu revidi vin kiam mi havos pligrandan bezonon». Diris Jesuo: «Kontentigita estas via preĝo»; kaj tion dirinte li malaperis, kaj frato Johano restis tute konsolita. Fine koninte la fratoj de la Markizlando la famon de lia sankteco, tiom ili petegis la estron, ke li sendis al li la ordonon ke li revenu. Tiun ordonon li kontente ricevis, kaj ekalmarŝis pensante ke post la alveno, li iros en paradizon, laŭ la promeso de Kristo. Sed, post sia reveno en Markizlandon, li vivadis ankoraŭ en ĝi dum la daŭro de tridek jaroj kaj neniu el liaj parencoj konis lin, kaj li ĉiutage atendis ke la kompatemo de Dio plenumu la promeson. Kaj dum tiu tempo plurfoje li estis gardanto de la monaĥejo kun granda diskreteco, kaj Dio por li faris multajn miraklojn. Kaj inter la aliaj favoroj, kiujn li ri-

cevis de Dio, li ricevis ankaŭ tiun de la profeteco; pro tio foje, vojirante li for de la monaĥejo, unu el liaj novicoj estis tiel forte tentita de la demono, ke li konsentis la tenton, kaj en si mem li decidis ekŝiĝi de la ordeno tuj kiam frato Johano estos reveninta. Per la spirito de profeteco Johano konis la tenton kaj la decidon, kaj tute rapide li revenis al monaĥejo, alvokis al si la diritan novicon kaj diris ke li volas ke li sin konfesu. Sed antaŭ ol la alia sin konfesu, li klare elmontris al li lian tenton, same kiel Dio inspiris, kaj poste konkludis: «Filo, pro tio ke vi atendis min kaj vi ne volis foriri sen mia beno, Dio donis al vi tiun ĉi favoron, ke neniam vi foriros el la Ordeno, sed ke en la Ordeno vi mortos kun la dia kompatemo». Tiam la dirita novico refirmigis sian bonan volon kaj, restinte en la Ordeno, li fariĝis sankta frato: ĉiujn ĉi aferojn rakontis al mi, frato Ugolino, la sama frato Johano. Tiu estis krom ĉio ankaŭ viro kontenta sed singardema kaj malofte li babiladis, kaj li estis viro je multa preĝado kaj granda pieco, kaj precipe post la matutino neniam li revenis en sian ĉambregon, sed li restadis en preĝejo ĝis la tagiĝo ĉiam preĝante; foje, dum li preĝadis post la matutino, aperis al li la anĝelo de Dio, kiu diris al li: «Frato Johano, vi estas en la fino de la vojiro, kiun vi tiel longe atendis, kaj pro tio mi je nomo de Dio anoncas al vi, ke vi petu kiun ajn favoron vi deziras. Kaj ankaŭ mi anoncas al vi ke vi elektu kion vi volas, ĉu unu tagon en purgatorio, ĉu sep tagojn da suferoj en tiu ĉi mondo». Kaj elektinte frato Johano prefere sep tagojn da sufero tiu ĉi mondo, tuj li malsaniĝis je pliaj malsanoj; ĉar kaptis lin granda febro, la podagro sur la manoj kaj sur la piedoj, la malsano je la flankoj kaj multaj aliaj malsanoj. Sed la plej malbona afero estis, ke iu demono staris antaŭ li tenante grandan paperon, sur kiu estis skribitaj ĉiuj pektoj, kiujn li faris aŭ pensis; kaj la demono diris: «Pro tiuj ĉi pektoj, kiujn vi faris per la penso, kaj per la lango, kaj per la agoj, vi estas kondamnita al la profunda infero». Kaj li ne plu rememoris pri neniu bono, kiun li estas farinta, nek ke li estas en la Ordeno, nek ke li iam apartenis al ĝi; sed nur li pensis esti kondamnita kiel la demono lin informas. Pro tio kiam oni demandis lin, kiel li fartas, li respondis: «Tre malbone, ĉar mi estas kondamnita». Aŭdinte tion, la fratoj alvokigis iun tre maljunan fraton nomata frato Mateo el Monto Rubiano, kiu estis sankta viro kaj amiko de frato Johano. Alvenis al li la dirita frato Mateo je la sepa tago de la sufero, kaj li salutis lin kaj demandis al li kiel li fartas. Li respondis ke li fartas malbone, ĉar li estas kondamnita. Tiam irato Mateo diris: «Ĉu vi ne memoras nun ke vi multfoje vin konfesis per mi, kaj ke mi tute absolvis vin pri viaj pektoj? Ĉu vi ne memoras ankoraŭ ke vi servadis Dion en tiu ĉi Ordeno multajn jarojn? Ankaŭ, ĉu vi ne memoras ke la kompato de Dio superas ĉiujn pektojn de la mondo kaj ke Kristo benata, nia savinto, pagis grandegan prezon por reaĉeti nin? Kaj pro tio bone esperu, ke tute certe vi estas sava». Post tiuj vortoj, ĉar la templimo de la puriĝo alvenis, foriris la tento kaj venis la konsolo. Tutkontente diris frato Johano: «Pro tio ke vi estas tre laca, kaj estas malfrue, mi petas ke vi iru por ripozi». Frato Mateo ne volis lin lasi, sed fine ree petita, li foriris de li por ripozi; kaj frato Johano restis sola kune kun la frato servanto. Kaj jen Kristo benata venas inter granda brilego kaj eksterordinara bonodoro, laŭ la promeso de li farita aperi al li alian fojon, kiam li estus plie bezona, kaj li perfekte sanigis lin je ĉiu lia malsaneco. Tiam frato Johano fervore dankante Dion, ĉar bonege li estis fininta la vojaĝon de tiu ĉi malfeliĉa vivo, al Dio rekomendis kaj donis sian animon, transpasante de tiu ĉi mortema al la eterna vivo kun Kristo benata, kiun li tiel longtempe deziregis kaj atendis. Kaj la dirita frato Johano ripozas ĉe la monaĥejo de la Plumo. Je laŭdo de Kristo. Amen.

ĈAPITRO XLVI.

Kiel frato Pacifiko preĝante vidis la animon de frato Humilo sia legitima frato, iranta en ĉielon.

Ĉe La dirita provinco de Markizlando, post la morto de sankta Francisko estis du legitimaj fratoj; unu estis nomata frato Humilo kaj la alia frato Pacifiko, kiuj estis viroj je granda sankteco kaj perfekteco. Kaj unu, nome frato Humilo, estis en la monaĥejo de Sofiano kaj tie li mortis; la alia estis en alia monaĥejo tre malproksima. Kiel plaĉis al Dio, frato Pacifiko, tagon preĝante en senhoma loko, estaziĝis kaj vidis la animon de frato Humilo, kiu ĵus mortis, iri rekte al ĉielo sen malhelpo. Post multaj jaroj okazis ke frato Pacifiko, kiu postvivis, estis sendita al la monaĥejo de Sofiano, kie lia legitima frato mortis. Dume la fratoj, laŭ peto de la estraro de Bruforto, translokiĝis al alia monaĥejo; pro tio, inter la aliaj aĝoj, ili transportis ankaŭ la restaĵojn de la sanktaj fratoj, kiuj mortis en sama monaĥejo. Kaj de la tombo de frato Humilo, frato Pacifiko elprenis liajn ostojn, lavis ilin per bona vino kaj kunvolvis ilin en blanka tuko, kaj riverence kaj pie plorante ilin kisis; la aliaj fratoj miris kaj tion konsideris ne bona ekzemplo; ĉar, estante li viro je granda sankteco, ŝajnis ke por homa kaj monda amo li ploras sian legitiman fraton, kaj ke li havas pli da emo al liaj restaĵoj ol al tiuj de la aliaj fratoj, kiuj posedis ne malpli grandan sanktecon ol frato Humilo, kaj same ili estis indaj je riverenco. Kaj koninte frato Pacifiko la neĝustan ideon de la fratoj, humile li klarigis al ili la kialon dirante: «Fratoj miaj tre karaj, ne miru ke mi faris por la restaĵoj de mia natura frato tion, kion mi ne faris por la aliaj; ĉar, Dio estu benata, ne altiris min, kiel vi kredas, monda amo; sed mi tion faris, ĉar, kiam mia frato transpasis el tiu ĉi vivo, dum mi foje estis preĝanta en senhoma loko kaj malproksime de li, mi vidis lian animon rekte supreniri al ĉielo; kaj pro tio mi estas certa, ke liaj ostoj estas sanktaj. Kaj se Dio estus konsentinta tioman certecon ankaŭ pri la aliaj, saman riverencon mi estus havinta ankaŭ por iliaj restaĵoj». Pro tio la fratoj, certigitaj pri lia sankta kaj pia zorgo, ricevis de li bonan ekzempon kaj laŭdis Dion, kiu permesas tiajn mirindaĵojn al siaj sanktaj fratoj. Je laŭdo de Kristo. Amen.

ĈAPITRO XLVII.

Pri tiu sankta frato, al kiu aperis la Patrino de Kristo, kiam li estis malsana, kaj ŝi portis al li tri vazojn da mielumita lakto.

Ĉe la supredirita monaĥejo de Sofiano estis pasinttempe frato minorito de tia granda sankteco kaj difavoro, ke li tute ŝajnis anĝelo kaj ofte li ĝuis la estazon en Dio. Foje tiu frato, dum li estis en estazo, venis al li diverspecaj birdoj kaj familie ili staris sur liaj ŝultroj kaj sur lia kapo, sur la brakoj kaj sur la manoj kaj mirinde ili kantis. Li estis dezertulo kaj malofte li parolis: sed kiam oni demandis ion al li, tiel ĝentile kaj tiel saĝe li respondis, ke li ŝajnis pli anĝelo ol homo, kaj li faris grandan preĝon kaj mediton, kaj la fratoj havis por li grandan riverencon. Fininte tiu ĉi frato la daŭron de sia plenvirta vivo, laŭ la dia dispono li malsaniĝis tiom, ke nenion li povis engluti, kaj pro tio neniun porkarnan kuracilon li volis; sed ĉiu sia espero estis en la ĉiela kuracisto, Jesuo Kristo benata, kaj en lia benata Patrino; de kiu li meritis per la dia boneco esti kompate vizitita kaj konsolita. Dum li sin preparis al la morto, aperis al li la glora Virga Mario Patrino de Kristo kun granda kvanto da anĝeloj kaj de virgaj sanktulinoj meze de mirinda brilado, kaj ŝi alproksimiĝis al lia lito; pro tio li rigardante ŝin ricevis grandan konsolon kaj ĝojon tiel en la animo, kiel en la korpo; kaj li komencis humile preĝi ŝin, por ke ŝi petu sian karan filon ke por ŝiaj meritoj li forigu lin de la malliberejo de la karno. Kaj kun multaj larmoj tiel preĝadinte, la Virga Mario respondis al li, persone lin alvokante, kaj diris: «Ne dubu, filo, ĉar via preĝo estas kontentigita kaj mi venis por porti al vi iom da konsolo antaŭ ol vi foriru de tiu ĉi vivo». Flanke de la Virga Mario estis tri virgulinoj, kiuj portis tri vazojn da mielumita lakto je nedirebla bonodoro kaj dolĉeco. Tiam la glora Virgulino prenis kaj malfermis unu el tiuj vazoj, kaj la tuta monaĥejo pleniĝis je bonodoro; kaj ŝi prenis per kulero iom da tiu mielumita lakto kaj englutigis ĝin de la malsanulo, kiu tuj kiam li ĝin gustumis, sentis en si tiom da konsolo kaj tiom da dolĉeco, ke lia animo ŝajnis ne povi resti en la korpo; pro tio li jenon diris: «Sufiĉe, ho tre sankta Virga Patrino benata, ho kuracisto benata kaj savantino de la homa gento, sufiĉe; ĉar mi ne plu povas ĝui tioman dolĉecon». Sed la kompatema kaj bonfara patrino, orfe englutigante de la malsanulo iom da tiu mielumita lakto malplenigis la tutan vazon. Post la malplenigo de la unua vazo, la benata, Virgulino prenas la duan kaj ŝi metas en ĝi la kuleron por doni al li iom ankoraŭ, pro tio li dolĉe plendas dirante: «Ho tre sankta Patrino de Dio, se mia animo estas preskaŭ tute aliiĝita pro la ĉiela bonegeco de la unua mielumita lakto, kiel mi povas ricevi ankoraŭ la duan? Mi petas vin, benata inter ĉiuj gesanktuloj kaj inter ĉiuj anĝeloj, ke vi bonvolu ne plu doni ĝin al mi». Respondas nia Sinjorino: «Gustumu, filo, ankoraŭ iom el tiu ĉi dua vazo». Kaj donante al li iom el ĝi ŝi diris: «Jam vi englutis sufiĉe de ĝi. Konsolu vin, filo, ĉar post ne multe mi revenos ĉe vi kaj mi kondukos vin al la regno de mia filo, kiun vi ĉiam serĉis kaj deziris». Kaj tion dirinte, ŝi forpermesis de li kaj foriris, kaj li restis tiel konsolita kaj ĝojoplena pro la bongusteco de tiu ĉi dolĉaĵo, ke dum kelkaj tagoj li vivis sata kaj forta sen iu alia korpa manĝaĵo. Kaj post kelkaj tagoj, kontente parolante kun la fratoj, li pasis de tiu ĉi malfeliĉa vivo al la vivo ĉiela. Amen.

ĈAPITRO XLV1II.

Kiel frato Jakobo el Massa vizie vidis ĉiujn fratojn de la mondo, kaj konis iliajn virtojn, iliajn meritojn kaj iliajn malvirtojn.

Frato Jakobo el Massa, al kiu Dio malfermis la pordon de siaj sekretoj kaj donis al li perfektan scipovon kaj konon de la Dia Skribo kaj de la estonteco, posedis tiom da sankteco, ke frato Egidjo el Asizo kaj frato Marko el Montino kaj frato Ĝinepro kaj frato Luĉido diris pri li ke ili ne konas iun alian en la mondo pligranda ĉe Dio. Mi deziregis lin vidi, ĉar, petinte mi fraton Johanon, kunulo de la dirita frato Egidjo, pri iaj spiritaj aferoj, li diris al mi: «Se vi deziras belan klarigon pri la spirita vivo, zorgu preparoli kun frato Jakobo el Massa: ĉar ankaŭ frato Egidjo deziris foje esti klarigita de li kaj al liaj paroloj oni nenion povas aldoni aŭ elpreni; ĉar lia menso enpenetris en la ĉielajn sekretojn, kaj liaj vortoj estas vortoj de la Sankta Spirito, kaj ne estas viro sur la tero, kiun mi tiom deziras vidi kiom lin. Tiu ĉi frato Jakobo, dum la tempo de la estreco de frato Johano el Parma, foje preĝante, estaziĝis en Dio kaj li tiamaniere restis en la daŭro de tri tagoj, sen ĉiu korpa sento, kaj tiel sensenta, ke la fratoj opiniis ke li mortis. Kaj dum tiu ĉi estazo Dio montris al li, kio devas esti kaj kiel devos estonte fariĝi nia Ordeno: pro tio kiam mi aŭdis tion, pligrandiĝis en mi la deziro por lin vidi kaj paroli kun li. Kaj kiam plaĉis al Dio ke mi povu libere paroli kun li, tiamaniere mi petis lin: «Se estas vera tio, kion mi aŭdis pri vi, mi petas ke vi ĝin malkaŝu ankaŭ al mi. Mi aŭdis ke, kiam vi estaze restis dum tri tagoj, inter la aliaj sciigoj, kiujn Dio donis al vi, estis tio, kio devos okazi al nia Ordeno; kaj tion diris frato Mateo, ministro de Markizlando, al kiu obee vi rakontis ». Tiam frato Jakobo tre humile aprobis la verecon pri tio, kion li estis dirinta al frato Mateo. Kaj la diro estis jena: «Frato Jakobo el Massa konatigis al mi ke, inter la aliaj inspiroj pri la militanta Eklezio al li donitaj de Dio, li estaze vidis belan kaj grandegan arbon, kies radikoj estis oraj, kaj kies fruktoj estis viroj, ĉiuj fratoj Minoritoj. Ĝiaj ĉefaj branĉoj estis aranĝitaj laŭ la numero de la provincoj de la Ordeno, kaj ĉiu branĉo subtenis tiom da fratoj, kiom da ili estas en la provinco riprezentata de la branĉo; kaj pro tio li konis la nombron de la fratoj en la Ordeno kaj en ĉiu provinco, kaj ankaŭ li konis iliajn nomon, aĝon, kondiĉon, oficon, gradon, honoron, kaj la favorojn kaj la kulpojn de ĉiuj. Kaj li vidis fraton Johanon el Parma sur la plej alta loko de la branĉo en la mezo de tiu ĉi arbo; kaj sur la pintoj de la ĉirkaŭantaj branĉoj estis la ministroj de ĉiuj provincoj. Kaj krom tio li vidis Kriston sidiĝanta sur tre granda kaj blankega trono; Kristo alvokis sanktan Franciskon, kaj donis al li kalikon plena je spirito de la vivo, kaj forsendis lin dirante: «Iru kaj vizitu viajn fratojn kaj trinkigu al ili tiun ĉi kalikon de spirito de la vivo, ĉar la spirito de Satano leviĝos kontraŭ ili, kaj ĝi ilin frapos; kaj multaj el ili falos kaj ne plu ili leviĝos. Kaj Kristo donis al sankta Francisko du anĝelojn, por ke ili akompanu lin. Tiam sankta Francisko venis por doni la kalikon de la vivo al siaj fratoj kaj komencis ekdoni ĝin al frato Johano el Parma, kiu ĝin prenis kaj tutrapide kaj pie trinkis la enhavon, kaj tuje li fariĝis brila kiel la suno. Kaj poste sankta Francisko donis ĝin al ĉiuj aliaj: kaj malmultaj estis tiuj, kiuj tute ĝin trinkis kun konvena respekto kaj pieco. Tiuj, kiuj pie akceptis ĝin, kaj la tutan enhavon trinkis, tuje ili fariĝis brilaj kiel la suno; kaj tiuj, kiuj ĝin tute forverŝis aŭ ne trinkis pie, ili fariĝis nigraj kaj mallumaj, aliformiĝintaj kaj terurigaj; tiuj, kiuj parte ĝin trinkis kaj parte ĝin forverŝis, ili fariĝis parte brilaj kaj parte mallumaj, plimalpli laŭ la mezuro de la kvanto trinkita kaj forver-

ŝita. Sed, pli ol ĉiuj aliaj, briladis la supredirita frato Johano, kiu tute komplete estis trinkinta la enhavon de la kaliko de la vivo, per kiu enhavo li klare estis vidinta la abismon de la senfina dia scienco, kaj per ĝi li estis sentinta la kontraŭaĵojn kaj la ventegojn, kiuj devos leviĝi kontraŭ la dirita arbo kaj disrompi kaj agitadi ĝiajn branĉojn. Pro tio la dirita frato Johano foriris de la pinto de la branĉo sur kiu li estis; kaj malsuprenveninte sub ĉiuj branĉoj, li kaŝis sin en la ŝtupo de la arbo, kaj pripense tie li restis. Kaj frato Bonaventuro, kiu estis trinkinta nur parton de la enhavo de la kaliko kaj parton li estis forverŝinta, supreniris sur tiu sama branĉo, de kiu frato Johano estis malsuprenirinta. Kaj li restante tie, liaj ungoj de la manoj fariĝis feraj kaj pintaj, kaj akraj kiel raziloj; pro tio li malsupreniris de la branĉo sur kiu li estis, kaj vivege kaj furore li intencis sin ĵeti kontraŭ la dirita frato Johano por danĝerlin. Sed frato Johano, tion vidinte, laŭte kriis kaj sin rekomendis al Kristo, kiu sidiĝis sur la trono; kaj Kristo, je lia krio, alvokis sanktan Franciskon kaj donis al li akran fajroŝtonon kaj diris al li: «Iru, kaj per tiu ĉi ŝtono tranĉu la ungojn de frato Bonaventuro, ĉar per ili li volas senhaŭtigi fraton Johanon, kaj faru ke tiu ĉi iun danĝeron ne suferu. Tiam sankta Francisko venis kaj agis laŭ la ordono de Kristo. Kaj tion li farinte, venis subita ventego, kiu tiel forte skuis la arbon, ke la fratoj teren falis, kaj unue falis tiuj, kiuj estis forverŝintaj la tutan enhavon de la kaliko de la spirito de la vivo, kaj la demonoj portis ilin en mallumajn kaj dolorigajn lokojn. Sed frato Johano, kune kun la aliaj, kiuj estis trinkintaj la tutan enhavon de la kaliko, estis transportitaj de la anĝeloj en lokon de vivo kaj de lumo eterna, kaj de feliĉega brilo. Kaj la dirita frato Jakobo, kiu vidis la vizion, bone komprenis kaj klare distingis kion li vidis pri la nomoj kaj kondiĉoj kaj statoj de ĉiuj. Kaj tiel fortega estis tiu ventego kontraŭ la arbo, ke tiu ĉi falis kaj la vento ĝin forportis. Kaj poste, tuj kiam la ventego ĉesis, de la ora radiko de la arbo forkreskis alia arbo tute ora, kiu burĝonis orajn foliojn, florojn kaj fruktojn. Pri tiu ĉi arbo kaj pri ĝiaj pligrandiĝo, profundeco, kaj beleco, kaj bonodoro kaj povo estas plibone silenti ol bone priskribi». Je laŭdo de Kristo. Amen.

CAPITRO XLIX.

Kiel Kristo aperis al frato Johano el Verno.

El la saĝaj, sanktaj fratoj, filoj de sankta Francisko, kiuj, laŭ la diro de Salomono, estas la gloro de la patro, estis en la dirita provinco de Markizlando la riverencinda kaj sankta frato Johano el Fermo, kiu, pro la longa tempo de sia loĝado ĉe la sankta monaĥejo de Verno (tie li pasigis la tutan vivon), estis ankaŭ nomata frato Johano el Verno; li estis viro je eksterordinara boneco de vivo kaj je granda sankteco. Ĝis kiam li estis monda knabo, li tutkore deziris la vojon de la pento por konservi la purecon de la korpo kaj de la animo; pro tio ĝis tiam li komencis porti la pentofarilon kaj la feran ringon sur la nuda karno kaj multe fasti, kaj precipe kiam li loĝis ĉe la kanonikoj de sankta Petro en la urbo Fermo, kiuj riĉe vivadis. Li evitis la korpajn plezurojn, kaj severe li maceris la korpon per granda abstinenco. Sed pro la kontraŭeco de siaj kunuloj, kiuj senigis lin de la pentofarilo, kaj diversmaniere malhelpis lian abstinencon, li, inspirita de Dio, pensis forlasi la mondon kaj ĝiajn amantojn, kaj sin turni al la brakoj de la Krucumito survestante la veston de la krucumita sankta Francisko, kaj tiel li faris. Li estis do ricevita en la Ordeno dum li estis knabo kaj donita al la zorgoj de la instruisto de la novicoj. Li poste fariĝis tiel spirita kaj pia, ke kelkafoje, aŭdante la diritan instruiston parolanta pri Dio, lia koro tute sin fandis kiel la vakso ĉe la fajro; kaj en la dia amo li tiel varmiĝis, ke ne povante resti senmova kaj suferi tiom da ĝojo, stariĝis, kaj kiel ebriulo de sankta spirito li trakuris jen tra la ĝardeno, jen tra la arbaro, jen tra la preĝejo laŭ la antaŭenpuŝo de la flamo de la spirito. Poste, dum la pasigo de la tempo, la dia favoro pli-grandiĝis de virto al virto en tiu ĉi anĝela viro kaj plenigis lin per ĉielaj favoroj, kaj diaj inspiroj kaj estazoj; tiel, ke kelkafoje lia animo estis surleviĝinta al la lumigado de la keruboj, kelkafoje al la flamo de la serafoj, kelkafoje al la ĝojegoj de la sanktuloj, kelkafoje al la amaj kaj sufiĉegaj ĉirkaŭpremoj de Kristo, ne sole pro internaj spiritaj ĝojoj, sed ankaŭ pro videblaj eksteraj signoj kaj korpaj plezuroj. Kaj foje la flamo de la amo al Dio tiel ege pli-grandiĝis en lia koro, ke ĝi restis en li dum la daŭro de tri jaroj: dum kiu tempo li ricevis mirindajn konsolojn kaj vizitojn de Dio kaj tre ofte li estaziĝis; kaj, mallonge, dum tiu tempo li ŝajnis tute flamiĝanta kaj fajrigata de la amo al Kristo, kaj tio okazis sur la monto de la Virgulino. Sed, ĉar Dio akurate zorgas por siaj filoj, donante al ili laŭ la diversaj tempoj, ĉu konsolon, ĉu suferon, ĉu prosperon, ĉu malfeliĉon por plie ekflamigi ilian deziron al la ĉielaj celoj; plaĉis al la dia boneco post la tri jaroj elpreni de la dirita frato Johano tiun radion kaj tiun flamon de dia amo, kaj senigis lin de ĉiu spirita konsolo; pro tio frato Johano restis sen lumo kaj sen la amo al Dio, kaj tute senkonsola kaj malfeliĉa. Pro tio li malĝojege disiradis tra la arbaro parolante kaj laŭte alvokante per preĝoj kaj sopiroj la karegan edzon de sia animo, kiu estis foririnta kaj kaŝinta de li, sen kies ĉeesto lia animo nek trovas trankvilecon, nek ripozon. Sed nenie kaj neniel li povis trovi la dolĉan Jesuon, nek ĝui tiujn spiritajn ĝojojn de la amo al Kristo, kiel li jam estis al kutimiĝinta. Kaj multajn tagojn daŭrigis en li tiu ĉi malĝojo, kaj li ne preterlasis tiun ĉi tempon sen ploroj, sen sopiroj, sen preĝoj al Dio por ke li redonu al lia animo la karan edzon. Fine, kiam plaĉis al Dio esti provinta lian paciencon kaj lian deziron, tagon, kiam frato Johano trairadis tra la arbaro tute senkonsola kaj malĝojega, pro laceco li sidiĝis ĉe fago kaj lia vizaĝo tute malsekiĝinta pro la larmoj, sin turnis al ĉielo; kaj jen tuj aperis Jesuo Kristo ĉe li sur la strateto, tra kiu frato Johano estis pasinta,

sed li nenion diradis. Vidinte lin frato Johano kaj bone rekoninte ke li estas Kristo, tuj sin ĵetis ĉe liaj piedoj kaj ploregante humilege li preĝis lin dirante: «Helpu min, Sinjoro mia, ĉar sen vi, mia dolĉa savinto, mi estas en la mallumo kaj en ploro; sen vi, dolĉanima ŝafido, mi estas en malĝojego kaj en doloro kaj en teruro; sen vi, filo de la tre alta Dio, mi estas en konfuziĝo kaj en honto; sen vi, mi estas senvesta je ĉiu bono kaj blinda, ĉar vi estas Jesuo Kristo, vera lumo de la animoj; sen vi, mi estos perdata kaj kondamnata, ĉar vi estas la vivo de la animoj kaj la vivo de la vivoj; sen vi, mi estas senfrukta kaj sekiĝinta. ĉar vi estas la fontano de ĉiu bono kaj de ĉiu favoro; sen vi, mi estas tute senkonsola, ĉar vi estas Jesuo savo, amo kaj deziro miaj, komfortiga pano kaj vino, kiu ĝojigas la korojn de la anĝeloj kaj la korojn de la sanktuloj. Inspiru min, favordona majstro kaj kompatema paŝtisto, ĉar mi estas via ŝafo, kvankam ne digna». Sed, ĉar la deziro de la sanktuloj, kiun Dio prokrastas kontentigi, pligrandigas en ili la amon kaj la meriton, Kristo benata, ne kontentigante lin, foriras laŭlonge la dirita strateto. Tiam trato Johano stariĝas, kaj kuras al li; kaj denove li sin ĵetas ĉe liaj piedoj kaj kun sankta trudemeco haltigas lin kaj piege larmante lin preĝas kaj diras: «Ho Jesuo Kristo tre dolĉa, kompatu min malfeliĉa, kontentigu min laŭ la grandeco de via kompatato kaj laŭ la vereco de via savopovo, kaj redonu al mi la ĝojon de via vizaĝo kaj de via kompatema rigardo, ĉar de via kompatato la tuta tero estas plena». Kaj Kristo denove foriras kaj nenion parolas al li, nek donas al li ian konsolon; kaj tiel same li faras, kiel patrino al infano, kiam ŝi faras ke ĝi deziregu la mamon, kaj ke ĝi plorante venu al ŝi, por ke ĝi poste pli volonte gustumu ĝin. Pro tio trato Johano kun fervoro kaj deziro pligrandaj sekvas Jesuon; kaj kiam li denove alvenis al li. Kristo benata sin turnas al li kaj kun ĝoja kaj ĉarma vizaĝo lin rigardas; kaj malfermante siajn sanktajn kaj kompatemajn brakojn ege dolĉe lin ĉirkaŭpremis: kaj dum la malfermo de la brakoj frato Johano vidis foririntaj de la tre sankta brusto de la Savinto brilantajn lumradiojn, kiuj lumigis la tutan arbaron kaj lin ankaŭ en la animo kaj en la korpo. Tiam frato Johano genufleksiĝis ĉe la piedoj de Kristo, kaj Jesuo benata, same kiel al la Madaleno, ekdonis al li piedon por ke li ĝin kisu; kaj frato Johano, preninte ĝin kun grandega riverenco, banis ĝin per tiom da larmoj, ke vere li ŝajnis alia Madaleno, kaj li diris: «Mi petas vin, Sinjoro mia, ke vi ne rigardu miajn pekojn, sed ke pro via sanktega pasio kaj pro la disperdo de via tre sankta kaj multvalora sango, revivigu mian animon en la favoro de via amo: kaj via ordono estu jena, ke mi amu vin kun la tuta koro kaj kun la tuta korinklino: kiun ordonon neniu povas plenumi sen via helpo. Helpu min do, tre aminda filo de Dio, por ke mi amu vin kun la tuta koro kaj kun ĉiuj miaj fortoj». Kaj tiel preĝinte frato Johano ĉe la piedoj de Kristo, estis kontentigita kaj li rehavis la alifojan favoron, tio estas la flamon de la dia amo; kaj li tute konsoliĝis kaj renoviĝis; kaj konstatinte ke la dia favoro estis en li reveninta, li komencis danki Kriston benatan kaj ree kisi liajn piedojn. Kaj poste stariĝinte por rigardi Kriston je la vizaĝo, Jesuo Kristo etendis siajn manojn por ke li kisu ilin; kaj post kiam frato Johano kisis ilin, li alproksimiĝis al Jesuo kaj lin ĉirkaŭpremis kaj kisis, kaj Kristo same ĉirkaŭpremis kaj kisis lin. Kaj dume frato Johano sentis tiel dian bonodoron, ke se ĉiuj spicoj kaj ĉiuj bonodorigaj aĵoj de la mondo estus kune kuniĝitaj, ili estus donintaj malbonodoron kompare kun tiu bonodoro. Kaj pro tio frato Johano estaziĝis kaj konsoliĝis, kaj tiu bonodoro restis en lia animo dum multaj monatoj. Kaj de nun el lia buŝo, sensoifiĝinta je la fontano de la dia scienco en la sanktega brusto de la Savinto, foriris mirindaj paroloj kaj ĉielaj, kiuj ŝanĝis la korojn de tiuj, kiuj lin aŭskultis, kaj faris grandan rikolton de animoj. Kaj en la vojeto de la arbaro, sur kiu marŝis Kristo, kaj en granda spaco ĉirkaŭe, frato Johano sentis tiun bonodoron kaj vidis tiun briladon kiam li tien iradis, kaj tio okazis ĝis longa tempo poste. Reveninte en si frato Johano post tiu estazo kaj

malaperinte la korpa ĉeesto de Kristo, li restis tiel lumigita en la animo pro la abismo de la dieco de Jesuo, ke kvankam li ne estas literaturisto laŭ homa lernado, tamen li mirinde solvis kaj deklaris la subtilajn kaj altajn problemojn de la dia Triunuo, kaj la profundajn misterojn de la Sankta Skribo. Kaj ofte parolante antaŭ la Papo kaj kardinaloj kaj reĝoj kaj baronoj kaj majstroj kaj doktoroj, ĉiujn li miregis pro la kleraj paroloj kaj profundaj difinoj, kiujn li diris. Je laŭdo de Kristo. Amen.

ĈAPITRO L.

Kiel frato Johano el Verno dirante la meson por la mortintoj vidis multajn animojn liberigitaj de la purgatorio.

Foje la dirita frato Johano dirante la meson, la postan tagon de la festo de ĉiuj sanktuloj, por la animo de la mortintoj, laŭ la regulo de la eklezio, tiel karite kaj tiel pie li oferdonis tiun tre altan Sakramenton, kiun per sia efikeco la animoj de la mortintoj deziras pli ol ĉiuj aliaj bonoj, kiujn oni povas fari por ili, ke li ŝajnis tute flamiĝinta pro pieco kaj fratama karmato. Pro tio dum tiu meso li pie levis la korpon de Kristo kaj oferdonis ĝin al Dio Patro kaj preĝis ke, por la amo de lia benata filo Jesuo Kristo, kiu por reakiri la animojn mortis sur la kruco, li bonvolu liberigi de la suferoj de la purgatorio la animojn de la mortintoj, de si mem kreitaj kaj reakiritaj; tuje li ekvidis preskaŭ senfinan nombron da animoj foriri de la purgatorio kiel nekalkuleblaj fajreroj forirantaj de fajreganta fornego; kaj li vidis ilin suprenirantaj al ĉielo por la meritoj de la pasio de Kristo, kiu ĉiutage estas oferdonata por la vivantoj kaj por la mortintoj en tiu tre sankta Hostio adorinda *in saecula saeculorum*. Amen.

ĈAPITRO LI.

Pri la sankta frato Jakobo el Fallerono, kaj kiel, post sia morto, li aperis al frato Johano el Verno.

Kiam frato Jakobo el Fallerono, viro je granda sankteco, estis tre malsana ĉe la monaĥejo de Moliano en la provinco de Fermo, frato Johano el Verno, kiu tiam loĝis ĉe la monaĥejo de Massa, aŭdinte pri lia malsaneco, ĉar li amis lin kiel sia kara patro, komencis pie preĝi Dion por ke li redonu la korpan sanecon, se tio estas la plibono por lia animo. Kaj tiel preĝante li estaziĝis kaj vidis tra la aero grandan amason da anĝeloj kaj sanktuloj staranta super lia ĉambreto, kiu estis en la arbaro, kun tioma ekbrilo ke la tuta ĉirkaŭaĵo estis lumigata. Kaj inter la anĝeloj li vidis fraton Jakobon malsana sed tute vestita per blankegaj vestoj. Inter ili li vidis ankaŭ la feliĉegan patron sanktan Franciskon ornamita de la sanktaj cikatroj de Kristo. Li vidis ankoraŭ fraton Luĉidon sanktan kaj fraton Mateon la pliaĝan el Monto Rubiano kaj ankoraŭ multajn aliajn fratojn, kiujn dum la vivo neniam vidis nek konis. Kaj frato Johano, vidinte kun granda ĝojo tiun feliĉegan aron da sanktuloj, povis esti certigata pri la savo de la animo de la dirita frato malsana kaj pri lia morto pro tiu malsaneco, kaj ankaŭ ke post lia morto ne tuj li iros en paradizon, ĉar por li estos konvene iom puriĝi en purgatorio. De tiu vizio frato Johano ricevis tioman ĝojon por la savo de lia animo, ke pri la morto do la korpo li ne plendis; sed kun granda spirita dolĉeco li en si mem alvokis lin dirante: «Frato Jakobo, kara patro mia; frato Jakobo, kara frato mia; frato Jakobo, tre fidela servanto kaj amiko de Dio; frato Jakobo, kunulo de la anĝeloj kaj familiano de la sanktuloj». Kaj kun tiu certeco kaj tiu ĝojo li revenis en si mem; kaj tuje li foriris de la monaĥejo kaj iris por viziti la diritan fraton Jakobon el Moliano; kaj li trovis lin pligraviĝinta tiel, ke apenaŭ li povas paroli; kaj li informis lin pri la morto de la korpo kaj pri la savo kaj la gloro de la animo, laŭ la certeco, kiun li ricevis de la dia inspiro. Pro tio frato Jakobo, tute ĝoja en la animo kaj sur la vizaĝo, lin ricevis kun granda kontenteco kaj gaja rideto dankante lin pri la bonaj novaĵoj kaj pie rekomendante sin al li. Tiam frato Johano kore petis lin por ke post lia morto li revenu al li por informi lin pri sia stato; kaj frato Jakobo tion promesis, se tio plaĉos al Dio. Alproksimiĝinte la momento de lia transiro, frato Jakobo komencis pie diri la verson de la salmo: Pace en la vivo eterna mi ekdormos kaj en ĝi mi ripozos; kaj dirinte tiun ĉi verson kun gaja kaj kontenta vizaĝo li transpasis de tiu ĉi vivo. Kaj poste, kiam li estis enterigita, frato Johano revenis al monaĥejo de Massa kaj atendis la plenumon de la promeso de frato Jakobo, tio estas ke li revenu al li la difinitan tagon. Sed la difinitan tagon dum li estis preĝanta, aperis al li Kristo kun granda aro da anĝeloj kaj sanktuloj, inter kiuj ne estas frato Jakobo; pro tio frato Johano, tre mirigita, pie rekomendis lin al Kristo. La sekvantan tagon, al sama frato Johano repreĝanta en la arbaro, aperis frato Jakobo akompanita de la anĝeloj, tute glorpuna kaj tute kontenta, kaj al li diris frato Johano: «Ho tre kara patro, kial vi ne revenis al mi la tagon de vi promesitan?». Respondis frato Jakobo: «Ĉar bezonis al mi kelka puriĝado; sed la saman momenton kiam Kristo aperis al vi, vi rekomendis min, Kristo kontentigis vin kaj liberigis min de ĉiu doloro. Kaj tiam mi aperis al frato Jakobo el Massa, sankta laiko, kiu servante la meson vidis la sanktigitan Hostion, kiam la pastro ĝin levis, ŝanĝinta en tre bela infano vivanta, kaj mi diris al li: «Hodiaŭ kune kun tiu infano mi flugas al regno de la eterna vivo, al kiu neniu povas iri sen li». Kaj frato Jakobo, post kiam li diris tiujn ĉi vortojn, mala-

peris kaj revenis al ĉielo kun tiu aro da anĝeloj, kaj frato Johano restis tre konsolita, La dirita frato Jakobo el Fallerono mortis la antaŭtagon de la festo de sankta Jakobo apostolo en la monato julio ĉe la supredirita monaĥejo de Moliano, ĉe kiu por liaj meritoj la dia boneco montris, post lia morto, multajn miraklojn. Je laŭdo de Kristo. Amen.

ĈAPITRO LII.

Pri la vizio de frato Johano el Verno, per kiu li konis la tutan ordon de la Sankta Triunuo.

La ŝupredirita frato Johano el Verno, ĉar li estis perfekte rifuzinta ĉiujn mondajn kaj pase-majn ĝojojn kaj konsolojn, kaj en Dio li estis metinta ĉiun sian ĝojon kaj ĉiun sian esperon, la dia boneco donis al li mirindajn konsolojn kaj aperojn precipe dum la solenaj festotagoj de Kristo. Pro tio, foje alproksimiĝante la soleneco de la Kristnasko, de kiu li atendis tute certe kelkan dian konsolon pri la dolĉa homeco de Jesuo; la Sankta Spirito enmetis en lian animon tiel grandan kaj eksterordinaran amon kaj fervoron pri la karito de Kristo, pro kiu karito li humiliĝis ĝis la elpreno de nia homeco, ke vere al li ŝajnis ke sia animo estas forprenita for de la korpo kaj ke ĝi brulas kiel fornego. Tiun fajron ne povante li suferi, laŭte li kriadis pro la doloro; ĉar pro la forto de la Sankta Spirito kaj pro la troa fervoro de la amo li ne povis sin deteni ne kriante. Kaj kiam nemezurebla fervoro venis al li kaj kun ĝi forta kaj certiga espero pri sia savo, li tute ne kredis, se tiam li estus mortinta, devi trapasi tra la suferoj de la purgatorio. Kaj tiu ĉi amo daŭrigadis duonjare, kvankam tiun eksterordinaran fervoron li senhalte ne havis, sed ĝi venis en li dum kelkaj horoj de la tago. Kaj ankaŭ en la daŭro de tiu tempo li ĝojis multajn mirindajn vizitojn kaj konsolojn de Dio: kaj ofte li estaziĝis, kiel vidis tiu frato, kiu skribis de la komenco tiun ĉi verkon; foje iun nokton li tiel estaziĝis en Dio, ke li vidis en li, kreinto, ĉiujn aĵojn kreitajn ĉu ĉielajn ĉu mondajn kaj ĉiujn iliajn perfektecojn kaj rangojn kaj apartajn ordojn. Kaj tiamaniere li konis klare kiel ĉiu aĵo kreita riprezentas sian kreinton, kaj kiel Dio estas supre kaj interne kaj ekstere kaj flanke de ĉiuj aĵoj kreitaj. Eĉ li konis unu Dion en tri personoj, kaj tri personojn en unu Dio, kaj la senfinan kariton, kiu korpigis la Filon de Dio por la obeo al Patro. Kaj fine li konis per tiu vizio, ke neniuj alia vojo estas, tra kiu la animo povas iri al Dio kaj atingi la vivon eternan, krom tra Kristo benata, kiu estas la vojo, la vero kaj la vivo de la animoj. Amen.

ĈAPITRO LIII.

Kiel frato Johano el Verno dirante la meson falis teren kiel mortinto.

Al dirita frato Johano ĉe la supredirita monaĥejo de Moliano, laŭ la rakonto de la fratoj, kiuj ĉeestis, okazis foje jena mirinda okazintaĵo, ke la unuan nokton post la oktagaro de sankta Laŭrenco kaj inter la oktagaro de la Mariĉieliro, dirinte li la matutinion en la preĝejo kun la aliaj fratoj kaj alveninte sur li la forto de la dia favoro, li iris en la ĝardenon por mediti pri la pasio de Kristo kaj por pie sin prepari por diri la meson, kiun li devos kanti. Kaj meditante pri la vortoj de la sanktigo de la korpo de Kristo kaj konsiderante la senfinan kariton de Kristo, per kiu li ne nur volis nin elaĉeti per sia multvalora sango, sed ankaŭ lasi al ni, kiel nutraĵo por niaj animoj sian korpon kaj sian tre puran sangon; pro tioma fervoro kaj pro tioma dolĉeco komencis pligrandiĝi en li la amo al Jesuo, ke eĉ li ne povis plu subteni la dolĉecon de sia animo, kaj li laŭte kriis, kaj kiel ebria de ĉiela spirito li diradis en si mem: *Hoc est corpus meum*: ĉar dirante tiujn ĉi vortojn ŝajnis al li vidi Kriston benatan kune kun la Virga Mario kaj kun granda amaso da anĝeloj. Kaj tion dirante li estis lumigata de la Sankta Spirito pri ĉiuj profundaj kaj altaj misteroj de tiu grandega sakramento. Kaj je la tagiĝo li, plena de tiu spirita fervoro kaj de tiu deziro, eniris en la preĝejon laŭte dirante tiun frazon, kredante ke neniu aŭdas lin, sed en la ĥorejo estis kelkaj fratoj preĝantaj, kiuj ĉion vidis kaj ĉion aŭdis. Kaj li, ne povante sin deteni de tiu fervoro pro la sufiĉeco de la favoro, laŭte kriadis; kaj tiel li daŭrigis ĝis la momento de la meso, kiam sin survestis por alproksimiĝi al la altaro. Kaj ju pli procedis la meso, des pli kreskis en li la amo al Dio kaj la pia fervoro, kiuj devenas de la sento al Dio, kiun senton li mem nek sciis, nek povis esprimi per la lango. Pro tio, timante li, ke tiu fervoro kaj ke tiu sento tiel kresku, ke estu konvene ke li interrompu la meson, li estis en granda ŝanceliĝo kaj li ne sciis kion fari, ĉu daŭrigi la meson, ĉu atendi. Sed, ĉar alifoje okazis al li la samo, kaj la Sinjoro moderigis tiun fervoron por ke li ne interrompu la meson, esperante ankoraŭ en tio, kun granda timo li daŭrigis la meson; kaj kiam li alvenis al la prefaco de nia Sinjorino, la dia inspiro kaj la ĝojiga dolĉeco de la amo al Dio komencis tiel pligrandiĝi, ke je la *qui pridie* preskaŭ li ne povis deteni la ĝojon kaj la dolĉecon. Fine, je la ago de la sanktigo, li diris nur la duonon de la frazo sur la Hostio, tio estas *Hoc est*; kaj neniel li povis daŭrigadi, sed nur li rediradis la samajn vortojn *Hoc est*; kaj la kialo, pro kiu li ne povis daŭrigadi estis, ke li sentas kaj vidas la ĉeeston de Kristo kune kun granda aro da anĝeloj, kies majestecon li ne povis kun malmulte da sento konsideri; kaj li vidis ke Kristo ne eniris en la Hostion, aŭ ke la hostio ne transsubstanciĝis en la korpo de Kristo se li ne ekdiras la alian duonon de la frazo, tio estas *corpus meum*. Pro tio dum li estas en tiu ĉi timego kaj ne daŭrigante li la meson, la gardanto kaj la aliaj fratoj kaj ankaŭ multaj mondaj personoj, kiuj estis en la preĝejo por ĉeesti la meson, alproksimiĝis al la altaro; kaj ĉiuj estis mirigitaj vidante kaj konsiderante la agojn de frato Johano kaj multaj el ili ploris pro piegeco. Fine, post longa tempo, tio estas kiam plaĉis al Dio, frato Johano laŭte ekdiris *corpus meum*; kaj tuj la substanco de la pano ŝanĝiĝis kaj en la hostio aperis Jesuo Kristo benata kronita kaj plenglora: kaj tiel li montris sian humilecon kaj sian kariton, kiuj korpigis lin per Virga Mario, kaj kiuj ĉiutage venigas en la manojn de la pastro kiam li sanktigas la Hostion; pro tio li ĉiam pli ĝojis la dolĉecon de la medito. Post kiam li suprenlevis la Hostion kaj la sanktigitan kalikon, li estaziĝis, kaj pro tio, kiam lia animo apartiĝis de la

corpaj sentoj, lia korpo malantaŭen falis; kaj se la gardanto, kiu staris malantaŭ de li, ne estus subteninta lin, li estus teren surdorse falinta. Tial, alkurinte la fratoj kaj la mondaj personoj, kiuj estis en la preĝejo, li estis portita en la sakristion kiel mortinto, kaj la fingroj de la manoj estis tiel forte rigidiĝintaj ke oni ne povas ilin etendigi kaj movigi. Kaj tiamaniere li kuŝe restis svene aŭ plibone estaze, ĝis la tria kaj estis somere. Kaj ĉar mi, kiu ĉeestis tiun okazintaĵon, tre deziris scii tion, kion Dio estis farinta en li, tuj kiam li revenis en si mem, mi min turnis al li kaj mi petis ke por la karito de Dio li bonvolu ĉion priskribi al mi. Pro tio li, ĉar li multe fidis je mi, ĉion al mi rakontis; kaj inter la aliaj aferoj li diris al mi ke sanktigante li la korpon kaj la sangon de Jesuo Kristo, kaj eĉ antaŭe, lia koro kiel vakso fandiĝis kaj sia karno ŝajnis senosta, tiel ke li preskaŭ ne povis movi ĉu la brakojn, ĉu la manojn por fari la krucosignon nek super la Hostio, nek super la kaliko. Ankaŭ li diris al mi ke, antaŭ sia pastreco, Dio inspiris lin ke li devos sveni dum la meso; sed ke, ĉar li estis dirinta multajn mesojn kaj nenio estis al li okazinta, li opiniis ke la inspiro ne estus donita de Dio. Tamen, kvindek tagojn antaŭ la Mariĉieliro, tio estas kiam tio okazis al li, Dio denove estis inspirinta lin, ke tio estus devonta okazi preskaŭ la diritan festotagon de la Mariĉieliro; sed poste li ne plu estis rememorinta la diritan inspiron. Amen.

ENHAVO

ANTAŬPAROLO.....	7
KLARIGO PRI LA FLORETOJ.....	9
ĈAPITRO I.....	11
<i>Je l' nomo de nia Sinjoro Jesuo Kristo Krucumita, kaj de lia patrino Virgino Mario. En tiu ĉi libro estas iuj floretoj, mirakloj kaj piaj ekzemploj de la tre glora malriĉulo de Kristo, sinjoro sankta Francisko, kaj de kelkaj liaj kunuloj, por laŭdo de Jesuo Kristo. Amen.</i>	
ĈAPITRO II.....	12
<i>Pri frato Bernardo el Quintavale [Kuintavale], unua kunulo de Sankta Francisko.</i>	
ĈAPITRO III.....	14
<i>Kiel pro malbona penso, kiun sankta Francisko havis kontraŭ frato Bernardo, li ordonis al sama frato Bernardo, ke trifoje li supreniru per la piedoj sur sian gorgon kaj sian buŝon.</i>	
ĈAPITRO IV.....	16
<i>Kiel la anĝelo de Dio proponis problemon al frato Helio, gardanto de iu monaĥejo en Valo de Spoleto, kaj ĉar frato Helio arogante respondis al li, tiu foriris kaj iris al sankta Jakobo, kie trovis fraton Bernardon kaj al li rakontis tiun ĉi historion.</i>	
ĈAPITRO V.....	18
<i>Kiel la sankta frato Bernardo el Asizo estis sendita de sankta Francisko al Bolonjo kaj tie li starigis monaĥejon.</i>	
ĈAPITRO VI.....	20
<i>Kiel sankta Francisko benis la sanktan fraton Bernardon kaj elektis lin sia vikario, kiam li alproksimiĝis al transpaso el tiu ĉi vivo.</i>	
ĈAPITRO VII.....	22
<i>Kiel sankta Francisko faris grandan faston sur insulo de la lago de Peruĝa, kie fastis dum 40 tagoj kaj 40 noktoj, kaj li ne manĝis pli ol duono da bulko.</i>	
ĈAPITRO VIII.....	23
<i>Kiel marŝante sankta Francisko, al frato Leono elmontris tiujn aferojn, kiuj estas perfekta ĝojo.</i>	
ĈAPITRO IX.....	25
<i>Kiel sankta Francisko instruis respondi al frato Leono, kiu ĉiam. kontraŭdiris tion, kion sankta Francisko volis.</i>	
ĈAPITRO X.....	26
<i>Kiel frato Maseo, preskaŭ proverbante, diris al sankta Francisko ke la mondo lin sekvas, kaj li respondis, ke tio estas por konfuzi la mondon, kaj por favoro de Dio.</i>	
CAPITRO XI.....	27
<i>Kiel sankta Francisko igis, ke frato Maseo iru multfoje ĉirkaŭe, kaj poste li iris al Sieno.</i>	
ĈAPITRO XII.....	28
<i>Kiel sankta Francisko metis fraton Maseon al servo de la pordo, de la almozo kaj de la kuirejo: poste, laŭ peto de la aliaj fratoj, lin forlevis.</i>	
ĈAPITRO XIII.....	29
<i>Kiel sankta Francisko kaj frato Paseo metis sur ŝtonon, ĉe iu fonto, la panon, kiun ili almoze ricevis, kaj sankta Francisko tre laŭdis la malriĉecon. Poste li preĝis Dion kaj sanktan Petron kaj sanktan Paŭlon por ke ili metu ilin en la amo al la sankta malriĉeco; kaj kiel aperis al ili sankta Petro kaj sankta Paŭlo.</i>	

ĈAPITRO XIV.....	31
<i>Kiel dum sankta Francisko estis parolanta kune kun la fratoj pri Dio, tiu aperis inter ili.</i>	
ĈAPITRO XV.....	32
<i>Kiel sankta Klaro manĝis kune kun sankta Francisko kaj kune kun liaj kunfratoj en Sankta Mario de la Anĝeloj.</i>	
ĈAPITRO XVI.....	34
<i>Kiel sankta Francisko ricevis la konsilon de sankta Klaro kaj de sankta frato Silvestro, ke li predikante konvertu multajn homojn; kaj li predikis al la birdoj kaj kvietigis la hirundojn.</i>	
ĈAPITRO XVII.....	36
<i>Kiel infano frateto, dum sankta Francisko nokte estis preĝanta, vidis Kriston kaj la Virginon Marion kaj multajn sanktulojn kunparoli kun li.</i>	
ĈAPITRO XVIII.....	37
<i>Pri la mirinda kunveno, kiun faris sankta Francisko ĉe sankta Mario de la Anĝeloj, kie ĉeestis pli ol kvin mil fratoj.</i>	
ĈAPITRO XIX.....	39
<i>Kiel el la vinberejo de iu pastro en Rieti, ĉe kiu sankta Francisko preĝis, pro la kvanto da personoj, kiuj venis al li, estis forportitaj ĉiuj vinberaroj ; kaj poste ĝi mirakle produktis pli da vino ol antaŭe, kiel sankta Francisko estis promesinta; kaj kiel Dio revelaciis al sankta Francisko ke li iros en paradizon.</i>	
ĈAPITRO XX.....	41
<i>Pri tre bela vizio, kiun vidis juna frato, kiu ekabomenis la monaĥan robon, kaj kiu estis ema demeti ĝin kaj ekŝiĝi el la Ordeno.</i>	
ĈAPITRO XXI.....	42
<i>Pri la tre sankta miraklo farita de sankta Francisko, kiam li konvertis la lupon el Gubjo.</i>	
ĈAPITRO XXII.....	44
<i>Kiel sankta Francisko malsovaĝigis la sovaĝajn turtojn.</i>	
ĈAPITRO XXIII.....	45
<i>Kiel sankta Francisko liberigis kunfraton, kiu estis en peko kun la demono.</i>	
ĈAPITRO XXIV.....	46
<i>Kiel sankta Francisko konvertis al la fido la Sultanon de Babilonio.</i>	
ĈAPITRO XXV.....	48
<i>Kiel sankta Francisko mirakle resanigis leprulon en la animo kaj en la korpo; kaj pri tio, kion tiu animo diris flugante al ĉielo.</i>	
ĈAPITRO XXVI.....	50
<i>Kiel sankta Francisko konvertis tri mortigemajn ŝtelistojn, kaj ili monaĥiĝis; kaj pri la mirinda vizio, kiun vidis unu el ili, kiu estis tre sankta frato.</i>	
ĈAPITRO XXVII.....	54
<i>Kiel sankta Francisko konvertis en Bolonjo du studentojn kaj ili fariĝis fratoj; kaj poste li levis al unu el ili grandan tenton.</i>	
ĈAPITRO XXVIII.....	56
<i>Pri estazo, kiun frato Bernardo havis, pro kiu li restis for el si mem de la mateno ĝis la naŭa.</i>	
ĈAPITRO XXIX.....	57
<i>Kiel la demono, laŭ ŝajnigo de la Krucumito, aperis kelkfoje al frato Rufino, dirante al li ke li perdas ĉiun bonon, kiun li faras, pro tio ke li ne estas inter la elektitoj por la vivo eterna. Kion sankta Francisko konis pro dia inspiro, kaj li informis pri lia eraro fraton Rufinon.</i>	

ĈAPITRO XXX.....	59
<i>Pri La bela prediko, kiun faris en Asizo sankta Francisko kaj frato Rufino, kiam ili nude predikis.</i>	
ĈAPITRO XXXI.....	60
<i>Kiel sankta Francisko tute konis la sekretojn da la konsciencoj de ĉiuj siaj fratoj.</i>	
ĈAPITRO XXXII.....	61
<i>Kiel frato Maseo ricevis de Kristo la virton de la humileco.</i>	
ĈAPITRO XXXIII.....	62
<i>Kiel sankta Klaro, je ordono de la Papo, benis unu panon, kiu estis sur la tablo : kaj pro tio sur la aliaj panoj aperis la signo de la sankta kruco.</i>	
ĈAPITRO XXXIV.....	63
<i>Kiel sankta Ludoviko, reĝo de Francujo, pilgrime iris al Peruĝo por viziti la sanktan fraton Egidjon.</i>	
ĈAPITRO XXXV.....	64
<i>Kiel sankta Klaro, dum ŝi estis malsana, estis mirakle portita, la nokton de Kristnasko, al la preĝejo de sankta Francisko kaj tie ŝi ĉeestis la diservon.</i>	
ĈAPITRO XXXVI.....	65
<i>Kiel sankta Francisko klarigis al frato Leono belan vizion, kiun la lasta vidis.</i>	
ĈAPITRO XXXVII.....	66
<i>Kiel Jesuo Kristo benata, laŭ la preĝo de Sankta Francisko, konvertis riĉan kaj nobelan kavaliron, kiu estis farinta grandan honoron kaj oferdonon al sankta Francisko, kaj poste li monaĥiĝis.</i>	
ĈAPITRO XXXVIII.....	67
<i>Kiel sankta Francisko inspire konis ke frato Helio estis kondamnita kaj ke li devos morti for de la Ordeno.</i>	
ĈAPITRO XXXIX.....	69
<i>Pri la mirinda prediko, kiun faris sankta Antono el Padova, frato minorito, en koncistorio.</i>	
ĈAPITRO XL.....	70
<i>Pri la miraklo, kiun Dio faris, kiam sankta Antono en rimini predikis al la fiŝoj de la maro.</i>	
ĈAPITRO XLI.....	72
<i>Kiel la respektinda frato Simono liberigis el granda tento iun fraton, kiu pro ĝi volis ekŝiĝi el la Ordeno.</i>	
ĈAPITRO XLII.....	74
<i>Pri belaj mirakloj faritaj de Dio per kelkaj fratoj.</i>	
ĈAPITRO XLIII.....	76
<i>Kiel frato Konrado el Offida konvertis junan fraton, kiu ĝenis la aliajn fratojn. Kaj kiel la dirita juna frato mortinte aperis al dirita frato Konrado petante ke li preĝu por li, kaj kiel li per sia preĝo liberigis lin de la grandegaj doloroj de la purgatorio.</i>	
ĈAPITRO XLIV.....	77
<i>Kiel la Dipatrino kaj sankta Johano Evangeliisto aperis al frato Konrado; kaj ili diris al li, kiu el ili pli suferis pri la Pasio.</i>	
ĈAPITRO XLV.....	78
<i>Pri la konverto kaj vivo kaj mirakloj kaj morto de la sankta frato Johano el Verno.</i>	
ĈAPITRO XLVI.....	80
<i>Kiel frato Pacifiko preĝante vidis la animon de frato Humilo sia legitima frato, iranta en ĉielon.</i>	

ĈAPITRO XLVII.....	81
<i>Pri tiu sankta frato, al kiu aperis la Patrino de Kristo, kiam li estis malsana, kaj ŝi portis al li tri vazojn da mielumita lakto.</i>	
ĈAPITRO XLVIII.....	82
<i>Kiel frato Jakobo el Massa vizie vidis ĉiujn fratojn de la mondo, kaj konis iliajn virtojn, iliajn meritojn kaj iliajn malvirtojn.</i>	
CAPITRO XLIX.....	84
<i>Kiel Kristo aperis al frato Johano el Verno.</i>	
ĈAPITRO L.....	87
<i>Kiel frato Johano el Verno dirante la meson por la mortintoj vidis multajn animojn liberigitaj de la purgatorio.</i>	
ĈAPITRO LI.....	88
<i>Pri la sankta frato Jakobo el Fallerono, kaj kiel, post sia morto, li aperis al frato Johano el Verno.</i>	
ĈAPITRO LII.....	90
<i>Pri la vizio de frato Johano el Verno, per kiu li konis la tutan ordon de la Sankta Triunuo.</i>	
ĈAPITRO LIII.....	91
<i>Kiel frato Johano el Verno dirante la meson falis teren kiel mortinto.</i>	